

kaj tiuj kiuj havas esperantologiajn aŭ interlingvistikajn konojn aŭ kompetentojn, ofte ne vere konsideras sin esperantistoj. Ĉi tiun surprizan kaj evidente paradoksan kontraston necesas konsideri. Ŝajnas, ke fone de la grandaj akademiaj transformoj, la ŝanĝitaj instrukaj lern-prioritatoj, la ŝparpremo flanke de la politiko, la dubado pri la senco de malgrandaj, „orkideaj” fakoj (kiel slavistiko, cetere), la drasta konkurenco de ĉiuj flankoj ktp. tiaj ideoj, planoj kaj projektoj kiel la enkonduko de la planlingvaj studoj iĝis verŝajne ankoraŭ pli malfacile realigeblaj ol antaŭ jaroj, jardekoj, kaj devos resti privataj aŭ duonprofesiaj iniciatoj. Sed tiu opinio eble estas erara, kaj eventuale indus refari provojn. Tamen kiel solulo, kiel Davido, kiu devus konvinki ŝtatajn instancojn, Goliatojn, oni sentas sin tiom malforta en la kredo, ke oni supozeble malmulton atingos, kvankam oni dezirus.

Se rilate la aluditan „eternan gloron” de iuj verkoj oni volus je la fino de ĉi tiu dankparolado iom citi el la verkaro de nia ŝatinda Grabowski, jen eble taŭgus en nia kunteksto la du unuaj strofoj de originala poemo, kiun li dediĉis „Al la semanto” – la Majstro en Varsovio:

*Feliĉa la semanto estas,
Printempe kiu semis grenon
Kaj en aŭtuno ĝoje festas
De bonrikolto la solenon.*

*Feliĉa, kiu en la koro
Pri granda verko flame revis,
Kaj el la ĉarma revo-floro
Maturan frukton elricevis*

Kaj, iom pli malmode, fama citaĵo el odo de Horacio, ellatinigita de Grabowski:

*Monumenton, ol bronz' kreis pli daŭran mi,
Supron de l' piramid' alte superas ĝi.
Nek pluvega malsek', nek plej impeta vent'
Ĝin detruos en kur' longa de jaroj, nek
Tempo, kiu sen halt' pasas senfine for.*

Kiel ni vidas, ankaŭ Grabowski okupiĝis pri la demando de la gloro. En tiu senco estu esprimita la deziro, ke la svisa enciklopedio servu kiel modelo por analogaj alilandaj projektoj. Espereble la aljuĝo de la premio Grabowski influos ankaŭ iomete la komercan sukceson de la svisa enciklopedio. Ĉiu aŭtoro deziregas, ke, se iel eble, la tuta mondo aĉetu kaj legu lian libron. Klare estas ke tiaj specifaj – kaj multekostaj – libroj kiel la mia ne furoras kiel plej ofte vendataj. Ĉiukaze por mi pli gravas kvalito ol kvanto. Sed mi estas konvinkita, ke la premio Grabowski certe helpas, ke la svisa enciklopedio iam fariĝos bestselera. Kaj krom tio ĝi sendube helpas konservi aŭ eĉ fortigos mian motivigon plu labori, *rekte kaj ne deflankigante*, por Esperanto, esperantologio kaj interlingvistiko.

Fone de ceteraj elstaraj gravaĵoj, kiujn kreis aliaj esperantistoj, kompreneble ne decas pretendi, ke *Svisa Enciklopedio Planlingva* malgraŭ ĝia dikeco ricevu eternan gloron, male jes ĉiuj svissaj planlingvanoj, kiuj en la enciklopedio estas prezentitaj kaj al kiuj la verko estas dediĉita. Do, denove dankon, pro la plivalorigo de la verko, kaj pro la gratoj ricevitaj de diversaj flankoj. Espereble la botelo de „Bona svisa vino al la fino”, kiel Ed Borsboom titolis sian recenzon, baldaŭ povos esti solene malfermita!

**Andreas Künzli,
Berno, Svislando, fine de julio 2008**

Stanisław Śmigielski

Redaktore



Imprese pri la Kongreso de Esperantistoj–Ĵurnalistoj 2008

La anoncoj pri ebleco aliĝi al la planota por majo 2008 – 1^a Tutmonda Kongreso de Esperantistoj–Ĵurnalistoj aperis je la komenco de la nova jaro.

Litova Esperanto-Asocio planis gastigi en Vilno cent gekongresanojn, sed ĝis la mezo de aprilo, do ĝis la ĝusta tempo sendi aliĝilojn, la nombro da volontuloj kongresi atingis preskaŭ ducent. La litovaj gereĝisoroj de la Kongreso decidis bonvenigi ĉiujn aliĝintojn.

Tiel do, la 1^a Tutmonda Kongreso de Esperantistoj–Ĵurnalistoj okazis de la 26^a ĝis la 30^a de majo 2008 en la ĉefurbo de Litovio – Vilno kaj partoprenis en ĝi pli ol 180 gekongresanoj el 37 landoj. La Kongreson reĝisoris prof. Humphrey Tonkin el la Universitato de Hartford en Usono kaj la ĉeftemo de la Kongreso estis „Internacia interkultura komunikado: ĵurnalismo kaj Esperanto”. Dum kvin tagoj la gekongresanoj diversflanke traktis ĉi temon en pluraj raportoj kaj prelegoj plenkunsidaj kaj sekcijaj.

La Kongreso estis altnivele organizita: ĉiu partoprenanto ricevis kongreslibron, en kiu estas prilimitaj diversaj temoj de la esperantista ĵurnalismo, mallonga prezento de ĉiuj prelegantoj kun fotoj kaj la adresaro de ĉiuj gekongresanoj. Kiel dum UK, ĉiu ricevis ankaŭ la kongresan insignon kaj identigilon.

Jam en la kongreslibro la partoprenantojn de la Kongreso salutis: Gediminas Kirkilas, ĉefministro de Litova Respubliko, Česlovas Juršenas, prezidanto de la Sejmo (parlamento) de Litovio, Juozas Imbrasas, urbestro de Vilnius, Petras Vaitiekunas, ministro pri eksterlandaj aferoj de Litova Respubliko kaj Jonas Jučas, ministro pri kulturo de Litovio. Neniu UK ĝis nun havis tiom multe da oficialaj altaj protektantoj!

La Kongreso en Vilno estis aranĝita sub aŭspicio de Universala Esperanto-Asocio, do en la kongreslibro salutis la gekongresanojn Probal Dasgupta, prezidanto de UEA, kaj en la Kongreso partoprenis aliaj estraranoj de UEA.

Dum la unua kongresa tago estis aranĝita tuttaga ekskurso tra la ĉefurbo de Litovio – la kongresurbo – Vilno. Kelkaj nomis ĉi ekskurson interkona, ĉar dum ĝi oni povis ekkoni Vilnon kaj Trakaj sed ankaŭ reciproke ekkoni unu la alian kaj ofte libere babili, precipe inter gekonatoj, kiuj havis la okazon denove renkontiĝi.

En la n-ro 2 (januaro 1998) la buda-peŝtaj *Eventoj* aperigis „Adresaron de Esperanta Gazetaro”, en kiu estas donitaj titoloj kaj adresoj de redakcioj de 188 gazetoj kaj revuoj en Esperanto, kiuj aperadis tiam en la tuta mondo.

Dek jarojn pli poste, laŭ la retpaĝoj:

www.gazetotekolanti.com kaj www.gazetajo.org estas nur 83 gazetoj kaj revuoj. Pri la temo de malaperado de E-gazetoj oni skribas jam en la kongreslibro kaj oni diskutas dum la kongresaj kunvenoj. Kiajn E-revuojn devus protekti ekzemple UEA? – restas la demando malfermita.

Dum la kongresaj kunvenoj estis aŭdigitaj 50 prelegoj, inter kiuj, kiel opiniis multaj gekongresanoj, la plej interesaj estis tiuj de Kalle Kniivilä pri „Konformismo en la Esperanta gazetaro”, Sean O’Riain pri „Esperanto: malamiko aŭ amiko de plurlingveco”, Aleksandr Korĵenkov pri „Zamenhof kaj la gazetaro”, Andreas Künzli pri „Senpagaj novaĝ-gazetoj por labor-pendolantoj”, Tomasz Chmielik pri „Edmond Privat (1889–1962) – la patro de la moderna esperantista ĵurnalismo” kaj pri „Ryszard Kapuściński – la fama pola ĵurnalista” kaj Alfred Schubert pri „La estonteco de esperantlingvaj gazetoj”.

La plej grandan intereson elvokis tamen Giorgio Silfer per sia prelego: „Kiel funkcias la cenzuro en la Esperanto-gazetaro?”. Kvankam ni ricevis la rajton publikigi la tekston de lia prelego, pro teknikaj kialoj (malbona kvalito de la registraĵo) tio fariĝis bedaŭrinde nebla. La alian, interesan prelegon (nome de Kalle Kniivilä pri konformismo en la E-gazetaro) ni publikigas apude.

Dum la Kongreso, sur la gastama Vilna tero, renkontiĝis: Giorgio Silfer kaj liaj gekolegoj el Esperanto-Civito kun Barbara Pietrzak, ĝenerala sekretario de UEA, kaj ŝiaj gekolegoj. Ĉu ĉi tiu renkontiĝo estos nomita historia – certe montros la venonta tempo, ni tamen bone memoras du konatajn eldiraĵojn:

la komunistan – *Kiu ne estas kune kun ni, tiu estas kontraŭ ni!* – kaj la popolan: *Konkordo konstruas, kaj malkonkordo detruas.*

Dum la Kongreso oni elektis la estraron de TEĴA. La nova TEĴA-prezidanto estas populara litova televid-ĵurnalisto Audrys Antanaitis. Liaj kunestraranoj iĝis: Mariana Evlogieva (BG), Kalle Kniivilä (SU), Aleksandr Korĵenkov (RU), Dieter Rooke (CH) kaj Vytautas Šilas (LT). Krom reaktiviĝo de TEĴA – la ĝisnuna faka organizaĵo de UEA, ili promesis starigi kontaktojn kun Internacia Ĵurnalista Asocio. Kaj eble pli bone por TEĴA estus membriĝi en tiu monda asocio?

Plaĉis al ni Vilno, ekplaĉis al ni la grandanima gastamo de litovanoj – la organiza stabo de Litova Esperanto-Asocio sub la perfekta gvido de Povilas Jegorovas kaj surprizis la serioza amikeco por gekongresanoj flanke de la ŝtatestroj de Litova Respubliko.

La kuranta n-ro de *SPEGULO* alportas al la legantoj ankaŭ tre interesajn erojn pri la Esperanto-Movado en iama Sovetio, pri ĝiaj historiaj kaj politikaj cirkonstancoj. Ĝi – en formo de intervjuo kun du konataj rusaj esperantistoj: Boris Kolker kaj Anatolij Gonĉarov – malfermas la ciklon de similaj materialoj pri aliaj eks-orienteŭropaj landoj.

Krome, la problemon de malbono en la postmilita Eŭropo montras Tony Judt el New York University kaj Slovenka Drakulić – kroata ĵurnalistino kaj verkistino. La kajeron kompletigas tre interesa prilaboro de Andreas Künzli pri forpasinta ĉi jare granda rusa verkisto Aleksandr Solĵenicin, kaj de Tomasz S. Chmielik pri la filmo-arto de Krzysztof Kieślowski. Bonan legadon!

scias, nur iluzio. En la enkonduko al la libro estas menciite, ke tia verko povus servi ne nur al la prilaborado de nia historio, sed helpi ankaŭ al la serioza publika propagando de Esperanto kaj de la internacilingva ideo. Mi kredas, ke la svisaj legantoj de la enciklopedio komprenis tiun ideon. En la kerno de la libroprojekto mi ĉiam defendis tiun unuagradan, prioritatan intencon. Ĝia agnosko en 2008 fare de la grava Fondaĵo sub la aŭspicio de Universala Esperanto-Asocio, nobla organizo fondita antaŭ cent jaroj de la svisoj Hector Hodler, Edmond Privat kaj René de Saussure en Ĝenevo, tempe certe ne sekvas hazarde kaj povas esti konsiderata kiel simbola, kaj precedentata.

Mi sincere dankas al la Fondaĵo Antoni Grabowski kaj al ĝia ĵurio, konsistanta el la estimindaj sinjoroj d-ro Ulrich Lins, István Ertl kaj Mine Yositaka, pro ilia bonvolo, kiun samtempe ĝuas kune kun mi ankaŭ la de mi ŝatata koleĝino d-ino Ilona Koutny. Kiel Antoni Grabowski ŝi vivas kaj laboras en Pollando, fakte en ĝia sama iama sektoro germana-prusa, kie loĝis Grabowski. Do ni trovis kaj aludis kelkajn interesajn geografajn, historiajn kaj aliajn koincidojn. La monsumo rezultanta el la premio estu laŭ mia deziro parte reinvestata por la distribuo de la libro al interesataj sciencaj institucioj tra la mondo.

Por ne vekti en tia flata dankparolado la impreson de hipokriteco, ĉar mi konsideras min ankaŭ kiel homon kun tre kritika menso, jen plej lasta persona konsidero, kiu samtempe estas ĝenerala rimarko pri la aktuala situacio de interlingvistiko kaj esperantologio, ekzemple en Svislando: La Fondaĵo

Grabowski agnoskas min kvazaŭ oficiale kiel „interlingviston”. Mi deziras atentigi ke mi, male al aliaj interlingvistoj, kiuj eble trapasis kaj finis iun oficialan studprogramon aŭ kiuj estas interlingvistike multe pli erudiciaj ol mi, aŭ kompare kun Ilona Koutny, kiu estas profesorino pri interlingvistiko en universitato, disponas bedaŭrinde nenium oficialan diplomon, kiu konfirmus mian kompetenton pri tiu fako, kaj la superan ekzamenon de ILEI/UEA mi trapasis antaŭ multaj jaroj. Laŭ universitata kleriĝo mi estas filologo (slavisto), historiisto kaj diplomito pri internacia juro (tria faketo), cetere sen doktora titolo. En tiuj disciplinoj, kiujn mi finis en 1992, mi publikigis nenium (signifajn) artikolojn. Do ne havante la okazon diplomiĝi pri esperantologio aŭ interlingvistiko, kvankam tiu opcio estis konata al mi, mi povas esti nur hobia, amatora, aŭtoidakta aŭ honor(ofic)a interlingvisto, kun la espero, ke tiu fako iam atingos pli grandan signifon, kiun ĝi sendube meritus.

Post kiam KCE/CDELI/SES en Svislando bedaŭrinde ne sukcesis instituciigi esperantologiajn kaj interlingvistikajn studojn sur pli alta publika aŭ ŝtata nivelo, necesus nun entrepreni novajn paŝojn en rektaj kontaktoj kun kantonaj universitatoj. Ne posedante la apogon aŭ konsilon de iu ajn, kaj sentante min pli kaj pli soleca kaj izolita en la esperantologia-interlingvistika kampo en Svislando, mi ne scius kie kaj kiel komenci, kiel siatempe komencis Lappena kaj Grabowski eble tute naive, sed kuraĝe kaj firme. La svisaj esperantistoj bedaŭrinde ne tro interesiĝas pri esperantologio kaj interlingvistiko,

Jungfrau' de Maria Konopnicka, du el miaj ŝatataj polaj verkistoj.

Komence de la 1890^{aj} jaroj Grabowski, kies portreto troviĝas tute komence de la UEA-Jarlibro 2007, malkontentis pro la malrapideco de la disvastiĝo de Esperanto. Supozante ke la kialoj troviĝas en la malperfekteco de la lingvo, li pledis por reformoj en Esperanto. Sed kiam la tikla voĉdono pri lingvaj reformoj okazis en 1894, li voĉdonis, kiel la plimulto, kontraŭ reformoj kaj, konsciante pri la genieco de tiu planlingvo, do helpis savi Esperanton de teoriaj diskutoj, kiuj povus konduki al ĝia disfalo. Konvinkita pri la ĝusteco de la Fundamento de Esperanto, Grabowski senlace daŭrigis sian poresperantan agadon, ankaŭ kiel instruisto kaj organizanto.

Lapenna kaj Grabowski, vivante en diversaj landoj kaj aliaj tempoj, eble similis unu la alian en tio, ke ili estis nekontentaj pri la malrapida disvastiĝo de Esperanto kaj strebis al pli altaj atingoj. Laŭ la zamenhofa moto: *Ni paŝo post paŝo post longa laboro / atingos la celon en gloro*, ili volis supozeble atingi tro multe kaj troiĝis. Laŭ malnova saĝo validas: kiu volas tro kaj troigas, tiu ofte fiaskos. Sed la kontribuoj de ambaŭ, eĉ se nur mikrosocie signifaj, tamen restas „ĉiusence grandaj”, kiel Boulton emfazis en sia poemo pri Lapenna; tio sendube validas ankaŭ por Grabowski. Inter tiuj, kiuj komprenis la signifon de Grabowski, troviĝas ankaŭ Zofia Banet-Fornalowa, kies biografio pri Grabowski konsistigas la unuan seriozan provon prezenti la vivon kaj verkon de la fama pioniro.

En la premiita libro *Svisa Enciklopedio*

Planlingva bedaŭrinde ne eblis trakti la verkon de Antoni Grabowski. Feliĉe lia nomo estas almenaŭ dufoje menciita, pli malpli hazarde, sur la paĝoj 698 kaj 782, lige kun la 2^a Universala Kongreso en Ĝenevo (1906), kie lia himno 'Marŝo de l'Esperantistoj' estis prezentita, kaj en artikolo de la svisa planlingvano André Schild, kiu el vidpunkto de Interlingua traktis la demandon de la Internacia Lingvo. La mencio de Grabowski ĉe Schild pruvas, ke tiu pola Esperanto-pioniro estis respektata ankaŭ de la 'konkurantoj' de la zamenhofa lingvo.

La ĵurio de la Fondaĵo Antoni Grabowski pravigis sian decidon, ke „la riĉa enhavo de tiu ĉi unika verko pri la planlingva movado de unu lando estas modela pro siaj scienca kompetenteco kaj objektiveco”. Mi tre ĝojas pro tiuj konkludo kaj laŭdo, kiuj estis faritaj en simila senco ankaŭ en pluraj jam aperintaj recenzoj. Mi konsentas kun la opinio de la ĵurio, ke temas pri unika verko, kaj unika okazo. Mi deziras interpreti, ke la premio estas aljuĝata ne al mi persone, sed al la verko mem, kiun mi havis la okazon efektiviĝi, kune kun ĝiaj apogantoj, subvenciantoj kaj eldonistoj, nome Svisa Esperanto-Societo (SES), Centro de dokumentado kaj studo pri la lingvo internacia (CDELI) kaj privataj sponsoroj.

Kvankam tia ampleksa kaj multfaceta verko kiel la svisa enciklopedio ne estas kaj ne povas esti perfekta, gravas, ke niaj historiografiaj kaj biografiaj entreprenoj estu science faritaj. Kaj se ni ne kapablas en ĉiuj kazoj esti sciencaj, ni klopodu almenaŭ esti ekzaktaj aŭ precizaj kaj objektivaj, kvankam ankaŭ tiu idealo estas aŭ povas esti, kiel ni ĉiuj

Kalle Kniivilä (FI)

Koformismo en la Esperanta gazetaro

Prelego aŭdigita dum la Tutmonda Kongreso de Esperantistoj-Ĵurnalistoj en Vilno la 29^{an} de majo 2008.

Esperantistoj ofte konceptas sin ĝuste kiel istojn, anojn de ia movado kun komuna celo, kaj kun komuna ideologio, la esperantismo. Aparte klare tiun asertatan komunan ideologion spegulas la Esperanta gazetaro, aŭ almenaŭ grandaj partoj de ĝi.

Unu el la ĉefaj trajtoj de la Esperanta gazetaro tial estas la tendenco konformiĝi al la reganta movada idearo kaj la tradiciaj formoj kaj ceremonioj de la esperantisma aktivado.

El certa perspektivo tiu konformisma tendenco estas ne nur komprenebla, sed ankaŭ aprobinda. Se oni konsideras la legantojn de la Esperantaj gazetoj unuavice anoj de socia movado, grava kaj eble eĉ unuavica tasko de la gazetaro estas garantii la pluekziston de la movado, subteni la entuziasmon de la movadanoj kaj gardi relativan unuecon en la vicoj de la movado. En strebado al tiaj celoj, kritika raportado pri negativaj fenomenoj kaj konfliktoj ofte ne estas prioritata tasko.

Tamen, eĉ el la vidpunkto de ia supozata unueca esperantista movado, troa konformismo povas iĝi problemo, ĉar se problemoj kaj konfliktoj estas daŭre balaataj sub la tapiŝon kaj skelotoj kaŝitaj en ŝrankoj de la Centra Oficejo, iam la situacio en la domo iĝos neeltenebla.

Se oni konsideras, ke Esperantujo tute ne estas unu monoliteca movado kun klaraj celoj, sed male konsistas el tre diversaj homoj kaj tendencoj, des pli oni bezonas multflankan kaj laŭeble objektivan raportadon.

Sed kio do estas tiu objektiveco, ĉu ĝi entute ekzistas, kaj se jes, kiel eblas ĝin atingi, ĉu en la esperantlingva gazetaro, ĉu en alilingva gazetaro, ĉu ie ajn en la mondo?

La Etika kodo de ĵurnalismaj principoj de TEĴA enhavas klarajn indikojn pri tio, kiel laboru ĵurnalista. Tie estas skribite:

1. Respekto al la vero estas la plej alta principo de ĵurnalismo.
2. Publikigotaj informoj, ĉu tekstoj, ĉu fotoj, ĉu filmoj, devas esti zorgeme kontrolataj rilate la veron. Ilian sencon oni devas nek ŝanĝi nek falsi per prezentado, titolo aŭ bild- kaj film-klarigo.

Tio kompreneble sonas bele. Sed efektive neniam eblas rakonti la tutan veron pri io ajn, ĉar kiel ajn ampleksan raportadon oni skribas, ĉiam restas faktoj, kiujn oni simple ne konas, nek povas koni. Neniam eblas scii, kio okazas en la kapoj de aliaj homoj, surbaze de kiuj faktoj aŭ fantazioj tiu aŭ jena persono faris tiun aŭ alian decidon. Ĉiam neeviteble temas pri elekto de faktoj, kiuj laŭ ni estas gravaj, kaj forelekto de fak-

toj, kiuj laŭ ni estas malpli gravaj. Eĉ jam la decido verki aŭ ne verki pri ajna temo per si mem estas subjektiva, ĉar oni jam per tia decido faris bazan takson pri la graveco kaj signifo de la temo.

Do, evidente vera objektiveco aŭ kompleta senpartieco eĉ teorie ne povas ekzisti, kaj estas grave konscii pri tio. La konata usona verkisto kaj ĵurnalisto Norman Mailer iam diris, ke „la eraro en ĉia ĵurnalismo estas, ke la raportisto ŝajnigas sin objektiva, kaj tio estas unu el la plej grandaj mensogoj de ĉiuj tempoj”.

Tio tamen tute ne signifas, ke objektiveco kaj senpartieco ne estas alstrebindaj idealoj. Atingi ilin ne eblas, same kiel ne eblas atingi la polusan stelon, sed la stelo, eĉ se ne verda, montras ĝustan direkton en kiu oni strebadi por ne misiri.

Evidente ĉiu amaskomunikilo ĉiam havas ian referenckadron, aron de valoroj, eĉ se ne ĉiam tiu estas same klare eldirita. Sen tia kadro, ĉu eldirita, ĉu subkomprenita, ne eblas elekti, kio estas grava, rakontinda, kio estas novaĵo, kies opinionon oni demandu.

Foje tiu referenckadro prenas la formon de klara ligo inter la koncerna amaskomunikilo, kaj iu formale difinita socia tendenco aŭ politika partio. En la partia modelo diversaj amaskomunikiloj havas diversajn kadrojn, rigardas la mondon tra diversaj, iom malvastaj fenestroj, el diversaj anguloj. Tia modelo de amaskomunikado, bazita sur partiaj organoj, estas tute kongrua kun demokratia kaj libera socio, se ĉiuj direktiĝoj estas liberaj disvastigi sian mesaĝon en siaj respektivaj amaskomunikiloj.

La situacio kompreneble iĝas tute

alia en unupartia ŝtato, kie opoziciaj partioj ne ekzistas, kaj kie jam anticipe estas decidite, en kiu direkto oni rajtas serĉi la veron. En tia sistemo, kiun ankaŭ Litovio dum preskaŭ duona jarcento spertis, la fenestro tra kiu rajtas rigardi ĵurnalistoj estas tre malvasta, kaj provizita per krado, por ke neniu povu rigardi flanken.

Nuntempe en la plej multaj demokratiaj landoj la grandaj amaskomunikiloj ne plu estas ligitaj al iu politika partio aŭ tendenco, sed provas rigardi la mondon tra pli vasta fenestro kaj konsideri pli da diversaj vidpunktoj. El la praktika vidpunkto tio signifas, ke la leganto ne bezonu iri al diversaj gazetoj por ricevi ĉiujn signifoplenajn vidpunktojn.

Tamen ĉiam ekzistas tiu baza aro de valoroj, kiun ajna amaskomunikilo bezonas kiel sian fundamenton. En moderna demokratio tia referenckadro aŭtomate enhavas ekzemple la memklaran valoron, ke demokratio estas bona afero, ke simplaj homoj povu influi la okazaĵojn kaj decidojn en la socio. El tio sekvas ankaŭ, ke la gazeto kritike esploru la faraĵojn kaj diraĵojn de potenculoj, por helpi al la elektantoj sekvu, ĉu ilia fido ne estas misuzata.

Ion el tio certe strebas esprimi ankaŭ la lasta punkto en la Etika kodo de ĵurnalismaj principoj de TEĴA:

15. Altaj idealoj de ĵurnalismo devas esti pacamo, solidareco kun subpremaĵoj kaj defendo de l' homaj rajtoj agnoskitaj de UN.

„Defendo de homaj rajtoj” ofte estas tikla punkto en la Esperanta ĵurnalismo, ekzemple kiam temas pri kongresado en lando, kie la homaj rajtoj ne estas respektataj, sed cetere oni povas pen-

por mia tiama universitata diplomverko pri la historio de interlingvistiko kaj Esperanto en la Cara Imperio kaj Sove-tunio. Mi do fieras kaj pri la subvencio ‘Ivo Lapenna’ kaj pri la premio ‘Antoni Grabowski’.

Ambaŭ eminentaj nomoj, kaj Lapenna kaj Grabowski, elstaras kun giganta signifo en la Esperanto-movado. La profesia juristo Ivo Lapenna (1909-1987), esperantisto de 1928, celis la oficialan agnoskon de Esperanto ĉe Unesco kaj ties membroŝtatoj. ‘Lia’ triumfa montevidea rezolucio de 1954 formas ĝis hodiaŭ parton de la ‘Esperanto-mistiko’ (kvankam la rezolucio de Sofio estis eble pli signifa). Kiel ajn, la agado de Lapenna estis nomita de Reto Rossetti „herakla laboro”; eĉ Marjorie Boulton ne povis ne verki apoteozan poemon pri Lapenna. Ĝis hodiaŭ Lapenna, kies signifo aliflanke laŭ ies opinioj estis ankaŭ troigita, vige ekzistas en la memoro de multaj esperantistoj.

Nu, mia unuavica tasko ne estas glori Lapennan, kiu sendube kontribuis esence al la fortigo de la postmilita Esperanto-movado. Sed mi volus diri kelkajn omaĝajn vortojn pri Antoni Grabowski. Kvankam eble malpli konata al la nuna generacio de esperantistoj, ĉi tiu antaŭmilita pola Esperanto-pioniro havas sendube similan signifon por la Esperanto-lingvo kiel Lapenna por la postmilita Esperanto-organizo. Fakte ambaŭ *pacaj batalantoj* estis ne nur brilaj organizantoj, sed ankaŭ postlasis signifajn verkojn ofte menciatajn kaj ŝate legatajn ankoraŭ nuntempe. Kaj ili ambaŭ estis elstaraj lingvaj artistoj.

Antoni Grabowski, naskita en 1857 kaj mortinta en 1921, nature ne povis

koni Lapennan, sed Lapenna ja menciis sian bravan antaŭulon multfoje en la monografio ‘Esperanto en perspektivo’. Kiel profesia kemiisto Grabowski kunigis lingvan talenton kun literatura intereso. Li ellernis multajn lingvojn, tiel ke iom post iom li scipovis 15 diversajn. Je tiu fono ne estas mirinde, ke li interesiĝis pri la demando de la internacia planlingvo, kiu en lia epoko fariĝis iom aktuala. Unue Grabowski lernis Volapukon kaj persone konatiĝis kun ties inventinto Schleyer. Sed post konstato, ke apenaŭ eblas praktike interkomunikadi en tiu lingvo, Grabowski seniluziigite forlasis tiun projekton kaj en 1887 faris duan provon kun Esperanto. Grabowski estis forte impresita kaj pri ĉi tiu modele konstruita lingvo, kaj pri la eksterordinara personeco de ĝia kreinto L.L. Zamenhof, kiun li vizitadis en Varsovio. Tio sufiĉis por ke li decidu dediĉi sian propran vivon al la disvastigo de tiu grava projekto. Grabowski apartenis al la fruaj intelektuloj, kiuj komprenis la esprimpotencon de la lingvo Esperanto, kaj per kelkaj brilaj tradukoj li ankaŭ pruvis tiujn geniajn trajtojn de la zamenhofsidiemo. En 1888 aperis lia traduko de ‘La neĝa blovado’ de Puŝkin, kaj en 1889 sekvis la traduko de ‘La gefratoj’ de Goethe, se nomi la unuajn traduk-sukcesojn de Grabowski. Per ‘La parnaso de popoloj’, kiu prezentas 116 poemojn el 30 lingvoj kaj kulturoj, kaj ‘Sinjoro Tadeo’ de Mickiewicz, respektive en 1913 kaj 1918, estis atingitaj la kulminoj de lia literatura maturo. Iom esplorante la verkaron de Grabowski, mi retrovis, ke li elpeligis interalie ankaŭ la poemojn ‘En Svisujo’ de Juliusz Słowacki kaj ‘Sur la

[Hospitalo], 1977), la Grandan Premion de la Tutpollanda Festivalo de Kurtmetraj Filmoj samjare (*Siedem kobiet w różnym wieku* [Sep virinoj diversaĝaj], *Z punktu widzenia nocnego portiera* [El la vidpunkto de nokta gardisto]), la „Arĝentan Sestercon” de la Internacia Filmfestivalo en Nyon kaj la Premion de la Ĵurio de la Internacia Filmfestivalo en Lille (*Z punktu widzenia nocnego portiera*, 1979), la Grandan Premion de la Festivalo de Polaj Fabulfilmoj en Gdansko, la Oran Medalon kaj la Premion de FIPRESCI en la Moskva Internacia Filmfestivalo kaj la Grandan Premion en Kanno, la Eŭropan Filmo-Premion „Felix” por la plej bona filmo de la jaro por *Krótki film o zabijaniu* (Mallonga filmo pri murdado, 1988), la Specialan Premion de la Internacia Filmfestivalo en San Sebastian, la Grandan Premion de la Festivalo de Polaj Fabulfilmoj en Gdansko kaj la Oran Filmobendon de la Asocio de Polaj Filmistoj (*Krótki film o miłości* [Mallonga filmo pri amo], 1988), la „Arĝentan Eŭropan Filmobendon” (*Dekalog* [Dekalogo], 1989), la Premion de la Ekumena Ĵurio de la Internacia Filmfestivalo en Kanno kaj la Premion de la Franca Filmkritiko je la nomo de Georges Méliès (*Trzy kolory: Niebieski* [Tri koloroj: Blua], 1993), la Arĝentan Urson de la Internacia Filmfestivalo en Berlino (*Trzy kolory: Biały* [Tri koloroj: Blua] 1994), nomumon al la Premio „Oscar” por scenaro kaj reĝisorado de la filmo *Trzy kolory: Czerwony* (Tri koloroj: Ruĝa), 1994.

Krzysztof Kieślowski instruadis reĝisoradon kaj scenaro-verkadon en la filmaj atlernejoj de Katowice (1979–1982), Okcidenta Berlino (1984), Helsinko (1988), Svislando (1985, 1988) kaj en Lodo (1994–1996).

Li forpasis en Varsovio, la 13^{an} de marto 1996, post la operacio de la koro.

Danko pro la aljuĝita premio de la Fondaĵo Antoni Grabowski

Tiu 26^a de julio restos memorinda tago, almenaŭ por mi mem. En ĝi koincidis samtempe malĝojo kaj ĝojo. Malĝojo pro la nepartopreno en la rotterdama Universala Kongreso, aliflanke ĝojo pro la aljuĝo de la ĉijara premio de la Fondaĵo Antoni Grabowski al mi persone kiel aŭtoro/redaktoro de la libro *Svisa Enciklopedio Planlingva*, aperinta en 2006. Sendube, ambaŭ sentoj estas tre fortaj.

Ho, mia kor’! Ne batu maltrankvile.

Ĉi tiu premia aljuĝo, pro kiu mi tre ĝojas, fieras kaj sentas min tre honorata, venis por mi tute neatendite. Mi nek konsciis pri tia eventualeco, nek aŭdacis revii pri tia intenco kaj decido flanke de tiu unika kaj bela Fondaĵo. Pro tio, la ĝojo estas despli granda, se feliĉiga mesaĝo alvenas en neatendita momento. Do ĉi tiu aljuĝo estas vera, granda surprizo. Sendepende de la alteco de la monsumo disponigata mi rajtas supozi, ke la premio Grabowski estas komparebla kun unu el la pli gravaj libro-premioj internaciaj aŭ naciaj. Estas tre bone, ke la Esperanto-movado disdonas premiojn. Same neatendite kiel falis la stelo de Grabowski sur min, sekve same neplanite aperis la ideo, ke mi verku, kiel decas en tia momento, konvenan dank-‘paroladon’.

Volonte mi memoras analogan surprizan situacion antaŭ multaj jaroj, komence de la 90^{aj}, kiam la Fondaĵo Ivo Lapenna aljuĝis al mi subvencieton

si, ke tiuj altaj idealoj troviĝas tro fore de la ĉiutaga laboro de esperantlingvaj amaskomunikiloj.

Kiajn pliajn komunajn valorojn oni do povus atendi de esperantlingvaj ĵurnalistoj? Unu nepra elirpunkto por preskaŭ ajna esperantlingva amaskomunikilo estas, ke la kunlaborantoj kaj la legantoj atribuas al Esperanto kiel lingvo ian valoron. Tiu valoro povas esti tre diversa, sed ian valoron Esperanto sendube havas en iliaj okuloj. Alikaze ili ja apenaŭ farus al si la penon verki aŭ legi en Esperanto. La valoro povas esti tute persona, ĝi povas esti sentimentalaj, idealisma aŭ tute praktika, sed ĝi ekzistas.

Tamen, tiun komunan bazan akcepton de Esperanto oni ne transformu en ideologian trudkitelon. En Esperantujo, kiel en ajna malgranda komunumo, ĉirkaŭata de veraj aŭ imagataj malamikoj, ekzistas kelkaj trajtoj de unupartia ŝtato. Tia komunumo facile provas dikti al siaj anoj unusolan ĝustan kaj akcepteblan ideologion, eĉ se nur malgranda parto de la anaro efektive kredas je tiu interna ideo en ĝia ortodoksa formo.

Tiun verdan ideologion oni ofte predikas al la jam konvertitoj, aŭ tiuj, kiuj ĉiukaze estas konsiderataj jam konvertitoj. Oni skribas al la propra publiko tion, pri kio oni volas konvinki la eksterulojn. Oni povas miri, kial? Eble ĉar oni ne fidus, ke la propra publiko estaas sufiĉe konvinkita, firma en sia kredo, same kiel la potenculoj ofte tion suspektas en totalismaj ŝtatoj? Eble ĝuste tial kritikado de internaj problemoj ofte estas konsiderata okupiĝo netaŭga por vera ano de la Esperanta komunumo?

La Esperantaj gazetoj kutimas raportii pri ĉiam novaj sukcesoj, kvazaŭ daŭre

klopodante konvinki la subtenantojn de la tradicia esperantismo, ke pravus nur ili, kaj se eksteruloj ne favore sintenas al Esperanto, tio okazas pro la blindeco de la cetera mondo. Tamen tia unuflanka raportado ne nepre aŭtomate fortigas la entuziasmon de la movado. Ĝi povas tute male forpeli iniciatemajn individuojn kun kritika sinteno kaj konduki al degenero de la movado.

Tia unuokula sinteno al la ĉirkaŭa mondo pensigas pri la funkciado de partia gazetaro en unupartia, totalisma ŝtato: ekzistas unu anticipe difinita vero, pri kiu oni volas konvinki la tutan mondon. Tamen la ĉefan fortostreĉon la konformisma gazetaro faras, klopodante konvinki la propran publikon pri la praveco de la reganta ideologio, kaj ŝirmante ĝin de malicaj kritikoj de eksteruloj.

Esperantujo kompreneble kaj feliĉe ne estas totalisma ŝtato, sed en la esperantlingvaj amaskomunikiloj tro ofte evidentas la tendenco al konformismo, anstataŭ multflanka prilumigo de movadaj evoluoj kaj strebado al objektiveco.

Pri la grava mobiliza rolo de la Esperantaj gazetoj bone konsciis jam Zamenhof en la jaro 1890, kiam li skribis:

Antaŭ ĉio ni devas plene certigi la estontecon kaj la senhaltan regulan eliradon de nia centra gazeto. Ĝi estas la unuiganto, la pelanto kaj la regulatoro de nia afero, per unu vorto – ĝi estas la koro de nia afero.

Tamen, ne nur por laŭeble plena kaj fidinda informiĝo, sed ankaŭ por la mobilizo de la movado kaj por la koherigo de la Esperanta komunumo ni bezonas liberan kaj multflankan raportadon pri



El la historio de la Esperanto-movado:

„Kio ne estas malpermesita, tio estas permesita”
– Sovetia Esperanto-movado en kvazaŭsekreta misio

Rememora–anekdota intervjuo–konversacio kun Boris Kolker kaj Anatolo Gončarov, preparita de Andreas Künzli.

Vere ĉirkaŭ la ruslanda kaj sovetia Esperanto-movado cirkulas mitoj kaj legendoj. Neniu krom tiuj, kiuj senpere fondis, konstruis, gvidis kaj organizis ĝin, ĉefe ties SEJM-periodon en la 1960–70^{aj} jaroj, konas pli bone la aferojn. Alvenis la tempo rememori pri tiu temo, pri fenomeno historie signifa kaj sociologie interesa por la E-movado. Du ĉefaktivuloj de SEJM, Boris Kolker (*1939)¹ kaj Anatolo Gončarov (*1940)², povas libere rakonti multajn interesajn detalojn.

SPEGULO-kunlaboranto Andreas Künzli profitis la okazon starigi al ili konkre-



okazaĵoj en la Esperanta mondo.

Konstrue kritika sinteno al potenculoj kaj decidantoj ne nur ekster la Esperanta mondo, sed ankaŭ ene de ĝi, devus esti unu el la fundamentaj ŝtonoj en la konstruado de serioza esperantlingva ĵurnalismo. Konformisma raportado, kiu rigardas la mondon tra unusola malvasta fenestro, povas konduki nur al komunumo fondita sur sintrompo.

tajn demandojn (kursiva parto) kun la peto kiel eble plej detale respondi ilin. Dum Kolker, emerita doktoro pri lingvoscienco kaj esperantisto de 1957, vivas hodiaŭ en Cleveland (Usono), Gončarov, emerita doktoro pri kemio kaj esperantisto de 1958, loĝas en Krasnojarsko, Siberio, Ruslando. Ambaŭ respondis al la demandoj sen koni la respondojn de la alia. La sekva intervjuo, kiu estas farita en junio 2008 retmesaĝe en konfidenceco kaj malklaĉemo sen prisilenti esencajn problemojn, kun siaj ĉarmaj anekdotoj donas pli klaran bildon pri la cirkonstancoj, problemoj, limigoj, absurdaĵoj kaj paradoksoj, sed ankaŭ pri la liberaj spacoj kaj belaj momentoj kaj ĉefe pri la unika etoso ĉe la tiamaj sovetiaj esperantistoj de la 60–70^{aj} jaroj. Krome estos tuŝata la tikla demando de la KŜS-kunlaboro kaj la delikata problemoj de la denuncado. El komence ne tro longa intervjuo estiĝis poste sufiĉe longa interdiskutado, kun aldonado de materialoj el la riĉinformaj libroj de Cibulevskij, Bronŝtejn kaj Samodaj, en kiu la intervjuinto volis trovi pli profundajn pensojn kaj konsiderajn nuancojn pri tio kaj jeno, tio kaj alia. Krom tio, la intervjuinto, kiu en 1988–89 mem restadis en Sovetunio kiel ‘interŝanĝ-studento’ kaj ĉe kiu la intereso pri la historio de la sovetia Eo-movado neniam estingiĝis, permesis al si aldoni ankaŭ kelkajn per-

mesos tion al ni? Kiom multe da bono ni povas alporti en la mondon ĉirkaŭ ni? Kio estas bono? Sentemo? Beleco? Savo? Animo? Malbono? Ĉu ni kapablas distingi inter ĉi tiuj kategorioj kaj respondi la prezentitajn demandojn? Kaj eble ni jam ne povas konstati, kion signifas ĉi tiuj vortoj? Tiom multe da demandoj, tiom malmulte da respondoj. Sed estas certe: Krzysztof Kieślowski iĝis majstro, konanto de homa naturo. Omaĝe al tiu granda reĝisoro kaj kun espero rigardante la okazontan, mi ellasas larmon kiel la juĝisto en la lasta filmo-sceno. Tamen mi ne povas konvinke respondi, ĉu ĝi estas la larmo de feliĉo aŭ espero-manko. Finiĝas la sonĝo de kloŝardo.

„... kiam mi pensas pri moderna kino, pli kaj pli ofte antaŭ miaj okuloj aperas tombejo. Tomboj kaj kelke da klinitaj maljunaj, malcertaj viroj kun atentaj movoj, kaj apude la aŭtovojo, plena je hastantaj aŭtomobiloj, teknike perfektaj, sed similaj kiel akvogutoj...”

Krzysztof Kieślowski naskiĝis la 27^{an} de junio 1941 en Varsovio. La patro, Roman, estis inĝeniero, kaj la patrino, Barbara – oficistino. La malgranda Krzysztof fojfoje ŝanĝis infanaĝe restadlokojn kaj lernejojn. Tio estis ligita kun la malsano (tuberkulozo) de la patro, kiu devis ofte sanĝi kuraĉlokojn (li mortis en 1957). En la jaroj 1957–1962 li estis lernanto de la Ŝtata Liceo de Teatra Tekniko en Varsovio. Tiu-tempe komenciĝis liaj raviĝoj kaj entuziasmo pri teatro, do sekvis la decido studi teatran reĝisoradon. Ĉar oni akceptadis tie nur tiujn, kiuj finis aliajn studojn, li elektis filman reĝisoradon. Interese, ke li trapasis la akceptan ekzamenon nur por la tria fojo. En la jaroj 1964–1968 li studadis

reĝisoradon en la Ŝtata Teatra kaj Filma Altlernejo en Lodzo. En 1970 li diplomiĝis kiel magistro de arto, kun tre bona noto. Li ricevis ĝin por sia teoria laboraĵo *Film dokumentalny a rzeczywistość* (Dokumentala filmo kaj realo), kiun li skribis sub la gvido de profesoro Jerzy Bossak kaj por du filmoj – *Zdjęcie* (Foto) kaj *Z miasta Łodzi* (El la urbo Lodzo), kiujn li pretigis kun helpo de fama dokumentisto Kazimierz Karabasz.

La filmo *Z miasta Łodzi* estis la unua profesia verko de Kieślowski, realigita en Wytwórnia Filmów Dokumentalnych (Produktejo de Dokumentaj Filmoj) en Varsovio, kie li estis laboranta de 1969 ĝis 1983. De 1974 ĝis la morto li estis membro de la Filmogrupo „Tor” (ek de 1989 – Filmstudio „Tor”), kiun gvidis Stanisław Różewicz, kaj post 1979 – Krzysztof Zanussi). En „Tor” li debutis en 1975 per la fabula televidfilmo *Personel* (Personaro), kaj en 1976 per la longmetra *Blizna* (Cikatro). Li kunlaboris ankaŭ kun Telewizja Polska (Pola Televido), realigante dokumentojn kaj teatrajn spektaklojn (*Dwoje na huśtawce* [Duopo sur la baskulo] de W. Gibson, 1997; *Kartoteka* [Kartoteko] de T. Różewicz, 1979). En 1978 Kieślowski debutis kiel aŭtoro kaj samtempe teatra reĝisoro – en la krakova Teatr Stary (Malnova Teatro) li prezentis sian teatraĵon *Życiorys* (Biografio) laŭ la pli frua dokumentala filmo. De 1971 li aliĝis al Stowarzyszenie Filmowców Polskich (Asocio de Polaj Filmistoj), kaj en la jaroj 1978–1981 li estis ĝia vicprezidanto.

Por siaj filmoj Krzysztof Kieślowski ricevis multajn premiojn kaj distingojn: la Grandan Premion de la Tutpollanda Festivalo de Kurtmetraj Filmoj en Krakovo (*Pierwsza miłość* [La unua amo], 1974), la Brunan Lajkonikon en la sama festivalo (*Życiorys* [Biografio], 1975), la Grandan Premion de la Internacia Filmfestivalo en Mannheim kaj la Ĉefan Premion de la Festivalo de Polaj Fabulfilmoj en Gdanŝko (*Personel* [Personaro], 1975), la Grandan Premion de la Internacia Festivalo de Kurtmetraj Filmoj en Krakovo (*Szpital*

tion – sufiĉos la vizaĝo de la juĝisto en la fenestro kun rompita vitro.

Oni povus demandi nun – pri kio vere rakontas ĉi tiu filmo? Laŭ mia opinio – ĝi estas filmo pri ideala amo. Pri la personoj, kiuj serĉadas kunulon spite al ĉio. Kiam komenciĝas *Ruĝa*, ĉiuj protagonistoj estas en amo-ligoj: Valentine kun Michael, Auguste – kun blonda anoncistino de veterprognozo, la juĝisto kun blondulino el la pasinta tempo. Laŭ okazontaj eventoj sekvas disiĝoj. Valentine ekdubas pri la amo inter ŝi kaj Michael, kiu havigas nenion al ilia kuneco, kaj lia malsanema ĵaluzo nur detruas ĉion. Auguste vidas kokron de sia amatino, kaj la juĝisto iom post iom vekigigas el la letargio de rememoroj. Ekestas novaj emociaj ligoj. Inter Valentine kaj la juĝisto. Tamen sekskuniĝo en ilia situacio (ŝi – juna, li – maljuna) ne eblas. Prefere estas granda amo, oni povus diri – ideala. Tio estas amo inter la animoj, komuna lingvo de la koroj, naskanta la plej profundan komprenon. Estas ĝuste tiu ĉi triumfo de la idealismo, kiu venkas la militon samtempe devigante cinikon al malapero. Jen konfirmo de la fakto, ke ekster feromonoj, ekster la pura fizikeco, oni trovas la spiritan vivon, kiu ne bezonas amorem. La sfero de *sacrum*, kiu daŭras de la komenco de nia historio kaj kvankam ĝi cedas nun, do ĝi kapablas penetri la homan vivon per radio de espero. Ĝuste tion instruas al ni la historio pri la juĝisto: Esperon. Mi skribas majuskle, ĉar ĝi estas Espero por la lasta celo, kaj ne ordinara espero, akompananta nin ĉiutage en aferoj banalaj kaj malgravaj. Ĝi estas ankaŭ Espero por rompi la eraran rondon, en

kiu turniĝas aliaj personoj. Ĉar Auguste estas sama kiel la juĝisto kaj ĉio, kio okazas al li dumvoje (fontplumo de amatino, vidita kokro, malŝargiĝo de akumulatoro), ripetiĝas precize kiel en la vivo de tiu maljuna homo. Tamen la fino estas alia – optimisma. Kiel dolĉa hundido de espero, kiel la oka infano de la graveda hundino de l' juĝisto. Plej atendata kaj plej grava.

Tamen ironia estas la fakto, ke *happy end* bezonas katastrofon. Ĉar la geamantoj kuniĝas nur sur la pramo dro-nanta en Maniko. Krom ili estos savitaj ankaŭ protagonistoj el la antaŭaj partoj de *Triptiko*. Ni klopodu tamen analizi pli profunde la sencon de ĉi tiu mesaĝo. Laŭ mia opinio ĝi estas ligita kun la sanga historio de la Franca Revolucio. Ĝi prezentas la kaoson, el kiu eliĝas ordo. Ankaŭ la averton por la homaro – ke por ĝia progreso necesas katastrofoj. Gasĉambroj, la milito en Afganio, malsato en landoj de la Tria Mondo. Ĉiuj ĉi eventoj estas akcepteblaj kiel individuaj kaj kaosaj. Tamen oni povas kunigi ilin en pli ampleksan tuton kaj vidi en ĉio la punan fingron de la Eternulo. Probable ili estas nepra substrato por la amo kaj toleremo, serĉataj de ni. Probable ĉiuj teruraj militoj dum jarcentoj vere servis por eligi la homecon al taga lumo? Io vera malkaŝiĝas en la fakto, ke la plej kruelega besteco kaj la plej granda sindonemo naskiĝas ĉe homoj ĝuste en la ekstremaj situacioj. Atestojn pri tio havigas al ni la historio, kaj ankaŭ informaj raportoj, kiujn ni televidas ĉiutage. Restas nur la demando, ĉu ni – kiel homaro – kapablas plene kompreni ĉi procezon? Ĉu la globaligo, kiu forprenas sencon de ĉiutagaj agadoj, per-

sonajn frazojn de memoro (kursiva parto de la teksto). Do pro tiu 'artefarita' longigo de la intervjuo, kiu preskaŭ fariĝis studo pritema, eble ne ĉiuj diskutitaj eroj restas prikomentitaj kaj finresponditaj, sed tio ne gravas kaj tio ne estis celita. La intenco estis aludi kiel eble plej multajn temojn. La plenajn nomojn de uzataj mallongigoj oni trovas fine de la intervjuo.

Enkonduko

Post la likvido de la sovetia Eo-movado en la jaroj 1937–38, en kiu pereis la grupo de aktivuloj ĉirkaŭ Ernest Drenzen, ekestis vakuo ĝis la jaroj 1954–56, kiam en Sovetunio denove eblis okupiĝi pri Esperanto. Ni memorigu, ke en februaro 1956 la legendeca partiestro Nikita Ĥruŝĉov malkaŝis kaj kritikis en sensacia kvinhora sekreta parolado okaze de la XX Partia Kongreso la potenc-misuzadon kaj la personkulton de Stalino kaj la fifarojn de liaj lakeoj. La ĝis tiam publike nekonata vero ŝokis almenaŭ 18 milionojn da membroj de la sovetia KP, kiuj ricevis la okazon legi la esencajn partojn de la kritiko. Tre baldaŭ (parto de) la teksto trafis, tra Pollando kaj la sekretaj servoj de Israelo kaj Usono, ankaŭ al Okcidento. Ĝia plena versio tamen povis esti publikigita en Sovetunio nur en 1989 (cetere same kiel la verko 'Arkipelago GULag' de Solĵenicin). Esperantistoj ĉirkaŭ Evgenij Bokarjov, David Armand, Semjon Podkaminer, Aleksej Verŝinin, Konstantin Gusev kaj aliaj, kiuj postvivis la stalini-sman teroron, singarde sed kuraĝe re-iniciatis la Eo-movadon en Sovetunio, precipe sur la kampoj de scienca kaj soveti-propaganda niveloj. Esence helpis tion la Baltaj Eo-Tendaroj, organizitaj

vice de la ĉebaltiaj respublikoj, ĉar la sovetian teroron kontraŭ la e-istoj en la jaroj 1936–38 tiuj respublikoj feliĉe ne trafis, estinte tiam sendependaj. Pri tutlanda organizita Eo-movado oni eĉ ne povis revii, kaj ankaŭ la postmilita periodo alportis multajn obstaklojn kaj limigojn por la sovetia Eo-agado. Tamen, en 1962 povis esti starigita ĉe SSOD Eo-Komisiono pri koordinado de internaciaj kontaktoj de sovetiaj e-istoj. Kaj ekde 1965/66 komencis koordinite agadi kelkaj novgeneraciaj junuloj-esperantistoj kadre de Sovetia Esperantista Junulara Movado (SEJM). La sugeston por tiu iniciato evidente donis – eble iom paradokse – okcidentano. Nome du jarojn antaŭe dum la 49^a Universala Kongreso de Esperanto en Hago la tiama prezidanto de TEJO Humphrey Tonkin proponis al Anatolo Gonĉarov pripensi la ideon krei junularan organizaĵon de esperantistoj en Sovetunio. Ĉar krei tian organizaĵon oficiale estis neeble kaj krei ĝin neoficiale estis danĝere, Anatolo Gonĉarov eltrovis nomi la organizaĵon tiel, ke ĝi ne aspektu kiel organizaĵo. Vintre de la jaroj 1964–65 Anatolo sendis al 12 konataj al li junaj geesperantistoj alvokon krei organizitan junularan movadon. Lian ideon subtenis 9 personoj kun kiuj Anatolo aktive kolektis aliajn junajn e-istojn tra la tuta Sovetunio. Tiuj reeĥintoj siavice konigis aliajn konatajn al ili junajn e-istojn, kaj tute baldaŭ Anatolo dissendis jam al 17 adresoj la Adresaron kun 17 nomoj, proponante nomi la organizaĵon 'Adresaro de junaj Esperanto-aktivuloj'. Tiel estis evitita la danĝero aspekti kiel neoficiala organizaĵo. Tuj poste Anatolo lanĉis la informilon 'Juna

Esperantisto', kiun li multobligis sur cigareda papero, mem kompilante ĝin plej ofte el leteroj venantaj al li kiel al la centro. Aliaj gravaj nomoj de la unua periodo de SEJM estis krom Kolker kaj Gonĉarov, kiu estas konsiderata kiel la patro de SEJM kaj dum longa tempo ĝia ĉefa motoro, ankaŭ Leo Kazancev, Vladimir Samodaj, Aleksandr Jauŝkin, Miĥail Ŝevĉenko, Efim Zajdman, Marija Vaŝĉinina, Vladimir Bespalov, Dmitrij Ci-blevskij kaj aliaj.

La etoso de SEJM estis priskribita kiel amikeca, neformala kaj gaja. Por la koncernatoj, SEJM iĝis bela vivepizodo, romantika legendo, ĉar ĝiaj aktivuloj sentis sin tiam junaj kaj liberaj, plenaj de optimismo kaj energio kaj ne tro atentis la grizecon de la vivo, kiu tiam kovris la tutan landon. Lige kun la kreiĝo de la oficiala Asocio de Sovietiaj Esperantistoj (ASE), en marto 1979, SEJM malfondiĝis, sed ĝia neformala agado iomgrade daŭris pliajn tri jarojn.

ESPERANTO EN RUSLANDO

Andreas Künzli: Kial ruslandanoj/sovetianoj laŭ vi interesiĝas kaj okupiĝas pri Esperanto (bela hobbio, ideologio, kontaktoj, alia kialo)?

Boris Kolker: Unuavice ĉar estis sento de libereco, eblo manifesti sian personecon kaj okazoj havi senlimajn kontaktojn kun la tuta mondo.

Anatolo Gonĉarov: Al Eo-rondetoj venis junularo interesiĝanta pri ĉio ajn ekzotika kaj nekutima. Subite rapide ekposedinte la parol-kapablon, ili restis en Eo-kluboj, en kiuj ili partoprenis la interesan kaj vigan kluban vivon, formiĝis amikecoj longdaŭraj, ktp.

Kiuj estis la ĉefaj avantaĝoj, kiujn Eo donis dum la sovetia tempo?

Kolker: Partopreno en la intereseĝaj kaj neformalaj Eo-tendaroj, internacia korespondado, verkado.

Gonĉarov: Interesavivo en alialingvo; vera demokratio en la kluba kaj tendara vivo (kontraste al la teda superrego de la partiaj cirkuleroj reglamentantaj ĉiun spiron); ekhavi (almenaŭ korespond-) amikon en alia lando; libere legi alilandajn Eo-librojn kaj revuojn (ekzemple la legado de 'Literatura Foiro' estis speco de kulturŝoko por sovetianoj); turismi, ĉiusomere partopreni en SEJT en alia pitoreska loko; post kelkaj jaroj da partopreno jam forta amikeco kun aliaj e-istoj, kio sekvigis kunlaboron solvi iujn vivproblemojn. Do ĉar en Sovietunio la junularo enuis dum pluhora pasiva sidado en oficialaj aĝulaj klubkunvenoj, ĝi serĉis bruon, kantojn kaj dancojn, moviĝon. Tiuj deziroj rekte helpis la ekeston de tendaroj. Do la junularo volis kaj devis klubi tute aparte de tiuj tedaj aĝulaj klubkunvenoj.

NEK MALPERMESATA, NEK DEZIRATA

Kiuj estis la ĝeneralaj kondiĉoj por Esperanto en la 1960-70^{aj} jaroj en Sovietunio?

Gonĉarov: Esperanto ne estis malpermesata, sed ankaŭ ne oficiale dezirata. La korespondado kun eksterlando estis kontrolata de KŜS (Komitato de Ŝtata Sekureco). Kiam la korespondado grandiĝis (samtempe kun la kreskado de SEJM), KŜS aplikis tian taktikon: kolekti informojn pri la ekkorespondanto. Se tiu diras ion ajn kontraŭsovietian,

senco de tiuj ĉi terminoj prezentiĝas nur en konkreta socia aferaĵo? Kieŝlowski tuŝas eksterordinare gravajn problemojn. Li detruas nian idealan mondovizion per subtilaj tiroj de sia artista peniko – per malvigla dialogo inter du protagonistoj. Per la dialogo, kiu penetras la sferon de *sacrum* kaj frakasas niajn imagojn per diversaj konsideroj. La juĝisto dubigas ekziston de altruismo – fine Valentine ne diros al la amanta edzino la veron pri la viro, kun kiu ŝi vivas. Ĉu ŝi faras tion por ŝi aŭ por trankviligi la propran konsciencon? La juĝisto malkovras antaŭ Valentine la veron pri akiraĵoj de la Franca Revolucio – la demokrata mondo estas putranta, kaj mensogoj, aĉa konduto kaj duobla moralo nur esprimas ĉi putradon. Idealismo kaj hipokriteco, juneco kaj sperto militas inter si, kaj triumfas cinikeco. Tamen en la filmo de Kieŝlowski ĝi venkas batalojn, sed malvenkas la tutan militon.

Valentine estas ŝlosilo por la homeco de la maljunulo. Ŝi vekas en li de longe kaŝatajn emociojn, kiujn tiel zorgeme li klopodis sufoki. Ĉi tie Kieŝlowski denove amuziĝas pri simboloj – la hundino de la juĝisto naskos idojn. Estas preskaŭ ideala koncepto. Meti la simbolon de renaskiĝo, espero kaj naturo-venko en tian pesimisman momenton de la filmo. Estas kvazaŭ forsalto de la malvastega kaj sufoka etoso de la morala falo kaj kvazaŭ riverenco al pli bona morgaŭo. Okazas tiel, ke la juĝisto mem denuncas sin, lia studio por kaŝa aŭskultado estos likvidita kaj malaperos la membrano disiganta songojn de la realo. Sed ankaŭ ĉi tie prezentiĝos relativismo. Fine el la

malbono, kiu estis penetrado en fremdajn vivojn, sekvas bono – estos kapita vendanto de narkotaĵoj. Kaj nova konsidero, al kiu nin devigas *Ruĝa* – ĉu el malbono povas sekvi bono? Kaj eble bono kaj malbono ne ekzistas? Estas nur certe, ke post ĉiu ago sekvas reago. Kieŝlowski lasas al spektanto, ke li mem taksu, ĉu la decido estis prava. Tamen li spronas nian atenton per nova simbolo – kolerega najbaro rompas per ŝtono vitron en la fenestro de la juĝisto. Sendube estas unu el tiuj, kiuj trompas, mensogas kaj vivas la duoblan vivon. Bedaŭrinde tio ne ĝenas lin, ke li prijuĝu aliajn. Ĉe li estas morala pravo – li punas la malindan konduton, kaj la fizika esprimo de ribelo estas ĝuste tiu rompita fenestrovitro (mirinda prezento de malfirmeco inter la realo kaj songoj). Sed ĉu juĝante aliajn li mem restas senkulpa? Kiu donas al li la moralan rajton pri juĝado? Parafrazante: kiu estas senkulpa, tiu ĵetu ŝtonon kiel la unua. Ĉi vortoj pendas super la tuta sceno kvazaŭ vizio pri la baldaŭa pereco. Tamen vokas neniu. La strato estas malplena, kaj tiu, kiu volis juĝi, kaŝiĝis antaŭ la kaptema okulo de la filmilo. Ĉu tio signifas, ke li estas ordinara poltrono? Certe ne – poltrono ne ĵetas ŝtonon kaj nur malamas kaŝe. Tiu ŝtono estas akto de kuraĝo, al kiu devigis sin nemultaj. Tamen li scias, ke li estas pekema kaj li klopodas tion kaŝi antaŭ si. Antaŭ la momento de orgojlo, kiu puŝis lin al tiel radikala esprimo de la propra opinio. De la orgojlo, kiu lasis, ke li rolu kiel ekzekutisto. *Ne juĝu, ĉar vi estos juĝitaj* – kiel litanio aŭdiĝas en lia kapo, kaj li forkuras ekster la filmo-kadron. Sed li ne estas bezonata, por konstati

kadroj sian personan malcerton. („Mi pensas, ke mi amas vin”, li konfesas singarde per telefono). Ni devus trakti ĉi tiujn scenojn kiel ian averton, kian donas al ni la futurisma vizio de Krzysztof Kieślowski, tiel evidenta kaj aktuala en la epoko de poŝtelefonoj. Tio devus pensigi nin, ke novaj telekomunikaj inventoj ne nur plibonigas la mondon, sed ankaŭ ŝanĝas interhomajn rilatojn. Ĉar la idealismaj vizioj de Paul Levinson povas ne elteni la tempo-provon, kaj modernaj teknologioj ŝanĝos la socian dialogon al la sensignifaj vortoj „mi amas vin”, liberaj de ajna kunteksto, kiujn oni aŭdiĝas dum varmega nokto en Rio-de-Ĵaneiro al iu, kiu restadas ĉe la alia flanko de la terglobo. Kun teknologia progreso ni perdas grandan parton de la homeco, kaj malaperante ĝi senigas la mondon je signifoj, kaj la amon klarigas per efiko de feromonoj.

Kun ia hazardeco ni observas la vivon de Valentine. Frapante per aŭtomobilo hundinon, ŝi ekkonas ĝian posedanton – juĝiston – por kiu la besto tute ne gravas. Li estas homo amariĝinta, rompita de la vivo, ŝajne plena je malestimo por la mondo, sensenta kaj malproksima de la aktualaĵoj, sed observanta ĉion kaŝe, kun perversa scivolemo. Li ne prezentas arketipon de la Demiurgo, sed ĝuste de la falinta anĝelo, kiu avidas scion pri la propra malfeliĉo. La juĝisto dronas en la profunda emocia letargio, en kiun li mem pelis sin antaŭ jaroj. Ĉar la ideala amo al belega blondulino perdis sian ardon en la griza ĉiutaga vivo kaj ne eltenis romantikajn esperojn, ligitajn kun ĝi. Kokro forigis ĉiajn valorojn el la mondo de la juĝisto, kaj lin ĝi ŝanĝis al kloŝardo premata de sonĝoj.

Sonĝoj plenaj de voĉoj, atingantaj lin tra membrano de la iluzio, kiun formas la realo. Tiujn voĉojn elsendas radio agordita laŭ ĝustaj frekvencoj (denove la teknologio detruanta la limojn de libereco, fiksitaĵojn per la Deklaracio de Homaj kaj Civitanaj Rajtoj) kaj ili ŝajnas tute hazardaj. Dialogo inter du gejoj, konfesoj de ama paro, ĉiutagaj interparoloj sen profunda senco. Disaj bildoj, kuniĝantaj en kakofonio de la sonoj, kiuj aŭdiĝas sur ĉiu strato de grandurbo. Atrorfio de signifoj kaj simboloj, ne-realaj koŝmaroj, atingantaj la konscion. Simboloj sen signifo.

Tamen la juĝisto estas – kiel dirite – falinta anĝelo, bastardo forpelita de l' Demiurgo kaj serĉanta veron. Li faras ankaŭ miraklon – per informoj elŝiritaj el kunteksto li konstruas ordigitan kaj logikan mondobildon. Kvankam li ne donas respondon al la demandoj pri la signifo de tiaj vortoj, kiel bono, malbono aŭ vero, li ankaŭ ne kontestas interpretojn pri tio. Li estas *alter ego* de la rakontanto – li montras al ni la vojon, kiun ni devus sekvi por la propra konsidero. Li estas ankaŭ intelekta bacilo, detruanta la idealismon de Valentine, kiu dezirante sciigi kaŝe aŭskultatan gejon pri la malnobleco de la juĝisto implikiĝas en grizon kaj malpuron de la civilizita mondo. Ĉar kion ŝi povas fari, kiam la gejo interparolanta pasie kun sia amato montriĝis sentema edzo kaj patro de la ĉarma filino (kiu kaŝe aŭskultas liajn telefonajn interparolojn – ĉu la sekva simbolo de la duobla moralo)? Kio en tia situacio estas bono kaj malbono? Malnobleco kaj honesteco? Ĉu taŭgas ĉi tie iu ajn enciklopedia difino de bono? Ĉu ne okazas tiel, ke la

do lia korespondo estis bremsata, se li nenion kontraŭan diradis, sufiĉis eĉ nur sporade kontroladi lian korespondadon. Mi tion konkludis per tio: Mi ŝanĝis mian adreson dufoje, kaj en ambaŭ fojoj en komencaj monatoj mi ne povis ricevi respondojn el eksterlando (oni studis min pere de denuncantoj). Sed post iu nelonga tempo mi subite komencis ĉion ricevi (oni konkludis, ke mi ne estas kontraŭsovietia). Nur dank' al tio, ke mian korespondadon oni kontrolis nur sporade, mi tute trankvile ricevis la libron '7000 tagoj en Siberio' de Karlo Ŝtajner (SAT 1983), en kiu ĝia aŭtoro priskribis sian vivon en la sovetlanda gulago. Ĉi tiu verko skuis min. Cetere al neniu mi rakontis la enhavon, sed kelkaj el miaj fidindaj Eo-amikoj same avida tralegis la libron kun averto ne plubabili pri ĝi. Simile oni kondutis en aliaj Eo-kluboj, kie cirkuladis tiaj ne-kutimaj legaĵoj.

Kolker: Por klarigi la sintenon de sovetiaj oficialuloj al Eo, jen amuza anekdoto. Dum dek jaroj de ASE mi havis tri longajn personajn konversaciojn kun Miĥail Peslak, vicprezidanto de SSOD. Cetere, kiel diris al mi Ruben Saakov, la fakestro respondeca pri ASE, mia samizdata Eo-lernolibro estis 'surtabla libro' de Peslak, kio signifas, ke ĝi ĉiam kuŝis sur lia tablo (kia honoro!). Do jen. Subite dum la lasta konversacio Peslak prenas de sur sia tablo malnovan gazeton (originalon! – eble el la mezo de la 20-aj jaroj) kun artikolo de Nadeĵda Krupskaja (la edzino de Lenin) kaj citas al mi tion, kion mi ja iam legis en Leninbiblioteko: pri ŝia negativa pritakso de Eo. Kaj li solene deklaras: „Jen vidu! La edzino kaj kunbatalantino de la Gvi-

danto estis kontraŭ Esperanto. Sed ni ja permesas al vi okupiĝi pri tio!”.

NEOFICIALA EKZISTO

Kial SEJM povis ekzisti, se ĝi ne estis leĝa?

Kolker: Se SEJM ne estis registrita kiel jura persono, tio ne signifas, ke ĝi estis kontraŭleĝa. Ni agis laŭ la principo: kio ne estas malpermesita, tio estas permesita. Por ajna okazo, ni evitis ruslingvajn vortojn „organizaĵo”, „asocio”, „movado” kaj simile. Tial la vorto SEJM havis ruslingvan ekvivalenton: Совет молодежи эсперанто-клубов СССР (Konsilio de junularaj Eo-kluboj de USSR).

Gonĉarov: Por superruzi la atenton de KŜS mi proponis nomi nian organizaĵon per neniondira 'Adresaro de Junaj Sovetiaj Esperantistoj' (AJSE). Nur post du jaroj en 1966 (en la konferenco de AJSE apud Kolomna) oni proponis nomi nin SEJM (vorto proponita de Samodaj). Estante la ĉefa respondeculo de la afero, mi sin/nin-garde estis kontraŭ tiu nomo. Sed en demokratia voĉdono mi estis en malplimulto. Cetere, la unua konferenco de SEJM/AJSE, organizita de Efim Zajdman, okazis kvazaŭ en alta grado de konspiro. Jen anekdoto: Ĉiuj invititoj devis atingi iun ripozlokalan haltejon. Poste iri en difinita direkto en arbaron kaj krii ion, ŝajne la kodvorton 'Esperanto'. Kaj je tiu vorto el arbustoj elsaltis loka e-isto kaj, interparolante en Eo la kriinto estis akompanata ĝis certa loko en la arbaro (bivakejo antaŭe preparita de la kolomnanoj). Do, laŭ mi, KŜS-anoj povis ne havi informojn pri tiu, sendu-

be gravega inaŭgura kunveno. Poste evidentiĝis, ke kun la nomo SEJM eblas same ekzisti sen esti bremsata. La plej ĉefa devizo estis fari absolute nenion kontraŭsovietian en nia agado.

Kiel ĉion ceteran, la reĝimo suspektis verŝajne ankaŭ la esperantistojn, ĉu ne? Ĝuste en la dua duono de la 60^{aj} jaroj fortiĝis en Sovetunio la disidenta, civitanrajta (Andrej Saĥarov) kaj diversaj naciliberigaj movadoj. Cetere en tiu tempo okazis skandala incidento ĉirkaŭ la fama sovetia e-isto kaj aktoro Nikolaj Rytkov (1913–73), kiu post vojaĝo tien restis en Aŭstrio. Tiu ‘fuĝo’ eble servis al KŜ kiel preteksto por pli severe okupiĝi pri la vojaĝemo kaj entute la agado de sovetiaj e-istoj.

Kolker: Kompreneble, la reĝimo tiam suspektis ankaŭ e-istojn. Kvankam mi persone interesiĝis pri tiuj de vi menciitaj aferoj, mi ne etendis ilin al mia kaj nia Eo-agado.

Ke ekzistis la danĝero, ke KŜ povus sufoki la agadon de SEJM, aŭguris en la antaŭfonda tempo Efim Zajdman, kiel legeblas en atesta letero de A. Gonĉarov, publikigita en la libro ‘Ne nur legendoj, ne nur pri SEJM’ de Samodaj, p. 71.

Kial mankas en la statuta celaro de 1966 la ideo: „Disvastigi Esperanton en Sovetunio” aŭ simile? Jen la koncerna teksto.

§1. Soveta Esperantista Junulara Movado (SEJM) devas pere de internacia lingvo:

1. propagandi komunismajn ideojn en la tutmondo,

2. batali por paco kaj amikeco inter popoloj,

3. disvastigi en la tutmondo sciigojn pri atingoj de soveta vivo, kulturo

2) La ĉefa celo de soveta esperantistaro estas akiri gvidan rolon en la tutmonda Eo-Movado...

(Samodaj V. *Juna Esperantisto*, februaro 1966, paĝo 3)

Gonĉarov: Ni komprenis, ke tio, t.e. la mencio de disvastigo de Eo, povus agaci la instancojn, la sekurecan servon. Nome ĝuste la disvastigon de Eo oni ege ne volus. Fakte ajna statuto servis nur kiel tre proksimuma orientilo. Do, preter la statuto ni disvastigis Eon kaj faris ĉion kion postulis la koncerna momento. Kiam en SEJM-estraro aperis Viktoro Aroloviĉ, tre akurata kaj senkompromisa homo kun matematikista memorkapablo, mi kaj aliaj fidis lin ĉefulo pri la statuto.

Sed en la regularo de SEJM por la jaroj 1975/76 tamen aperas la sekvaj metamorfozaj frazoj:

1. SEJM estas formo de kunagado inter junularaj Eo-klubo (grupoj), komunaj Eo-klubo au iliaj Eo-sekcio.

2. Celoj de SEJM estas disvastigo, diskonigo kaj praktika utiligo de Esperanto por propagandi sovetan ideologion kaj kulturojn de sovetaj popoloj eksterlande.

3. Al la celoj SEJM strebas kunlaborante kun partiaj, komsomolaj, ŝtataj kaj sociaj institucioj.

Kolker: Tiel estis. Ni enmetis tion poste, kiam ni decidis, ke tio ne prezentas danĝeron. Kaj pri tiaj celoj oficialuloj ne povus alrokiĝi al ni, akuzi nin pri nelojaleco.

Tomasz S. Chmielik (PL)



Kieślowski: Tri koloroj – Ruĝa

Idealismaj sonĝoj de kloŝardo

Modelulino, anoncistino de veterprognozo en televido, juro-studento, maljunulo. Kiel ŝajnas, la figuroj tute sendependaj inter si kaj restantaj ekster siaj percepto-limoj, kiujn starigas aĝo, profesio, interesoj. La nekonatoj pasantaj ĉiutage unu preter la alia, interŝanĝantaj (aŭ ne) banalajn salutvortojn – en la lasta parto de la *Triptiko* de Kieślowski ili vere kuniĝas en tuton. En la hi-



kulpintoj grandparte ne plu vivas aŭ sidas en arestejo. La ordinaraj civitanoj devos rigardi la propran vivon kaj sian partoprenon en la politika vivo dum la lastaj 20 jaroj. Probable la plej grava sekvo de tiu malfrua aresto estos jena: la proceso de Karadžić montros la tutan veron pri la milito en Balkanio.

La Haga Tribunalulo vekas politikajn disputojn, sed per ĉiu proceso ĝi malkaŝas grajnon de la vero. En Belgrado, Zagrebo, Sarajevo kaj Prištino la homoj pleje bezonas ĝuste la veron. Ni scias, ke sen vero ne ekzistas justeco, sed post tiuj militoj sen justeco ekzistus nenia vero.

Esperantigis Tomasz Chmielik

storion pri serĉado de ideala amo – ĝia platona duono, kiu ne lasas vidi sin en bruego de grandurboj. Ĉu estos truda hupado, viro serĉanta purigistinojn kaj senĉese ĝenanta la decidajn konfesojn aŭ amaso da homoj, inter kiuj sin kaŝas tiu sola pramvojaĝantino – nenio povas ŝanĝiĝi. La demokrata socio – *magnum opus* el la idearo de klerismo – kreskinta inter tranĉo-sonoj de la gilotino kaj lavita per sango-torentoj (la ruĝa koloro de aŭto kun angoro sur la vizaĝo de la ĉefa protagonistino) estas por ni ĉiutaga fonto de suferoj. Forlasitaj al la favoro de la sorto, despere serĉantaj feliĉon, ni turnas la kapon en la momento, kiam ĝi havas la ŝancon aperi. Kaj la Demiurgo mistere kunplektas fadenojn de homaj sortoj kaj montras, ke ĉiuj decidoj, kiujn ni faras, estas kiel infanaj petoloj en sabloludejo.

Valentine (mirinda rolo de Irene Jacob), la ĉefa protagonistino, enamiĝis al Michael, filmisto aŭ fotografo, vojaĝanta tra Eŭropo. Kunigas ilin nur telefona kablo – miaopinie – la signo de nia tempo. La disigitaj, avidantaj sentemon kaj kisojn, perditaj homoj – ili ne amas proprajn fotojn same kiel siajn voĉojn, kiuj ilin kunigas en Arkadio ekster la realo. En Arkadio, fine detruita per la banala konduto kaj ĵaluzo de Michael, prezentanta en la lastaj filmo-

kontraŭ la urbo. Por amuzo. – Provu – li diras provokete. Kiel en filmoj, kiam reĝo donas al sia gasto karabenon, ke li pafu kontraŭ sovaĝaj bestoj. Nur ke en la sieĝata urbo vivas homoj, kaj ne bestoj.

Limonov akceptas la provokon, li surgenuiĝas post la mitralo kaj pafas. Ĉiuj estas ravitaj: li estas unu el ni, brava homo! Kvankam poeto, sed ne molulo. Same kiel nia bardo li pruvis, ke li vere estas viro. Kvazaŭ esti poeto – aŭ psikiatro ĉu intelektulo en Balkanio – signifus nenion. Poste ambaŭ sinjoroj trinkas pruno-brandon kaj manĝas kun soldatoj rostitan porkon, sen pensi ĉu Limonov mortpafis aŭ vundis iun.

Tamen mi prezentis ĉi demandon al mi. Kiel poetoj – kaj intelektuloj, kaj psikiatroj – tiaj, kiel Karadžić – povas fari ion similan? Nur post kelka tempo mi komprenis, ke tio estas malbone farita demando, ĉar ĝi baziĝas sur la supozo, ke personoj kleraj, rafinitaj, artistoj kaj tiel plu estas pli moralaj ol simplaj homoj.

Tamen fojfoje ni vidas, ke etike ili distingigigas per nenio. Mi konvinkigis pri tio, kiam mi estis laboranta pri mia verko *Ili ne farus maljustaĵon eĉ al muŝo* pri militaj krimuloj antaŭ la tribunalo en Hago. La militaj krimuloj devenas el ĉiuj tavoloj de la socio, el diversaj rondoj. Inter ili estas akademianoj, verkistoj, mekanikistoj, kelneroj, bankoficistoj kaj kamparanoj.

Nia unua reago estas nomi tiujn militajn krimulojn, kiel Radovan Karadžić, Ratko Mladić aŭ Slobodan Milošević, monstroj, ĉar tiel ni forkuras plej facile antaŭ la terura penso, ke ankaŭ ni kapablus fari aŭ ordoni al iu la sa-

majn kruelaĵojn. Ni, ordinaraj homoj, efektivas tion reciproke – poetoj kaj leterportistoj.

La homoj kapablas fari bonon kaj malbonon. En tio ni havas elekteblon. Radovan Karadžić elektis regadon, kaj por la regado dum milito oni devas iam pagi altan prezon – kaj ŝajnas, ke li pagos ĝin. Kiam mi televidis la BBC-filmon pri la aresto de Karadžić, denove mi ekvidis la vizaĝojn de Franjo Tudjman, Alija Izetbegović, Slobodan Milošević, Željko Ražnatović („Arkan”)... Ili ĉiuj ne plu vivas, kvankam ŝajnas, ke ne antaŭ pli longe ol hieraŭ ili decidis pri nia sorto. La juna serba generacio, naskiĝinta post 1990, probable eĉ ne scias, kio estis tiuj gvidantoj. Post la aresto de Karadžić ili havas la ŝancon ekkoni tiun ĉapitron de la historio de sia lando. Dektri jarojn post la interkonsento en Dayton estas plej hontinde, ke Serbio, ĉefa agresanto, vivas en mensogo. La serboj diradas, ke ili estis viktimoj. Kaj efektive ili estis viktimoj – de la naciisma politiko de Milošević, kiu malbridis la militon kaj usonan bombadon en 1999. Sed tio ne liberigas ilin de la kulpo, ke por Milošević ili voĉdonis tri fojojn, ke ili aplaudis serbajn tankistojn, ke ili subtenis la naciistan partion de Vojislav Šešelj, ke ili turnis la dorson al Eŭropo kaj al la mondo.

La kapto de Karadžić donas ŝancon, ke la serboj malfermos novan ĉapitron de sia historio (sen forgesi la malnovan). Eksterlande regos eŭforio, la serba registaro estos laŭdata pro kuraĝo, sed la serboj mem (kaj ankaŭ la civitanoj de Srpska Republika, kies prezidento iam estis Karadžić) devos rimarki en tio ian ŝancon por si. La ĉefaj

Gonĉarov: Nu post la fondiĝo de SEJM pasis jam pli ol dek jaroj kaj ni povis permesi tion menci, aŭ simple pretergapis sekurecservan timon, mi ne ekzakte memoras. Sed la porsovetiaj ŝirmofrazoj nepre enestis por ŝmiri la okulojn de la instancoj. Ni ja tute ne propagandis la sovetian ideologion...

NEKONSENTO PRI LA IGNORADO DE ESPERANTO

Kiel vi pritaksas la statuson de la agado de tiama SEJM: privata, sekreta, subtera, neformala, alternativa, disidenta, intelektula?

Kolker: Se elekti el tiuj difinoj, mi dirus do alternativa.

Gonĉarov: Neformala estas pli komprenebla en okcidento, en la germana tio kongruus kun ‘informell’. Ŝajne mi trovis pli taŭgan esprimon: ‘Nekonsenta movado’, aktive nekonsenta movado. Tiu ĉi sinkompreno-koncepto, kiu estas preter la rusfonta ‘neformala’, implicas ne konsenti pri la oficiala ignoro/nesubteno k.s. al la lingvo Eo. Ŝajnas, ke tiu nekonsento estis la reago al la ignorado kaj do la ĉefa motivo por naski tiun ignoratan movadon. Ekzemple disidenta SEJM ne povis esti, ĉar la plejmultaj SEJM-anoj (escepte de baltianoj) ne sentis protestemon kontraŭ la reganta reĝimo, plej ofte pro tio, ĉar praktike oni ne vere konsciis pri la kruelaj faktoj de la reĝim-uzurpo kaj la persekutoj sub la stalinismo kaj ankaŭ poste. Do pri disidentaj movadoj en Sovetunio ni nek multon sciis, nek tuŝis aŭ atentis tiujn movadojn kaj ne interesiĝis pri ili. Do nenian influon aŭ efikon ni sentis de tiaj flankoj, ĉar

ni mem dronis en tiu Eo-civito, kiun ni sukcesis konstrui pere de SEJM.

Ĉu SEJM do estis privata cirklo de kelkaj intelektuloj?

Kolker: Tute ne. Ĝi estis bone organizita kaj aktiva movado kun kelkdeko da kluboj kaj kelkcento da membroj. Iusence ĝi estis ŝtateto en la ŝtato.

Konspirado, ŝtateto en la ŝtato... klasikaj kontraŭjudaj riproĉoj de la antisemita flanko...

Gonĉarov: En la pleja komenco estis privata cirklo de 8 personoj, kiuj korespondis kun la 9^a kaj partete inter si. Korespondo temis pri la pluaj paŝoj de organiziĝo kaj kresko de AJSE. Post malpli ol jaro jam estis cirklo de 17 personoj apenaŭ privata, ĉar jam estis gvidanto, kaj samizdata informilo ‘Juna Esperantisto’ kaj redaktoro de tiu informilo kaj kelkaj kolektivaj membroj (Eo-grupetoj). La membro-evoluo de SEJM estis rapida: Ni komencis per unuigo de naŭ personoj, post jaro ni jam estis deksep, kaj fine de la SEJM-periodo 1964–87 ni jam estis ĝis aŭ eĉ pli ol milo.

Interesa estas ja ankaŭ la fakto, ke ne moskvanoj el la centro iniciatis SEJM-on, sed reprezentantoj de junularaj Eo-grupoj el la fora, fakte siberia provinco: el Novosibirsk, Barnaul, Bijsk, Jurga kaj Mejdureĉensk, kiel informas nin la historia skizo pri SEJM de Dmitrij Cibulevskij, p. 9, samkiel la sama fonto klarigas la cirkonstancojn de la eldonagado de SEJM. Do, la SEJM-eldonaĵoj povis esti nenio alia ol speco de samizdato, ĉu ne, kvankam Cibulevskij ne uzas tiun terminon?

Kolker: Kompreneble. Kaj tio estis

iom danĝera por eldonantoj kaj redaktoroj. Feliĉe, neniu estis punita pro tio, almenaŭ laŭ mia scio.

Ĉu vi konis en Sovetunio analogajn grupiĝojn kiel SEJM, ekster la Eo-movado?

Kolker: Vere libervolaj sociaj grupiĝoj preskaŭ ne ekzistis en Sovetunio. Ni sentis proksimecon al kluboj de turistoj kaj kluboj de barda kanto.

Kaj ĝuste ankaŭ la kantkulturo estis grava kaj integra parto de la SEJM-renkontiĝoj, nomataj SEJT-oj. En la anekso de la menciita bruŝuro de Cibulevskij oni trovas kelkajn specimenojn de tiuj kantoj.

Gonĉarov: Estis enlande pluraj aliaj t.n. neformalaj (neoficialaj) organizaĵoj, sed kutime ne en tutsoveta skalo kiel ni. Siatempe mi havis konversacion pri spertinterŝanĝo kun du el tiuj. Klubo de Amatora Kanto, kies ĉefa manifestiĝo okazadis ĉiujare somere en arbaraj kondiĉoj en formo de amase vizitataj koncertoj ĉe fajrujoj aŭ improvizitaj scenejoj. La kantoj estis kaj tipe turistaj (ŝategataj de mi kaj multaj) kaj protestokantoj. La ĉi lastaj enhavis aludojn kontraŭ la reĝimo, kiujn ĉiuj komprenis. (En la Eo-medio simila kanto ekzistis de Miŝa Bronŝtejn, 'Zimbabve', en kiu eblis diveni la SSOD-figurojn malhelpantajn nian Eo-movadon).

La dua organizaĵo tiutipa estis la grupo 'Teorio Solvi Inventajn Taskojn'. Mi iom partoprenis ĝin lernante la teorion. Ĝi estis tiom multfaceta kaj interesa, ke mi eĉ ekintencis plene fondiĝi al ĝi lasante mian Eo-agadon. Sed mia amikec-ligiteco kaj la postenoj

en SEJM, kun la sento de respondeco antaŭ la Eo-geamikoj ne permesis mian egoisman deziron.

Interŝanĝante sperton de laboro, ni konkludis, ke SEJM estis la plej bone strukturita organizaĵo, disponante eĉ proprajn (samizdatajn) presorganojn.

Tiurilate necesus eble kompari ankaŭ la 'infrastrukturon' de malgrandaj etnaj minoritatoj en Sovetunio.

Kiel vi reagis al tiu riproĉo, ke SEJM estis starigita de KŜS same kiel rok- kaj barda muziko, turismo, punkoj kaj ĉiuj ceteraj 'neformalaj movadoj' en USSR?

Kolker: Mi ne legis, nek aŭdis tian aserton. Estus amuze, se KŜS proponus al Anatolo Gonĉarov, aŭ al mi, aŭ al Vladimir Samodaj (ni triope koordinadis SEJM-on antaŭ ol oni elektis prezidanton) krei Eo-organizaĵon! Obsedi pri la rolo de KŜS estus troe. La tuta lando, la tuta vivo estis sub observado de KŜS; SEJM estis sensignifa eta ero, kiun ĝi observadis. Multe pli nin okupis rilatoj kun landaj kaj lokaj partiaj, kom-somolaj kaj ŝtataj instancoj, ankaŭ kun la gazetaro, ĉar tio gravis por la bona klimato por Esperanto.

Gonĉarov: Mi kategorie refutas tiun aserton rilate al SEJM kaj pridubas tion rilate al aliaj neformalaj (nekonsentaj) organizaĵoj. Mi supozas alian konjekton: KŜS simple allasis (sed ni ja tion ne sciis) la formigon de SEJM kaj de aliaj neformalaj organizaĵoj. La tuta lando estis sub la kontrolo de KŜS, detale sciante la malsukcesojn konstrui komunismon kaj ke la loĝantaro maturiĝanta nekontentis, eble pro tio Andropov volis fari drastajn reformojn en la lan-

Slavenka Drakulić (HR)

Doktoro Poeto kaj Sinjoro Krimulo



Slavenka Drakulić (1949) kroata ĵurnalistino, verkistino kaj eseistino. Ŝi estas aŭtorino de la fama libro *Ili ne farus maljustaĵon eĉ al muŝo* pri la militaj krimuloj, kontraŭ kiuj okazas procesoj en Hago.

Ni diru, ke Radovan Karadžić estas alia. Unue li aspektis malsame ol ili ĉiuj – ol diktrunkaj balkanaj politikistoj kun grasaj haroj, ol nerazitaj generaloj kun barelventroj, ol simplaj krimuloj kun ruzaj mienoj aŭ taksiaŝoforoj varbitaj de sekreta polico. Karadžić estas alta, bele ĉarpentita viro kun forta mentono kaj grandaj okuloj. Kun tro longaj kaj distaŭzitaj griziĝantaj haroj li pli aspektis kiel rokmuzika stelulo ol politikisto. Estis facile imagi lin sur la scenejo kun mikrofono en la mano – cetere ofte li aperadis tiel, kvankam ne kiel rokmuzika stelulo. Li estis homo plena je energio kaj karismo. Rigardante la plej novajn, vere stultajn fotojn de la barba maljunulo, oni apenaŭ kredas ĉion.

La historio de lia vivo – knabo naskiĝinta en montenegra vilaĝo forveturas Sarajevo, li finas studi kaj disfamiĝas kiel poeto, prezidento de Srpska Republika en Bosnio kaj fine kiel unu el la plej serĉataj militaj krimuloj – certe

estus materialo por filmo. Ĝi kunigas la tradiciajn figurojn de hajduko kaj popola sorĉisto deklamanta eposojn pri herojoj, kun akompano de kordmuzikilo. Ĉu inter la homoj, kiujn ni televidas ĉiutage, estas iu pli interesa?

Karadžić estas Doktoro Poeto kaj Sinjoro Krimulo en unu persono. Milita krimulo li fariĝis nur pro vanto. La ĝisnunaj sukcesoj ne montriĝis sufiĉaj al li. La vanto mem ne estas krimo, ŝajne ke ĝi kondukas al la situacio, kiam oni havas okazon – kaj efektivigas ĝin – prezentante la ordonon murdi preskaŭ ok milojn da muzulmanoj en Srebrenica, en 1995, por limigi ĉion nur al tiu sola ekzemplo.

Kiam mi pensis pri Radovan Karadžić dum tiuj lastaj jaroj, mi ne povis liberigi min de unu sceno. Ĝi venas el la dokumenta filmo, kiun oni faris dum la sieĝo de Sarajevo. Karadžić grimpis en Pale sur la monto-supron, de kie soldatoj el Srpska Republika mitralas la urbon. Kun li estis rusa poeto Edvard Limonov. Sarajevo troviĝas en la valo ĉe iliaj piedoj, ili vidis ĉiun domon, ĉiun straton, ĉiun arbon. La ideala loko por mitralado. Vestita per eleganta, nigra mantelo kaj ŝaŭto, ĉar estas la vintro, Karadžić kun rideto sur la vizaĝo proponis al sia gasto „ion specialan”, donacon indan je mezepoka reĝo, reganto super la vivo kaj morto: Limonov povas iom mitrali

ekstermita. Tamen ni atingos nenion, se ni ne komprenos, ke ĉi tiu leciono estas kontestebla aŭ forgesebla. La malforteco de ĉiuj lecionoj sin prezentas tiel, ke kun tempopaso ili perdiĝas. Se vi ne kredas min, bonvolu forlasi la progresintan mondon de Okcidento kaj demandi, kion instruis al ni Aŭŝvico. Multaj respondoj ne esperigos nin.

La problemo ne estas facile solvebla. Kio ŝajnas klara por ni, tio daŭre malklarigas por multaj en Oriento, kiel antaŭ kvardek jaroj en Okcidenta Eŭropo. La morala averto de Aŭŝvico, tiel firme engravurita en la memoro de ĉiuj eŭropanoj, estas tute ne videbla por la azianoj kaj afrikanoj. Tio, kio ŝajnas evidenta por mia generacio, ĉiam estos malpli komprenebla al niaj infanoj kaj genepoj. Ĉu ni povus transloki en la historion la eŭropan pasintecon, kiu pli kaj pli malaperas el la memoro? Kaj eble pro neceso ni devus perdi ĝin almenaŭ parte?

Probable ĉiuj niaj muzeoj kaj devigaj ekskursoj por lernantoj ne estas signo, ke ni pretas memori, sed ili montras la senton, ke ni jam pentis kaj povas ekforgesi, permesante al la ŝtonoj memori anstataŭ ni. Mi ne estas certa, sed kiam mi vizitis la berlinan monumenton al la viktimoj de la Holokaŭsto, mi vidis enuantaĵajn infanojn amuziĝi per kaŝludo inter ŝtonplatoj.

Tamen mi scias certe, ke se la historio efektive sian ĝustan taskon – konservi por ĉiam la pruvojn de iamaj krimoj, plej bone ni lasu ĝin en kvieto. Kiam por iuj politikaj celoj ni uzas la pasintecon, elektante taŭgajn fragmentojn kaj jungante historion al instruado de morala oportuno, ni trovos se-

kve la malbonan moralon kaj la malbonan historion.

Dume ni devus precipe atenti, kiam ni parolas pri la problemo de malbono. Ĉar estas diversaj specoj de banaleco. Bone konata estas tiu banaleco, pri kiu parolis Arendt – la malagraba, kutima, najbara kaj ĉiutaga malbono en homoj. Sed ankoraŭ ekzistas la alia banaleco, sekvanta el tro ofta uzado de vortoj: estas ia platigo, sensentigo pro vidaĉo, aŭdado kaj ripetado de la samo tiel ofte, ke aŭskultantoj perdas sagacon kaj rezistas al la malbono, kiun ni volas priskribi. Kaj ĝuste antaŭ tia banaligo ni staras nun.

Post 1945 la generacio de niaj gepatroj formetis la problemon de malbono, ĉar ĝi estis plena je tro multe da signifoj. Tiu generacio, kiu venos post ni, ŝajne preterlasos ĉi problemon, ĉar ĝi havas tro malmulte da signifoj. Kiel evitigi tion? Kion ni povas fari, ke la problemo de malbono restu fundamenta por la intelekta vivo ne nur en Eŭropo? Mi ne konas respondon, sed mi estas konvinkita, ke la demando ŝajnas ĝusta? Hannah Arendt prezentis ĝin antaŭ 60 jaroj kaj mi opinias, ke ŝi ripetis ĝin ankaŭ nun.

Esperantigis Tomasz Chmielik

**La kvara n-ro de SPEGULO
aperos meze de novembro.
Limdato por sendi materialojn
estas la 15-10-2008.
Ĉiujn legnatojn, kiuj ne ricevis
iun ajn kajeron de la revuo ni
petas: reklamaci tiun en via
poŝt-oficejo, kaj tuj informu
la eldoniston!**

do, sed ne plu sukcesis, ĉar li baldaŭ forpasis.

Ĉu vi kiel e-isto siatempe jam sciis pri la stalinismaj purigadoj, en kiuj pereis la grupo ĉirkaŭ Drezno? Kaj kiam proksimume oni eksciis detalojn? Sed oni neniam parolis pri tiuj historiaj faktoj, ĉu ne?

Kolker: Kompreneble, kaj mi kaj la aliaj sovetiaj aktivaj e-istoj tion sciis. Pri tio oni parolis inter si, sed ne skribis publike. Ekzistis tabuo (cenzuro kaj memcenzuro) por skribi pri tio publike. Kiam la Eo-komisiono ĉe SSOD eksciis, ke en la libro 'Esperanto en perspektivo' (UEA 1974) aperos ĉi-tema ĉapitro de Ulrich Lins, oni ege ekscitiĝis (evidente en CK KPSU). Laŭ postulo de la Konsiliĝa renkontiĝo de gvidantoj de socialismaj Eo-organizaĵoj, la bulgario Nikola Aleksiev oficiale protestis ĉe UEA, postulante nepublikigon de tiuj materialoj, sed tio ne helpis. En la tempo de ASE, provante pravigi la tabuon, Isaev foje diris en malvasta kunsido „V dome poveŝennogo o verjovke ne govorjat” (En la hejmo de pendumito oni ne parolu pri ŝnuro). Tro malforta pravigo de la tabuo, kiu fakte estis pravigo de la stalinismo.

Jes kaj la homoj, kiuj revenis el la koncentrejoj, kutime ne parolis pri tiu tempo al aliaj, kiel Samodaj rakontas en sia libro en la ĉapitro pri Nikolaj Blajkov kaj ties edzino, inter alie ĉar la aŭtoritatoj malpermesis al ili rakonti al la samtempoj detalojn pri la tempo pasigita en la gulago.

Kolker: Dum UK Lucerno (1979) Ulrich Lins pridemandis min pri tiu temo. Do mi estis la unua sovetiano (post la

fugiinto Nikolaj Rytjkov), kun kiu li parolis pri tiu temo.

Ankaŭ Detlev Blanke konfirmis nian ĉirilatan demandon, ke precipe tra la esplora kaj publikiga laboro de Lins oni eksciis en la orienta bloko (kaj ne nur tie) detalojn pri la stalinismaj persekutoj de la Eo-movado. Do Lins unuflanke faris la kvazaŭ heroan esploradon pri la stalinismaj reprezalioj dum la jaroj 1937–38, aliflanke kaŭzante problemojn al la postmilita sovetia Eo-movado. Pli sube ni ankoraŭ tuŝos la historion de la publikigita recenzo pri la Eo-libro de Hugo Ŝtajner pri la sovetia gulago.

ESPERANTISTOJ KAJ LA POLITIKO

Ĉu la SEJM-anoj estis membroj de KPSU?

Kolker: Kelkaj jes. Membreco en KPSU povis esti utila por la movado, ĉar ĝi ebligis pli firmajn kontaktojn kun oficialuloj kaj pli facilan vojaĝadon al eksterlando. Miaj du-tri provoj partianiĝi malsukcesis; la motivoj por tre ĝentile rifuzi estis diversaj: jen tro juna, jen tro maljuna, jen ne manlaboristo kaj simile. Sed fakte temis pri tio, ke judoj estis akceptataj en la partion nur en tre limigita kvanto. La partia membreco kredeble estis utila por ies Eo-agado.

Gonĉarov: Konsciante pri la avantaĝoj de partianiĝo por la bono de SEJM, mi proponis, ke ĉiuj estraranoj de SEJM eniru la partion. Kaj mi mem post jaro jam partianiĝis kaj neniu plu. Tio signifas, ke mi jam rajtis veni al la urba partia estraro kaj serĉi helpon por mia Eo-klubo. Kaj (plej grave): la seku-

reca servo dekretoĝis de mi, ĉar ĝi ne rajtis kunlaborigi la partianojn.

Ĉu en SEJM okazis politikaj diskutoj?

Kolker: Praktike ne. Kvankam ni sentis problemojn en rilato de oficialuloj al Eo, ni estis patriotoj de la lando. SEJM servis por movadaj diskutoj kaj laboroj, sed ne por politikaj diskutoj.

Gonĉarov: Kvankam iuj el ni private interesigis pri politikaj aŭ historiaj aferoj, ni ne havis publike politikajn aŭ naciismajn ambiciojn. Nia celo simple estis disvastigi Eon sub la kondiĉoj de ĝia ignorado fare de la reĝimo kaj la kontrolado fare de la sekreta servo. Mi persone, kaj iuj aliaj kungvidantoj, strikte evitis pripolitikajn parolojn. Se okazintus paroloj pri la interna politiko de la komunista partio, SEJM estus likvidita, sendube! Por ŝmiri la okulojn de la sekureca servo ni fojfoje elmetaĉis formale porsovetajn terminojn kaj sloganojn dum SEJT-oj, kiel la socialisman interkluban konkuradon k.s. Pri tiuj sloganoj oni povas legi en 'Legendoj pri SEJM' de Bronŝtejn. Tiu libro eĉ postlasas ŝajnan impreson, ke ni estis ege porsovetaj. Kiel dirite, krimoj de la stalinismo ne estis konsciataj aŭ publike diskutablaj, des malpli en la fora provinco, kie mi vivis (Barnaul).

Aparte min zorgigis tio, kiam komencis aliĝi al SEJM Eo-kluboj el la baltaj respublikoj. Necesas agnoski, ke Vytautas Ŝilas kaj aliaj aktivuloj de Litovio, Latvio kaj Estonio tamen estis komprenemaj, ke kontraŭsovetaj paroloj ekzemple dum tendaroj (SEJT) ne estu farataj, ĉar ili enhavis la riskon pereigi SEJM-on.

Ĉu la funkcioj de SEJM estas karakterizeblaj kiel: a) lojalaj al la soveta reĝimo, b) ne-konform(ism)aj al la soveta reĝimo, c) kritikaj al la soveta reĝimo, d) indiferentaj al politiko?

Kolker: Mi pensas, ke la plimulto estis lojalaj, kvankam multaj konsciis pri la grandaj problemoj en la socio.

Gonĉarov: La plejmulto estis indiferentaj pri la politiko. Ceteraj kritikaj, sed en si mem sen organizaj kadroj. Tia estis ankaŭ mi. Krome, kiel mi jam diris antaŭe: Oni evitis politikajn diskutojn kaj montris specon de ruza lojaleco pere de formalaj sloganoj kaj terminoj. Kritiko al la adreso de la reĝimo estintus tre danĝera kaj povintus konduki krom al la likvido de SEJM ankaŭ al persekutado de e-istoj.

Pri la supozata percepto de la e-istoj fare de ŝtataj potenculoj, en sia libro 'Legendoj pri SEJM', p. 150–151, Bronŝtejn liveras jenan interesan alineon: „Kaj la plej grava, la plej komplika estis la problemego pri rilatoj kun oficialaj instancoj. Ja en kutima vivo ni ĉiuj estis laboristoj, instruistoj, studentoj, inĝenieroj... Samkiel normalaj sovetaj civitanoj ni frumatene komencis nian labortagon kaj bone aŭ ne tre bone, tamen plenumis nian laboron ĝis vespero. Sed vespere! Vespere normalaj sovetaj civitanoj spektis dek-ioman serion de vica kortuŝa televida epopeo pri heroo vivo de siberia vilaĝo. Aŭ drinkis vodkon en amikaj triopoj. Aŭ kunigis la ambaŭ plezuraĵojn. Estis ankaŭ ne tre normalaj, sed ne danĝeraj hobiemuloj – turistoj, artoŝatantoj, sportemuloj, kolektantoj, ĝardenŝatantoj, ktp. Kaj nur esperantistoj estis tute nekompreneblaj kaj – pro tio – danĝeraj. Ankaŭ ili turi-

miaj observoj.

Hodiaŭ ne estas necese rememorigi al la studentoj la ekstermadon de la judoj, nek historiajn konsekvencojn de antisemitismo kaj la problemon de malbono. Ili scias ĉion – tiom, kiom neniam konis iliaj gepatroj. Kaj tiel devus esti. Sed antaŭnelonge mi estis surprizita, kiel ofte prezentiĝas novaj demandoj: „Kial ni okupiĝas ĉefe pri la Holokaŭsto? Kial en iuj landoj la leĝo malpermesas kontesti la Holokaŭston, kaj ne aliajn homocidojn?” Kaj pli kaj pli ofte: „Ĉu Israelo ne uzadas la Holokaŭston kiel pravigon?” Mi ne rememoras, ke mi estus aŭdinta similajn demandojn en la pasinteco.

Mi timas, ke okazis du malbonaĵoj. Substrekante la historian eksterordinarecon de la Holokaŭsto kun ĝia samtempa uzado koncerne aktualajn eventojn, ni konfuzis pensojn en la kapoj de la junaj homoj. Kaj vokante: „antisemitoj!” ĉiufoje, kiam iu atakas Israelon aŭ defendas palestinanojn, ni edukas cinikulojn.

Ĉar tio estas vero, ke la ekzisto de Israelo ne estas minacita. La judoj en Okcidento ne spertas minacojn kaj danĝerojn, kompareblajn kun tiuj el la pasinteco aŭ kun modernaj antaŭjuĝoj por aliaj minoritatoj.

Ni provu jenan ekzercon de la pensoj: Ĉu ni sentus nin sekuraj, akceptataj kaj favore traktataj kiel muzulmanoj kontraŭleĝe enmigrintaj en la hodiaŭan Usonon? Kiel pakistananoj en iuj regionoj de Anglio? Kiel marokanoj en Nederlando aŭ „malpuruloj” en Francujo? Kiel nigruloj en Svislando, kiel rumanoj en Italio aŭ ciganoj en ĉiu loko de Eŭropo? Kaj eble ni sentus nin pli

sekuraj kaj estus pli bone integriĝintaj kiel judoj? Mi pensas, ke ni ĉiuj konas la respondon. En multaj nomitaj landoj – Francujo, Nederlando, Usono, sen forgesi Germanujon – la juda minoritato ludas gravan rolon en la bizneso, amaskomunikiloj kaj kultura vivo. Nenie la judojn trafas stigmatigo, forpelo, minacoj.

Kiel ne perdi ĉi lecionon

Se ekzistas ia minaco, kian devus eksenti judoj, kaj ankaŭ la ceteraj homoj – do ĝi venas de alia flanko. Ĉar tiel firme ni kunigis la memoron pri la Holokaŭsto kun la pledo je unu lando – Israelo, minacas al ni tio, ke velkos la morala signifo de la Pereo. Jes, vere, la problemo de malbono en la pasinta jarcento, por rememori la vortojn de Arendt, manifestiĝis kiel provo ekstermi la judojn per la germanaj manoj. Sed tio ne koncernas nur germanojn, nek judojn. Tio ankaŭ ne koncernas ĉefe Eŭropon, kvankam ĝi okazis ĉi tie.

La problemo de malbono – la malbono de totalismo, la malbono de homocido – estas universala. Kaj se oni manipulas ĝin por tuja profito, povas okazi, ke homoj malporoksimaj de la memoro pri la krimoj faritaj en Eŭropo (ekz. tro junaj por memori, kial ĝi estas tiel grava), ne komprenos, kiamaniere la memoro efikas sur ilin kaj ili ĉesos aŭskulti tion, kion ni intencas klarigi al ili. Laŭ mia opinio jam okazis tiel.

Mallonge dirite, la Holokaŭsto perdos sian universalan efikpovon. Ni devus trovi manieron, por daŭrigi la ĉefan lecionon, kiun donas al ni la sperto de la Ŝoao: pri la facileco, kun kiu nacio – la tuta nacio – povas esti senhomigita kaj

nesufiĉe obstina kontraŭstariĝo al ĉi tiuj aĉeraĵoj en la pasinteco. Tamen la antisemitismo same kiel la terorismo ne estas unusola malbono en la mondo, do ĝi neniam pravigos ignoradon de aliaj malbonaj faroj kaj sufero. Elradikiĝo de la terorismo aŭ antisemitismo el diversaj interligoj, publika agnosko kiel la plej granda minaco al la civilizo de Okcidento, al la demokratio kaj persekutado de iliaj adeptoj dum senfina milito estas danĝera pro tio, ke ni povas ne rimarki multajn defiojn en nia epoko.

Ankaŭ pri ĉi tiu problemo Hannah Arendt havis ion por diri. Kiel aŭtorino de la plej signifa libro pri totalismo ŝi estis konscia pri ĝia minaco al la malfermita socio. Sed en la tempo de la frida milito ekzistis danĝero, ke la totalismo same kiel la hodiaŭaj antisemitismo aŭ terorismo fariĝos objekto de la obseda zorgemo ĉe okcidentaj pensuloj kaj politikistoj. Arendt avertis per la vortoj, kiuj ĝis nun konservis sian povon: „la plej granda danĝero, ke ni rekonos la totalismon malbeno en ĉi tiu jarcento estas obsedo pri tio – ĝis blindiĝo por amaso da etaj kaj tute ne etaj malbonoj, per kiuj estas pavimita la vojo al la infero”.

Edukado por cinikeco

Mia lasta zorgo koncernas la rilaton inter la memoro pri la eŭropa Holokaŭsto kaj la ŝtato Israelo. De kiam ĝi estis fondita, oni trovas ĝian komplikitan opinion pri la Ŝoao. Unuflanke preskaŭ kompleta ekstermado de la eŭropaj judoj estis specifa konkludo por cionistaj argumentoj: la juda vivo ne povas enradikiĝi kaj disflori sur la fremda tero, integriĝo kaj asimiliĝo kun

eŭropaj nacioj estis tragika iluzio, do ili devus havi propran ŝtaton. Aliflanke la opinio disvastiĝinta en Israelo, ke la judoj estas kulpaj, ĉar – kiel oni diradis – ili marŝis kiel ŝafoj al buĉo, signifis ke la origina memo de Israelo estis konstruata per malakcepto de la pasintaĵoj kaj per la rekono de la katastrofo kiel pruvo de malforteco La destino de Israelo estis plifortiĝo kun bredado de novtipa judo.

Tamen dum la lastaj jaroj la rilato al la Holokaŭsto en Israelo ŝanĝiĝis. Kiam hodiaŭ oni kritikis Israelon pro traktado de palestinanoj kaj pro okupado de la terenoj konkeritaj en 1967, ĝiaj defendantoj prefere akcentas la memoron pri la Holokaŭsto. Se iu kritikos Israelon tro severe, tiam ili diras: atentu, vi vekos la demonojn de antisemitismo. Laŭŝajne ili konfirmas, ke la severa kritiko de Israelo ne nur vekas antisemitismon, sed estas la antisemitismo mem. Do, se okazas tiel, la vojo antaŭ ni (kaj ĝuste post ni) estas malfermita: al la kristala nokto kaj pluen al Treblinko kaj Aŭŝvico. Kaj se vi volas ekscii, kien tio kondukos – ili diras – sufiĉas veni al Yad Vashem en Jerusalemo aŭ al iu ajn memorloko en Eŭropo.

Mi komprenas la emociojn, kiuj sin kaŝas post tiuj ĉi tezoj. Sed la tezoj mem estas tre danĝeraj. Se iu admonas min, ke la severa kritiko al Israelo povas veki monstrojn de antaŭjuĝoj, mi respondas, ke li tuŝas la malĝustan problemo-flankon. Sendube persistado kun tabuoj povas sproni antisemitismon. Jam de jaroj mi vojaĝas prelegante pri la postmilita historio de Eŭropo kaj pri la Ŝoao en altlernejoj de Usono kaj eksterlande. Do mi povas ĉi tie raporti pri

stis kaj sportemis, kantis kaj dancis, eĉ drinketis. Sed vespere ili venadis al siaj kluboj por studi kaj uzi iun ‘internacian lingvon’. Ĵaluze kaj indigne rigardis potenculoj, same lokaj kaj la plej altrangaj, al la iniciatoj kaj agoj de esperantistoj...”.

Resume eble tiel: Do, estu Esperanto trankvile la privata hobbio de tiuj strangaj tipoj! Ke ili volas aranĝi neoficialajn renkontiĝojn kaj havi kontaktojn kun eksterlando, tio ja tamen estis nenormala kaj grava problemo el la vidpunkto de KŜS, kiu strebadas kontroli kaj permesi ĉion kaj ĉiun. Sed kiel la ekzemplo de SEJM montras, eblis parte superruzi kaj preterpasi la atenton de la sekureca servo.

PACA KUNEKZISTADO KUN LA ŜTATO

Post konsiderado de viaj respondoj kaj de la suba ĉerpo el al rakonto de Bronŝtejn, estas evidente, ke SEJM mem vole nevole havis iajn problemojn aŭ perturbojn kun la reĝimo.

Kolker: Jes certe estis problemoj. Ekzemple, kelkfoje fiaskis la organizado de tendaroj (SEJT) kaj regionaj renkontiĝoj. Aŭ iuj cenzuristoj malpermesadis ĵurnalajn artikolojn pri Eo (ĝis la fino de la 60^{aj} jaroj).

Gonĉarov: Okazis du memorindaj kunpuŝiĝoj, kie eble KŜS ludis ian rolon. En 1972 la SEJT-tendaro devis organizi la Eo-klubo en Novosibirsk, ĉar la surloka aktivuloj anoncis, ke ili havas tre bonajn kontaktojn kun Komsomolo, tial ili organizos la tendaron oficiale. Mi avertis ilin dufoje ne fari tion. Tamen ili faris laŭ sia plano. Ni ekscii pli poste ke oka-

zis jeno: Urbaj komsomolaj instancoj ĉe iu kontakto diris tion al la tutregiona komsomola instanco, tiu ĉi al la urba partia instanco. La urba instanco demandis pri la tendaro ĉe la tutregiona partia instanco. La lasta decidis informi CKon de KPSU. En Moskvo oni diris: „Kiu tendaro??? Kiuj esperantistoj??? Malpermesi!”. Ĉi tiu malpermeso rapide ruliĝis laŭ la hierarkio. Kaj du monatojn antaŭ la tendaro mem ni eksciis pri la malpermeso. Tiam mi gastis ĉe miaj gepatroj en Brjansk. Feliĉe ekzistis fototelegramoj. Do, mi Eo-lingve rapide konsiliĝis kun la SEJM-estraranoj, kaj ni rapide trovis alian lokon... apud Moskvo!!! Tiusomere apudmoskve estis pluraj arbaraj incendioj kaj ĉiuj someraj entreprenoj estis malpermesitaj. Sed la moskvanoj kun boteloj (certe brandaj) interkonsentis kaŝe kun la direktoro de unu el turistaj bazejoj kaj la tendaro povis sukcese okazi... Estis amuze – Moskvo malpermesis, do ni tendaris apud Moskvo!

Kaj jen alia kazo: En la jaro 1976 devis okazi SEJT apud Tiŝvin, organizita de la Bronŝtejna Eo-klubo. Tiam Miŝa estis ankaŭ SEJM-komitatano respondanta pri amasaj aranĝoj, kaj ĉiuj SEJM-anoj sendis siajn proponojn por la tendara programo al li. La klubo preparis la kondiĉojn (loko, tendoj, kuirejoj instalajoj, manĝproduktoj k.s.) certe malpublike. Sed la urbaj partiaj instancoj iel eksciis la aferon, vokis lin al la instancoj kaj malpermesis la okazigon de SEJT en la rajono*. Tiam Mikaelo elektis konvenan enarbaran lokon centon da

* rajono: teritoria subunuoj kiel parto de distrikto.

metroj trans la limo de najbara rajono. Do li plenumis la koncernan ordonon ne okazigi la aranĝon en la planita rajono. Ĉio estus pasinta nerimarkite, se unu tendarano ne estus malfruiĝinta je unu tago kaj veninta al Tíhvin komen-cante serĉi la tendarlokon kaj... tur-nante sin al iuj oficialuloj. Nu, en la dua tago de la tendaro ni ekvidis kiel tra al-taj herboj en nia direkto moviĝas kelkaj luksaj aŭtoj. Eliris oficial-vestitaj viroj kaj ordonis al ni, ke ni disiru la sekvan tagon. Kaj ili forveturis. Tiam mi kunvo-kis ĉiujn (ŝajne ĉ. 300 gejunuloj parto-prenis) viciĝi kvadrato kaj faris jenajn proponojn: 1) Ni daŭrigu la tendaron malgraŭ ĉio. 2) Organizi babilgrupon, kiu ligo la venontajn estrojn per la plej diversaj paroloj. 3) Bronŝtejn malape-ru/kaŝiĝu ie. 4) La ordo kaj disciplino estu laŭeble altaj. La sekvan tagon ve-nis nur du aŭtoj (Volga) kaj la elirintoj miris, ke ni ankoraŭ ne estis disirintaj. En tiu momento ekfunkciis la babilgru-po, kiu respondis ĉiujn iliajn pretendojn kaj ordonojn (en la grupo estis ankaŭ belaj junulinoj...), klarigante kial ni ne disiru ktp. La viroj anoncis, ke ili reve-nos en akompano de milico (polico) kaj armeaj trupoj, se ni ne forveturos. Certe ili serĉis la ĉefrespondeculon lo-kan, sed ni diris, ke li (Miŝa) foriris al Tíhvin. La etoso iĝis eĉ pli streĉa, sed ni antaŭvidis, ke la forpelo de tiu amaso helpe de armeo eĥiĝos tra la tuta lan-do kaj ke estos punitaj ankaŭ la lokaj in-stancoj, ĉar ili tragapis la komenciĝon de la tendaro... La sekvan tagon deno-ve venis du aŭtoj. La viroj diris, ke se vi ne povas disiri, do almenaŭ ni obeu la sanitarajn postulojn. Ni promesis elfosi necesajn kavojn pli malproksime, divi-

di la amason je grupoj (kvazaŭturistaj) po ne pli ol 20–25 personoj kaj disiri, kvazaŭ apartaj turistaj grupoj umas enarbare. Kaj la viroj forveturis kon-tentaj. Nu, ni plenumis la ordonon nur pri kako/piso-kavoj, sed ne disiris kaj la programo ruliĝis plu. Estis tre pluvema vetero, apudis grandegaj fungoj kaj dikegaj kuloj mordemaj... Do malgraŭ ĉiuj ĝenoj ni ĝuis la etoson. Kiel mem-bro de la komunista partio Mikaelo ri-cevis severan riproĉon de la partio, sed post jaro ĝi estis deprenita. Jen kiel la instancoj nerveze reagis al neoficialaj aranĝoj kaj kiel tiu bizara ‘logiko’ de malpermeso kaj permeso funkciis ĉe ni en Sovetunio.

Do evidente KŜS interesiĝis pri via aga-do. Ĉu laŭ vi okazis interne denuncioj?

Kolker: Kompreneble, KŜS tenis ĉiujn organizaĵojn kaj aktivajn homojn sub kontrolo. Sed ŝajnas, ke ĝenerale KŜS ne havis gravajn suspektojn kontraŭ SEJM. Foje iu maljuna e-isto el Ĥarkovo skribis denuncon kontraŭ iuj junularaj aktivuloj al Ĝenerala Prokuroro de So-vetunio; sed ŝajnas, ke tio okazis jam dum la ekzisto de ASE. Eblas diri, ke almenaŭ aktivuloj fidis unuj la aliajn.

Gonĉarov: En pluraj kluboj estis membroj, kiuj sub la peto de KŜS in-formis ĝin pri la paroloj en la klubaj kunvenoj. Laŭ mia supozo pluraj faris tion, tamen singarde sen havigi nega-tivajn informojn al la sekreta servo. Do la servo ne havis ‘faktojn’ kontraŭ unu el ni kaj pro tio ne povis damaĝi nian agadon.

Pri la kunlaboro de e-istoj kun KŜS eblas diri jenon. Ankoraŭ dum la SEJM-a periodo mi esploris tiun demandon kaj

La maldensigita malbono

Mia tria zorgo koncernas la nocion de malbono. Delonge la moderna la-ika socio nevolonte vivis kun la ideo de malbono. Ni preferas raciajn aŭ jurajn difinojn pri bona kaj malbona, prava kaj malpravaa, krimo kaj puno. Sed dum la lastaj jaroj ĉi tiu vorto iom post iom repen-tras moralan, kaj eĉ politikan diskurson. Malgraŭ ke la nocio de mal-bono denove aperis en la lingvo de la publika disputo, ni vere ne scias, kion fari pri ĝi. Ni estas perditaj.

Unuflanke la nazia ekstermado de la judoj estas prezentata kiel eksterordi-nara krimo, kiel supera malbono, kiel ekzemplo kaj averto: neniam plu! Sed aliflanke ni referencas al la sama „eks-terordinara” malbono por multaj diver-saj, tute ne unikaj celoj.

Lastatempe politikistoj, historiistoj kaj ĵurnalistoj uzadis la nocion de mal-bono por skribi pri amasmurdo kaj ho-micidio en multaj lokoj de la mondo: de Kamboĝo al Rvando, de Turkujo al Ser-bio, de Bosnio al Ĉeĉenio, de Kongolando al Sudano. Ofte ili mencias Hitleron kun la intenco prezenti malbonulon kaj aĉajn farojn de la nunaj diktatoroj. Oni diras, ke ĉie estas multaj „Hitleroj”. Ni ĉiuj scias pri la malbono-akso inventita de prezidento Bush. Jen instrumenta misuzado pri la termino, kiu havas ri-markindan kontribuon al la nunaj cini-kaj reagoj, kiajn ĝi malbridas.

Do, se per Hitler, Aŭŝvico kaj genoci-do de la judoj manifestiĝis la unika mal-bono, kial ni estas senĉese avertataj, ke tio povis aŭ povos okazi ie ajn? Ĉiufoje, kiam iu ŝmiros kontraŭjudajn vortojn sur la muro de sinagogo en Francujo, aŭdiĝas tuj avertoj, ke la „unika” mal-

bono reaperis kaj denove ni havas la jaron 1938.

Ni perdas la kapablon distingi inter ordinaraj pekoj kaj frenezajoj de la ho-marro – stulteco, antaŭjuĝoj, oportuni-smo, fanatikeco – kaj la ĝusta malbono. El la vidkampo ni perdis tion, per kio la dudekjarcentaj politikaj religioj de la ekstremaj maldekstrularo kaj dekstru-laro estis tiel allogaj, tiel modernaj, do tiel diablaj. Se ĉie ni vidos malbonon, kiel ni rekonu ĝin vera?

Antaŭ 60 jaroj Hannah Arendt timis, ke ni ne scios, kiel paroli pri malbono, do ni komprenos neniam ĝian signi-fon. Hodiaŭ ni parolas senĉese pri ĝi, sed kun la sama rezulto: ni maldensigis ĝian signifon.

La risko de blindiĝo

Mia kvara zorgo sekvas el tio, kion ni riskas, kiam nia tuta energio, senta kaj morala, estos turmita al unu problemo, eĉ se plej grava. La kostojn de tiu mal-vasta vidaĵo montras la tragika ekzem-plo de la nuna obsedo de Vaŝingtono pri „globala milito kontraŭ terorismo”. Ne gravas tio, ĉu la terorismo ekzistas – kompreneble, ke jes. Nek tio, ĉu estas necese kontraŭbatali ĝin. Estas grave, kiun alian malbonon ni preterlasos – aŭ mem kreos – okupitaj nur pri la batalo kontraŭ unu malamiko kaj traktante ĝin kiel pravigon al centoj da propraj malgrandaj krimoj.

La samo koncernas nian modernan fasciniĝon pri la problemo de antisemi-tismo kaj nian prezentadon de ĝia eks-terordinara signifo. La antisemitismo same kiel la terorismo estas malnovaj zorgoj. Eĉ iliaj plej feblaj simptomoj rememorigas al ni konsekvencojn de

Malkongrueco de la memoroj

Ĉu do ĉio estas en ordo? Post kiam ni rigardis en la nigran abismon, donis al ĝi la nomon kaj ĵuris, ke neniam plu ĝi povos aperi denove? Mi ne estas tiel certa. Mi permesas al mi nomi kvin zorgojn, kiuj sekvas el la nuna okupiĝo pri tio, kion ĉiu lerneano konas sub la nomo de la Holokaŭsto. Unu koncernas la dilemon pri malkongrueco de la memoroj. En la okcidenta Eŭropo oni dediĉas grandan atenton al la memoro pri la Fina Solvo. Dume la „orientaj” landoj, kiuj aliĝis al Eŭropo post 1989, havas tute alian memoron pri la 2^a mondmilito kaj spertoj venantaj el ĝi – pro la kaŭzoj, kiujn mi jam prezentis.

Post la disfalo de Sovetio kaj tiam, kiam komenciĝis libereco de esploroj kaj disputoj pri krimoj kaj eraroj de la komunismo, pli granda atento estis turnita al la mizera sorto de la orienta duono de Eŭropo, kiu ŝuldiĝas al la germanoj kaj rusoj. Ĉi-rilate la okcidenteŭropa kaj usona akcento sur Aŭŝvico kaj judaj viktimoj vekas iafoje koleron.

En Pollando kaj Rumanio kleraj kaj mondspertaj aŭskultantoj demandis min, kial la okcidentaj intelektuloj estas precipe sentemaj pro amasmurdo de judoj. Kaj kion ili diru pri milionoj da nejudaj viktimoj de la naziismo kaj stalinismo? Kial la Ŝoao estas tiel eksterordinara? Al ĉi tiu demando ekzistas la respondo, sed ne tiel komprenebla por la homoj vivantaj oriente de Odro kaj Niso. Tio povas al ni ĉi tie, en Okcidento, malplaĉi, sed ni devus tion memori. Pro ĉi tiuj problemoj la unueco de Eŭropo ankoraŭ longe ne eblos.

Ĉiu havas siajn zorgojn

La alia malfacilaĵo koncernas historian precizemon kaj riskon pri kompensa troigado. Dum multaj jaroj la loĝantoj de Okcidenta Eŭropo preferene ne pensis pri la militaj suferegoj de la judoj. Hodiaŭ oni instigas nin senĉese al pensado pri tio. Kelkdek jarojn post 1945 la gasĉambroj estis forpuŝitaj al la marĝeno de nia kompreno pri la Hitlera milito. Hodiaŭ ili troviĝas en ĝia centro: por la nunaj studentoj la 2^a mondmilito turniĝis ĉirkaŭ la Holokaŭsto.

El la morala vidpunkto okazas tiel, kiel devus esti: la ĉefa etika problemo de la 2^a mondmilito estas Aŭŝvico. Sed historiistojn tio kondukas al misvoj. Ĉar estas la malgaja vero, ke dum la milito multaj homoj sciis nenion pri la sorto de la judoj, kaj eĉ se ili sciis ion, tio interesis nur malmultajn. Ekzistis nur du grupoj, por kiuj la 2^a mondmilito estis ĉefe projekto de l' ekstermado: nazioj kaj judoj. Por la ceteraj ĝi havis tute alian signifon – ili havis siajn proprajn zorgojn.

Se ni instruas pri la 2^a mondmilito antaŭ ĉio, kaj iafoje nur tra prismo de la Holokaŭsto, do ne ĉiam ni prezentas la historion bone. Al ni estas malfacile kompreni, ke la Holokaŭsto ludas en nia vivo pli gravan rolon ol en la militaj spertoj de la okupitaj landoj. Kaj se ni volas kapti veran signifon de la malbono – pri kiu pensis Hannah Arendt nomante ĝin banala – ni devus memori, ke pleje terura en la ekstermado de la judoj estis ne kian grandan signifon tio havis, sed male: kiel malĉefa tio estis.

pluraj malkaŝis antaŭ mi tion. En Bar-naul KŜS varbis ‘sub min’ du klubanojn, kaj ili ambaŭ flustre konfesis tion al mi. Mi petis ilin denunci ĉion kion ni faras/diras en la klubo krom la dato-loko de la vica SEJT-o. Mi rimarkis, ke la fideleco al Eo estis pli alta ol al KŜS, kiun ĉiuj timis kaj kiun pluraj malestimis. Cetere la siatempa bruo en Pollando pri la e-istoj kunlaborantaj kun la sekureca servo estas laŭ mi tute senbaza. Oni bruu nur, kiam oni legos la denunco-tokstojn kaj trovos ion vere kontraŭ e-istoj kaj Eo.

En sia libro „Ne nur legendoj, ne nur pri SEJM”, ekde p. 91, Samodaj rakontas, kiel la sekreta servo klopodis varbi lin por denunciado. La tasko de tiuj denunci-cantoj i.a. estis informi sekretservistojn, ĉu ili rimarkis ion strangan en la konduto de kolegoj. Kaj li mencias kelkajn epizodojn. Sed li ne volis kunludi la ludon kaj prispioni kolegojn. Pri la ‘kategorioj’ de homoj en la Eo-movado li skribis: „Ekzistis, kiel ĉiam, diversaj homoj. Iuj el ili estis sinceraj sovetianoj kaj samtempe fidelaj e-istoj kaj amikoj – tiuj damaĝis nek la landon, nek Eon, nek amikojn. Aliaj estis sovetianoj kaj e-istoj, sed NE amikoj – tiaj denunciadis. Triaj estis, eble, eĉ fanatikaj sovetianoj kaj e-istoj, sed vervaj informantoj – ĉu pro sia aĉa karaktero, ĉu pro la timo, ĉu pro la envio aŭ malamika rilato al certaj personoj...”

Kiel ajn, kiel ni povis elkristaligi el la ĉi tie prezentitaj klarigoj, la denuncia kaj spiona agado inter sovetiaj e-istoj reale ekzistis kiel integra problemo. La ekzemplo de la Eo-movado ankaŭ mon-tras, ke en Sovetunio nenio povis okazi sen la ‘atentema okulo’ de KŜS, kaj ke

la potenculoj reagis nervoze kiam io ne disvolviĝis sen ilia scio kaj kontrolo. Por homo kiel mi el libera lando tio certe estas malfacile imagebla (kvankam ankaŭ en Svislando ekzistis/as sekureca servo, kiu dum la malvarma milito observadis diversajn homojn, inter alie ankaŭ min, pro miaj kontaktoj kun orienta Eŭropo). Cetere, ĉu la fako interlingvistika ludis rolon en SEJM?

Kolker: Jes, inter pluraj fakoj de SEJM estis la interlingvistika. Iun tempon gvidis ĝin ankaŭ mi. Mia ĉefa kontribuo estis en instruado de Eo, en kluboj kaj perkoresponde. El tiu agado estiĝis mia plej grava libro ‘Vojaĝo en Esperanto-lando’ [kiu apartenas al la plej furoraj libroj en Eo – AK].

Gonĉarov: Interlingvistiko kaj Isaev mem ludis neniun veran rolon en SEJM-aferoj. Nur unu fojon ni invitis Isaev-on prelegi en iu tendaro, kion li faris kaj plue ripozis en Eo-etoso. Sed jes, ni iom okupiĝis pri interlingvistiko kadre de la Interlingvistika fako de SEJM.

ASE, SSOD KAJ LA CETERO

En la fondotempo de ASE, do en 1979, L.I. Breĵnev estis estro de la partio kaj de la ŝtato. Kvankam edukita en la klasika sovetikomunisma spirito kaj farinte rapidan karieron en la sovetia administra kaj politika aparato, li eĉ apogis la Helsinki-procezon de KSCE kaj per tio formale ankaŭ la homajn rajtojn. En la sama jaro la sovetia registaro ordonis la invadon de Afganio, kio revarmigis la Malvarman Militon. Jurij Andropov gvidis KŜS-n kaj Miĥail Suslov estis la influa ĉefideologo. Kreinte unudimensian

mondon, kiu havis por la mallibera, totale kontrolata kaj politike-kulture adaptigata socio, perdinta pli kaj pli rapide sian kredon je la komunisma estonteco, nenian perspektivon kaj kiu kondukis en sakstraton, tiuj tri kontestataj sovetgvidantoj ja vidis ian neceson de iuj reformoj en Sovetunio. Hezitante tro tuŝi la rigidan sovetian sistemon ili, jam tre malsanaj, baldaŭ mortis kaj postlasis ruinojn, dezerton aŭ diluvon, kiun la posteuloj devis savi. Tiel la stagnantaj ŝtato kaj socio restis ĝis la fino nereformitaj. Ĝia ĝenerala senkreditiĝo sub Gorbaĉov, kiu celis reformi Sovetunion kaj la socialismon, kaj la kolapso-likvido sub Jelcin, kiu kuraĝis rezigni prie, iĝis neeviteblaj.

Jen plej klare la staton de la Eo-movado Samodaj karakterizis en sia libro (p. 150): „Fine de la 1970^{aj} jaroj la situacio pri Eo-movado en Sovetunio fariĝis kritika. Esperantistoj, kaj antaŭ ĉio SEJM, aktivis aŭdace kaj senkontrolle. La ŝtatpotenco estis malkontenta pri tiu aktivado, tamen ne povis jam ripeti tiun neniigon de la movado, kia [ĝi] okazis en 1937–38, ĉar estis ja tempo tute alia. (...) SEJM laŭ la ŝtataj kriterioj estis organizaĵo neleĝa, do suspektinda. La sekurecaj servoj atente observis la agojn de esperantistoj kaj raportadis pri la rezultoj al CK”. Kaj kiel reagis kaj kondukis la esperantistoj, Samodaj ankaŭ memorfiksis: „En tiuj jaroj esperantistoj aktive ‘bombardadis’ per diversaj petoj kaj postuloj la superajn instancojn, antaŭ ĉio la Centran Komitaton de la komunista partio (CK KPSU), kiu decidadis ĉion enlande. La bombardado estis organizita kaj individua. La individuaj leteroj ofte estis tro naivaj, koleraj, stultaj kaj fanatikaj. SEJM entreprenis amasanleterumadon al la instancoj, publikiginte

en siaj neleĝaj eldonaĵoj la ĉefajn problemojn, kiujn necesas en la leteroj – klubaj kaj personaj – aparte emfazi”.

Mi ie legis, ke fakte ankaŭ la Eo-komisiono ĉe SSOD verkis kaj sendis leteron al SSOD por postuli la starigon de propra sovetia e-ista asocio. El tio, kiel konate, rezultis la fondo de ASE. Sed kial ASE estis fondita nur en 1979 kaj ne pli frue?

Kolker: La 14^{an} de marto 1979 en la luksa palaco ‘Domo de Amikeco kun Alilandaj Popoloj’ en Moskvo okazis la fonda konferenco de ASE. Estis faritaj tie grandaj promesoj. (La revuo ‘*Esperanto*’ 5/1979 de UEA raportis pri la okazaĵo). Ni ĉiam strebis al oficialiĝo, sed ‘supre’ oni ignoris niajn petojn kaj proponojn. Venis la tempo, kiam SEJM kreskis kaj fariĝis neignorebla, do en la Centra Komitato de KPSU oni decidis nin oficialigi por direkti laŭ ĝusta vojo, kontroli nian agadon kaj eĉ profiti, ekzemple, per ideologiaj publikaĵoj [kiel ekzemple la eldono de la paroladoj de Breĵnev en Eo – AK].

Gonĉarov: ASE aperis, ĉar la instancoj timis, ke la plua kresko de nia kolektivo transiros la kontroleblajn kadrojn. Nu ankaŭ eble en la partia supro aperis iuj, kiuj vidis la utilon de Eo entute. Almenaŭ kun unu el tiuj mi konatiĝis.

Sed poste montriĝis, ke estis iom naive kredi al la promesoj de ASE kaj erare malfondi SEJM-on. SSOD, la centra instanco, kiu okupiĝis pri asocioj havantaj eksterlandajn kontaktojn, ludis la rolon de patrono, partnero, gastiganto, protektanto, aŭspicianto de ASE aŭ kiel ajn oni nomu tion. Kial konkrete sovetiaj e-istoj ne ŝatis SSOD-on kaj malfidis precipe ties

Tial – por nomi la faman ekzemplon – kiam Primo Levi proponis al la itala eldonejo Einaudi en 1946 siajn rememorojn pri Aŭŝvico (*Se questo e un uomo*), ĝi rifuzis la publikigon. Tiutempe kaj en la postaj jaroj Bergen-Belsen kaj Dachau, sed ne Aŭŝvico, prezentis la simbolon de naziaj kruelaĵoj. Forta akcento sur politikaj, kaj ne rasaj deportadoj, pli bone konvenis al esperigaj rakontoj pri milita rezisto.

Miaj propraj spertoj povas konfirmi mankon de la intereso pri la Ŝoao dum tiuj jaroj. Mi kreskis en Anglio, venkaland, neniam okupita, do libera de ĉia komplekso pri krimoj faritaj dum la milito. Sed eĉ tie oni ĝuste ne parolis pri tio – nek en la lernejoj, nek en la gazetoj. Ankoraŭ en 1966, kiam mi komencis studojn pri moderna historio en la kembra universitato, oni istruadis al mi la historion de Francujo (ankaŭ pri Vichy) preskaŭ ne menciante judojn kaj antisemitismon. Ni okupiĝis pri la nazia okupado de ĉi tiu lando, pri la kunlaborantoj el la registaro de Vichy kaj pri la franca faŝismo. Sed neniu el niaj legiĝoj en la angla kaj franca lingvoj prezentis la rolon de Francujo en la fina solvo (*Endlösung*) de la juda problemo.

Kvankam mi estas judo kaj en koncentrejoj pereis kelkaj miaj parencoj, mi ne miris tiam, ke oni prisilentis ĉi temon. La silento ŝajnis al mi io normala. Kiel el la perspektivo de la tempo oni povas klarigi la pretecon akcepti tion, kio ne estas akceptebla? Kial la eksterkutima ŝajnis tiel normala, ke ni eĉ ne rimarkis tion? Probable estis unu aflikte simpla kaŭzo, kiun Tolstoj malkaŝas en *Anna Karenina*: „Ne ekzistas tiaj vivokondiĉoj, al kiuj homo ne povus

alkutimiĝi, precipe kiam li vidas, ke la ceteraj ne rezistas”.

La ŝanĝoj komenciĝis ek de la 70^{aj} jaroj kaj pro multaj kaŭzoj: tempopaso, scivolemo ĉe la nova generacio, kaj sendube ankaŭ pro malfortiĝinta streĉo en la internaciaj rilatoj. En la okcidenta Germanujo, la nacio respondecas pri la teruraĵoj de la Hitlera milito estis transformita dum la vivo de unu generacio al la civito konscia pri la amplekseco de la faritaj krimoj kaj pri la skalo de la propra respondeco. Ĝis la 80^{aj} jaroj la historio pri ekstermado de la eŭropaj judoj pli kaj pli aperadis en libroj, kino kaj televido. Ek de la 90^{aj} jaroj kaj post la fino de la divido de Eŭropo, multiĝis lokoj de memoro, muzeoj kaj oficialaj aktoj de pento. Eĉ en la postkomunisma Orienta Eŭropo la suferoj de la judoj okupis sian lokon en la oficiala memoro.

Hodiaŭ la Ŝoao estas akceptita kiel punkto de referenco. La historio de la Pereo, naziismo aŭ de la 2^a mondmilito formas nun devigan parton de la liceaj instruprogramoj en la tuta mondo. En Usono kaj Britio troviĝas lernejoj, kie ĉi tiu kurso estas unusola fragmento de la moderna historio de Eŭropo, kiun ekkonas la gelernantoj. Hodiaŭ ekzistas granda nombro da faktografiaj dokumentoj kaj studoj pri milita ekstermado de la judoj, lokaj monografioj, filozofiaj eseoj, sociologiaj kaj psikologiaj esploroj, memorlibroj, arĥivoj kun rememoroj ktp. Ŝajnas, ke efektiviĝis la profetaĵo de Hannah Arendt. La historio de la problemo de malbono iĝis fundamenta demando en la intelekta vivo de Eŭropo.

ĉio kiel kaj kial iuj eŭropanoj (germanoj) povis realigi ekstermadon de aliaj (judoj). Ĝuste tion ŝi komprenis sub „problemo de malbono”. Iasence, kiel mi diris, ŝi pravas. Sed kiel ofte tio okazas, por kompreni, kion ŝi strebas, la ceteraj bezonis multe da tempo.

Tio estas vero, ke post la malvenko de Hitler kaj post la nurembergaj procesoj la juristoj kaj politikistoj dediĉis multe da atento por krimoj kontraŭ la homaro kaj difinoj de tiu nova krimo – genocido – kiu ĝis nun eĉ ne havis sian nomon.

Sed anstataŭ konsideri la problemon de malbono, la plimulto da eŭropanoj deturnis siajn kapojn de ĝi. Hodiaŭ estas malfacile al ni kompreni tion, sed la Ŝoao – provo de genocido kontraŭ la eŭropaj judoj tute ne estis dum jaroj la fundamenta problemo de la intelekta vivo en Eŭropo (aŭ Usono). Kial?

Eŭropo deturnas la kapon

En la orienta Eŭropo estis kvar kaŭzoj. Unue – ĝuste ĉi tie oni faris la plej terurajn krimojn dum la lasta mondmilito. Kvankam ĉi tiujn krimojn efektiviĝis germanoj, ne mankis helpopretaj kunlaborantoj el la okupitaj landoj: poloj, ukrainanoj, latvoj, kroatoj kaj aliaj. En multaj lokoj manifestiĝis forta volo, por forgesi tion, kio okazis, por kaŝi la plej grandajn kruelaĵojn. Due – amaso da nejudaj loĝantoj en ĉi tiu parto de Eŭropo fariĝis viktimoj de germanaj kaj rusaj krimoj. Do, kiam oni rememoris tie la militon, homoj ne pensis pri la morto de la judaj najbaroj, sed pri siaj perdoj kaj suferegoj.

Trie, la meza kaj orienta Eŭropo grandparte troviĝis sub la rusa kontro-

lo ĝis 1948. Laŭ la oficiala sovetia vizio pri la 2^a mondmilito ĝi estis kontraŭ faŝistoj (en Sovetio ĝi ricevis la nomon de Granda Patrolanda Milito). Por Moskvo Hitler estis faŝisto kaj naciisto. Lia rasismo havis pli malgrandan signifon. Kompreneble milionojn da murditaj judoj el la terenoj de Sovetio oni aligis al la propraj militaj perdoj, sed en historiaj libroj kaj dum solenaĵoj memore al la milito oni prisilentis aŭ tute kaŝis ilian judecon.

Kaj finfine, post kelkaj jaroj de komunisto regado, la rememoron pri germana okupacio anstataŭadis la konscio pri subpremado far Sovetio. Do, la ekstermadon de la judoj oni forpuŝis ankoraŭ pli forte el la memoro.

En la okcidenta Eŭropo – malgraŭ aliaj cirkonstancoj – okazis la sama forgeso. La okupado de Francujo, Belgio, Nederlando, Norvegio, kaj post 1943 ankaŭ de Italio estis humiliga sperto, kaj la postmilitaj registaroj volis forgesi kunlaboradon kaj aliajn malindajn epizodojn, ili prezentis heroajn rezistmovadojn, insurekciojn kaj iliajn martirojn. Multajn jarojn post 1945 eĉ tiuj, kiuj havis pli ampleksan konon, kiel ekz. Charles de Gaulle, konscie helpis konstruadon de la naciaj mitologioj pri heroa suferado kaj amasrezisto. En la postmilita Germanujo komence superadis la memoro pri la propraj suferoj. Kiam komenciĝis la frida milito kaj ŝanĝiĝis malamikoj, prezentado de la krimoj, kiujn antaŭnelonge faris la nunaj aliancanoj, ne estis konvena. Do neniu – nek germanoj, nek aŭstroj, nek francoj, belgoj aŭ italoj – volis rememori turmentegojn faritajn al la judoj aŭ tiun eksterordinaran malbonon, kiu ĉion pretigis.

funkciulojn Berjoza kaj Ŝanina?

Kolker: Unuavice, ĉar Anatolij Berjoza, Lidija Ŝanina kaj iliaj estroj en SSOD kaj CK KPSU malŝatis la e-istojn. La ŝtato pagis al ili salajron kaj donis aliajn avantaĝojn ne por disvastigi Eon, sed por efike kontroladi la e-istan agadon. ASE estis la sola landa e-ista organizaĵo, en kies statuto mankis tiaj celoj kiel disvastigo kaj instruado de Eo! SSOD ĉiam suspektis nelojalecon de e-istoj kaj rilatis al ili preskaŭ kiel al malamikoj. Anatolij Berjoza, la altrudita sekretario de ASE, esperis, ke ASE aliĝos al UEA. Per tio li imagis, ke li fariĝos komitatano de UEA kaj profitos eĉ pli da okazoj vojaĝi eksterlanden senpage. Samtempe ĝuste li mem kaj lia SSOD rilatis al UEA negative, ĉar eksterlandaj kontaktoj de la homoj, kiujn tiu organizo proponis, estis nedezirataj en Sovetunio. Foje Berjoza diris al mi, ke la delegita reto de UEA estas spiona servo! Do esti membro de UEA estis aventuro en Sovetunio.

Tiu ‘konfeso’ de Berjoza imprese ilustras la pensadon de tiuj funkciuloj laŭ stalinisma tradicio, ĉu ne, en kies kapoj cirkulas terminoj, kiel kosmopolitismo, burĝeco, cionismo, imperiismo, trockismo ktp. por misfamigi aliajn kaj ĉefe tiujn, kiuj ne fajfas kaj dancas laŭ la oficiala linio de la totalisma ŝtatspartio, kiu pretendas, ke ĝi ĉiam pravas. Kiel do karakterizi la agadon de ASE (scienceca, soveti-propagandeca, burokratia, alia)?

Kolker: Dependas de tio, kies agado. La agado de la ASE-estraro estas unu afero, tiu de la kluboj – alia. Fakte, la kluboj havis pli-malplian liberon agi tiel, kiel ili deziris... sub ioma premo de

supre. Aliflanke, la ekzisto de SSOD estis utila, ĉar ĝi permesis havi pli firman pozicion en rilatoj kun lokaj oficialuloj. La oficialan agadon de ASE oni povas karakterizi kiel soveti-propagandecan kaj burokratian. La prezidanto Isaev kaj vicprezidantoj Samodaj kaj Zubkov klopodis, ke la ekzisto de ASE donu ankaŭ utilon por la e-istoj (ekzemple, eldonadon de libroj nepropagandecaj, vojaĝojn al Universalaj Kongresoj).

Ankaŭ Bronŝtejn skribas en sia libro ‘Legendoj pri SEJM’, p. 151, ke SSOD-aj Eo-komisionoj efektive ne estis starigitaj por propagandi Eon, sed nur kun la celo „faciligi la internaciajn ligojn en formo de interŝanĝo pere de delegacioj, periodaĵoj, leteroj, komuna pacbatalo...”

Gonĉarov: Al la absurdaĵoj en ASE apartenas ekzemple la anekdoto, ke mi kiel gvidanto de la Scienc-Teknika fako de ASE ricevis de ASE-patronaj instancoj riproĉon, ke la fako tro laboras, foje pli bone ol ASE mem.

Anekdotojn pri ‘kamarado Anatolij Vasiljeviĉ Berjoza’ (*1942) kaj ties aroganta rilato al Esperanto kaj la e-istoj rakontas Bronŝtejn en sia libro ‘Legendoj pri SEJM’, p. 150–157. Interalie tie estas notite, ke Berjoza stokis la tutan ricevitan literaturon en Eo en la subterejo de SSOD. Al Bronŝtejn persone li iam klarigis, ke la „rubajojn” (t.e. Eo-periodaĵojn) li rajtas nek dissendi, nek forĵeti, ĉar mankas ĉirilate ordono! Kaj Samodaj konfirmis, ke Berjoza ne konsideris inde aŭ necese pludistribui Eo-materialojn al kluboj ktp. Rilate al la e-istoj Berjoza, kiu kondukis kiel inspektoro kaj kies Eo-konoj estis evidente ne tre profundaj, permesis al si

plurajn ridindaĵojn. Pri lia rolo en la UK en Ateno, kien li oficvojaĝis en 1976, eĉ moketis la revuo Esperanto (UEA)! Reage al tio Berjoza konsterniĝis kaj nomis la Eo-movadon parto de la „monda imperiismo” kaj de la „cionismo”, kiel Bronŝtejn memoras.

Kolker: Ĉio ĉi estas troigo. Rilate la Eo-konojn de Berjoza, efektive en 1976 la ĵus enoficigita SSOD-funkciulo ne povis paroli Esperante. Sed poste li parolis ĝin sufiĉe bone, tiom pli ke tion faciligis lia gepatra lingvo – la moldava/rumana, kiun ankaŭ mi parolas.

Samodaj rakontas ankaŭ epizodon, kiam li en 1981 estis invitita en la internacian fakon de CK KPSU, kie la instruktoro interesiĝis pri la Eo-okupoj, kiujn li nomis „afero burĝa kaj trockiisma”. Do bela kolekto de kontraŭesperantaj etikedoj!

Samodaj en sia libro, p. 93, sufiĉe negative priskribas la personecon de Berjoza, kiu malhelpis al li vojaĝi eksterlanden kun la klarigo, ke Samodaj ne estis membro de la komunista partio. Samodaj ne hezitas nomi Berjozan „la plej rimarkinda malamiko de Eo kaj e-istoj” aŭ „senkaŝan malamikon de Eo kaj e-istoj” (p. 146). Eĉ multe pli malfavora estas lia pritakso pri la „komandantino” s-ino Ŝanina, kiu sekvis Berjozan en 1983 al la posteno de la respondeca sekretario de ASE sine de SSOD. Lia karakterizo de SSOD, organizo „spionanta e-istojn kaj suspektanta ilin pri malbonfaroj, opinianta ilin kontraŭsovietiaj agentoj” kaj „kompromitanta” sian propran ŝtaton, egalas al furioza kondamno. La atmosferon en SSOD Samodaj priskribas kiel „ĝenerale malsanecan”. La funkciulojn de SSOD li nomis

„ĝendarmoj” (p. 162), kaj entute li vidis du frakciojn agi unu kontraŭ la alian: la ‘pozitivulojn’, t.e. la verajn e-istojn kiel Verŝinin, Bokarjov, Podkaminer, Gusev, Armand, Gonĉarov, Kolker, k.m.a. (Isaev mankas eksplicite en tiu listo de Samodaj, sed li eble troviĝas sub la „multegaj-multegaj aliaj”), kaj la ‘negativulojn’, t.e. la ‘kontraŭesperantistojn’ kaj reprezentantojn de SSOD kiel Makovskij, Saakov, Berjoza, Ŝanina, Peslak kaj iliajn „hel-pantojn” en la e-ista medio (sen diri nomojn). Laŭ Samodaj kaj ties samopiniantoj, la ĉilastaj havis la taskon kontroli kaj bremsi la Eo-agadon, kvankam ili cinike asertis, ke ili volis „nur helpi” al la e-istoj. Do la rilatoj inter tiuj ‘frakcioj’ povis esti dekomence nur streĉitaj kaj karakterizataj de reciproka malfido, malamo kaj kve-relemo. En sia libro Bronŝtejn aperigis sur p. 222 anekse cinikan burokratiecan respondon de Ŝanina el la jaro 1985, en kiu ŝi havis la okazon plenforte vivi sian potencon rilate la demandon kiu vojaĝu al eksterlando kaj kiu ne, kiu estas konsiderata kiel inda persono el la vidpunkto de SSOD kaj kiu ne, ktp. La lasta frazo de ŝia (supozeble ‘standarda’) letero tekstis jene: „Ĉiu vojaĝo de e-isto eksterlanden estas rigardata kiel honorigo pro bona laboro”.

ISAEV KAJ ALIAJ

Ni sekve analizu aliajn centrajn figurojn de la sovetia Eo-movado. Pri Magomet Izmajloviĉ Isaev Samodaj skribis en sia libro (p. 132): „Labori kun Isaev ne estis facile. Li estis sincera e-isto, sed neniam partoprenis kluban movadon, ne ĉiam komprenis la bezonojn de sovietiaj e-istoj...”

Tony Judt (US)

La problemo de malbono en la postmilita Eŭropo



Teksto de la prelego farita la 30^{an} de novembro 2007 en Bremeno, kiam oni transdonis al Tony Judt la Hannah-Arendt-premion

TONY JUDT (1948) – profesoro de New York University, specialisto pri la historio de la intelekta Eŭropo en la XX jarcento. Lastatempe aperis lia verko *Postwar: A History of Europe Since 1945* (Post la milito: Historio de Eŭropo post 1945). Li estas konata pro siaj kritikaj artikoloj kontraŭ la politiko de Israelo, kiuj malbridis kelkfoje viglajn protestojn ĉe usonaj intelektuloj.

La unua libro de Hannah Arendt, kiun deksesjara mi tralegis, estis *Eichmann en Jerusalemo*. Komence ĝi ne plaĉis al mi. Tiam mi estis fervora socialisma cionisto, do la konkludoj, kiujn faris Arendt, vekis ĉe mi profundan timon. Sed poste mi komprenis, ke la libro montras tion, kio pleje bonas en la aŭtorino: rekta prezentado de tiu doloriga temo, evitado de oficiala interpreto, provokado al disputo ne nur kun siaj kritikantoj, sed precipe kun geamikoj. Kaj antaŭ ĉio detruado de la sankta kvieto, kian donas simplaj opinioj. Omaĝe al ĝuste tia Arendt, detruantino de kvieto, mi volas dediĉi miajn konsiderojn pri la temo, kiu penetris ŝiajn politikajn verkojn.

*

En 1945 Arendt skribis, ke „la problemo de malbono estos fundamenta demando en la postmilita intelekta vivo de Eŭropo, same kiel morto post la antaŭa milito”. Kompreneble ŝi pravas iasence. Post la unua mondmilito la eŭropanoj konsterniĝis per la rememorado de morto, precipe de la morto sur batalkampo, laŭ skalo neimagebla ĝis nun. La poezio, prozo, kino kaj plastikaj artoj de la intermilita Eŭropo estis plenaj de bildoj pri violento kaj morto, grandparte kritikaj, sed iaforte nostalgaj (ekz. en la verkoj de Ernst Jünger kaj Pierre Drieu la Rochelle).

Post la 2^a mondmilito la kulto de perforto tute forvaporiĝis el Eŭropo. Dum tiuj militjaroj la perforto estis direktita ne nur kontraŭ soldatoj, sed antaŭ ĉio kontraŭ civiluloj. Terura elĉerpiĝo de la eŭropaj nacioj (same triumfantaj, kiel malvenkintaj) postlasis malmulte da iluzioj pri la glora batalo kaj honora morto. Kompreneble restis la universala alkutimiĝo al brutaleco kaj krimo laŭ skalo sen precedenco.

Evidente por tiaj observantoj, kiel Arendt, la tuta kontinento devis obsede barakti kun la demando, kiel homoj povis fari tion unu al la alia, sed antaŭ

Kaj... ili jam *kondukas* vin. Se en tago, do neeviteble sekvas tiu mallonga, rara momento, kiam – sen parado, kun via konsento de malkuraĝulo, aŭ parade, kun pistoloj en la mano – ili kondukas vin tra amaso, inter centoj da samaj homoj, senkulpaj kaj persekutataj. La buŝon neniu fermis al vi. Kaj nun vi devus KRII: krii, ke vi estas arestita! Ke friponoj en civilaj vestoj kaptadas homojn! Laŭ mensogaj denuncoj! Ke daŭras silenta ĉasado je milionoj da civitanoj! Kaj aŭdante ĉi tiajn kriojn multfoje dum tago kaj el ĉiuj kvartaloj de la urbo eble aliaj civitanoj spronus la orelojn? Eble arestado ĉesus esti tiel facila laboro?

[...] Sed el via sekiĝinta gorĝo elŝiriĝas neniu krio, kaj amaso da preterpasantaj homoj opinias vin kaj viajn persekutantojn grupo de amikoj dum promeno.

Ofte mi havis la okazon por *krio*. [...] Kial mi ne diros ĉion al la trompataj homoj en mia lasta momento, kiam mi ankoraŭ povas malkaŝe interparoli kun ili?

[...] Ĉiu havas ĉiam dekon da glataj kaŭzoj, por ne fordoni sin kaj opiniadi, ke ĉio estas prava.

La homoj ankoraŭ esperas, ke okazos bone kaj ili timas per krio malbonigi la propran situacion (el tiu alia mondo ne venas novaĵoj, do ni ne scias, ke ekde la aresto nia sorto decidiĝis plej malbone el ĉiuj manieroj kaj malbonigi ĝin preskaŭ ne eblas). La ceteraj ankoraŭ ne maturiĝis por tiuj ideoj, kiuj sin kunmetas en krimon inter homoj. Nur revoluciulo ĉiam havas proprajn sloganojn sur la buŝo, ili mem elŝiriĝas el lia gorĝo, kaj de kie prenu ilin obeema pano-manĝanto, kiu teniĝis flanke? Li SIMPLE NE SCIAS, kion li krii. Finfine estas ankaŭ homoj, kies brusto estas tro plena, kies okuloj vidis tro multe, por ke ili ellasu siajn emociojn per senhelpaj krioj.

Esperantigis Tomasz Chmielik

Kiel do karakterizi la personecon kaj la pozicion de Magomet Isaev? Ĉu li estis unuavice interlingvisto aŭ esperantisto? Ĉu laŭ vi la interlingvistika agado de Isaev estis utila?

Gonĉarov: Isaev estis tre singardema laŭ la naturo, sed tre bonkora homo laŭ la kaŭkaza kutimo. Li nur iom simpatiis al ni, do SEJM, kaj se ni (tre malofte) ion petis de li, ekzemple prelegi, li plenumis la peton, sed nur se la afero estis oficiala. Tamen lia plej granda kontribuo movada estis organizi kaj dum pluraj jaroj gvidi oficialan interlingvistikan grupon ĉe la Akademio de Sciencoj.


En 2003 aperis en Rusia Esperanto-Gazeto longa kaj parte tre kortuŝa aŭtobiografia-memuareca artikolo de Magomet Isaev, kiun registris kaj esperantigis N. Gudskov kaj A. Junusov. Ĝin mi vere legis kelkfoje kun grandega interesiĝo, ĉar ĝis nun mi sciis malmulte pri tiu respektinda samideano, kiu originas el Norda Osetio. Ĉijare li fariĝis 80-jara; en tiu artikolo estas priskribataj lia profesia kariero de vilaĝo al ĉefurbo kaj la signifo de sia propra kontribuo al la interlingvistika kaj Eo-laboro el persona vidpunkto. Kiel li mem rakontas, kiel homon zorgigis lin multaj demandoj, krom la internacilingva problemo ekzemple ankaŭ la sorto de „disidentaj junuloj”. Kaj en la sama artikolo li ankaŭ klarigas „kiom multe kaj akre” li „diskutis kun gvidantoj de SSOD” por „persvadi” ilin, ke oni povu atingi ion, eĉ multon, kvankam multaj ideoj restis neefektiveblaj.

Kolker: Magomet Isaev dum dek jaroj de lia ASE-prezidanteco faris kion li povis. Li estis honesta persono, konvinkita e-isto, aŭtoro de seriozaj Eo-ler-

nolibroj. Sed li estis singarda, ne povis riski sian karieron kaj membrecon en la partio, kiu postulis disciplinon kaj subigon al la ordonoj de CK. Li estis kaj interlingvisto kaj e-isto. Kaj li estis gvidanto de postdiplomaj studoj kaj doktorigaj disertacioj pri interlingvistiko por Dina Lukjanec, Boris Kolker kaj Leonid Mjasnikov. Jes, lia interlingvistika agado, inkluzive publikigon de interlingvistikaj artikolaroj, estis utila.

Mi iom legis la ruslingvajn librojn de Isaev pri soveta lingvopolitiko, kiujn mi konsideras tro ideologiecaj, sed tamen por la tiama fakdiskuto en Sovetunio verŝajne parte interesaj. Eblas diri, ke ili apartenas al la historio. Kiam mi staĝis en 1988–89 en Moskvo ĉe Instituto de Lingvoscienco por okupiĝi pri mia universitata diplomverko, fakte neniam okazis persona renkontiĝo kun Isaev, sed ial mi ankaŭ ne aparte serĉis tian kontakton, havante sufiĉajn rilatojn kun aliaj sovetaj e-istoj. Mia scienca ‘patro’ en Sovetunio tiam estis S.N. Kuznecov, kies personeco min impresis kaj kies lingvistikaj verkoj estas rimarkinde liberaj aŭ puraj de ideologia balasto. Bedaŭrinde liaj libroj aperis en terure malbonkvalita tipografio, dum la broŝuroj kun la banalaj paroloj de Breĵnev ricevis bonkvalitan tipografion.

Kolker: Multaj e-istoj ne fidis Isaevon, ĉar ili opiniis lin oficialulo, kiu plenumas ordonojn de supre. Eĉ pli lin malfidis SSOD-anoj, opiniante lin tro esperantisma, subtenanta e-istojn. SSOD-anoj eĉ intencis forigi lin el la posteno de prezidanto. Ĉar tiun postenon devis okupi persono kun socia graveco, ili pensis pri profesoro Viktor Grigorjev. Tamen Grigorjev malakcep-



Statuetoj de SPEGULO

Dum sia kunsido en Krakovo, okazinta la 10^{an} de majo, la redakcio decidis aljuĝi sian premion – la statuetojn de SPEGULO al kelkaj eminentaj esperantistoj. Ni skribis pri tio en la 2^a kajero de SPEGULO. Apude – la specimeno de statueto.

Kvizoj

Gajnintoj de la libro-premioj, kiuj sendis al ni respondojn al la sekva kvizo, aperinta en la 2^a kajero de SPEGULO, estas: Mirosława KUBICKA (PL), Anne Jausions (FR), Dorota Burchardt (PL). Gratulon al ĉiuj sendintoj!

tis tiun ideon, ĉar li ne ŝatus 'ludi' kun oficialuloj. Ili ne sciis, ke Grigorjev estis homo principa kaj ne permesus, ke oni manipulu lin.

Tre interesa nuancigo, kiu klarigas la komplikajn rilatojn inter la diversaj Eo-roluloj kaj la sistemo. En sia memuara rakonto, menciita supre, Isaev rakontis ankaŭ, ke li devis verki iun raporton por la scienca fako de la CK de KPSU, kiu ŝajne trafis ankaŭ la personan atenton de Andropov. La reago de la KŜS-estro estis eĉ pozitiva al tiu raporto, kio poste ŝajne favore influis la fondon de ASE.

Kolker: Mi vere ne scias, ĉu Andropov havis iun rilaton al ASE aŭ al ties fondo.

Efektive en iu protokolo de la sekretario de CK KPSU el la jaro 1978 (kaj publikigita en la libro de Samodaj, p. 153–156), kiu havis la statuson kiel „absolute sekreta” kaj kiu enkondukis la fandan procezon de ASE, kiel unu el la ĉefaj taskoj de la nova asocio estis difinita jena celo: „efektivigi kontrolon pri la agado de rondetoj kaj aliaj organizaj formoj de sovetiaj esperantistoj”. La disvastigo de Eo kiel celo ne estis difinita, sed almenaŭ fiksita „helpi la lernantojn de Eo en disponigo de ejoj, eldonado de lerniloj kaj alia literaturo en Eo, kaj ankaŭ okazigo de seminarioj ktp.” Aliaj celoj estis „altigi la politikan nivelon de ilia laboro, eduki ĉe la sovetiaj e-istoj sentojn de patriotismo kaj internaciismo, de senkompromisa rilato al la burĝa ideologio; uzi la e-istan movadon por informa propaganda laboro” ktp.

Sed revene al ASE: kiujn ĉefajn interesojn do havis la estraranoj de ASE? (pro-

fesiaj, sciencaj, aliaj?)

Kolker: Nu, duono (aŭ pli?) de la estraranoj de ASE estis neesperantistoj (eble iuj eĉ kontraŭ-esperantistoj). Ilia intereso estis plenumi ordonojn de siaj estroj por bremsadi la Eo-movadon. Isaev, Samodaj, Zubkov, Perevalov kaj mi en ASE havis movadajn interesojn, sed ne ĉio de ili aŭ ni dependis.

Kiel pritaksi la kontribuon de Evgenij Bokarjov, Semjon Podkaminer? Ĉu Bokarjov interesiĝis esence pri lingvistiko, dum Podkaminer ankaŭ pri historio kaj ideologio?

Kolker: Bokarjov estis konvinkita e-isto, saĝa interlingvisto kaj aŭtoritata lingvisto. Podkaminer estis aktiva aganto, sed tro politikema. Por mi estis surprize, kial li, kiu pritaksis UEA-n kontraŭsoveta organizo, povis fariĝi honora membro de UEA.

Gonĉarov: Bokarjov estis vera kaj altnivela sciencisto. Li interesiĝis esence pri lingvistiko kaj pri ĉio cetera esperantisma li volis nur helpi, vidante kiel suferas la esperantismo sub la soveta potenco. Podkaminer estis ekskolone-lo kaj socie aktiva personeco. Li estis tute amatora lingvisto, sed tre aktiva pacbatalanto, kaj en kaj ekster la Eo-movado. Li helpis al KŜS-anoj, sed laŭ mia opinio ankaŭ gardante interesojn de Eo kaj e-istoj. Kaj ambaŭ estis fundaj e-istoj.

La honorigo de meritoplenaj membroj el komunismaj landoj, kies eventuala politika rolo estas suspektata, fare de UEA laŭ mi estas iom tikla afero. Sed ne estas la loko diskuti tion ĉi tie. Ĉi tiu problemoj estas la problemoj unuavice de UEA mem,

Tiel ni imagas ordinaran areston. [...] Ankoraŭ ĉi avantaĝon havas nokta arestado, ke nek la najbaraj domoj, nek la urbaj stratoj vidas, kiom da homoj oni forveturigis. La plej proksimaj najbaroj estis timigitaj, kaj tiuj malproksimaj ne kaptis ion per okuloj. Kvazaŭ nenio estus okazinta. Sur la sama asfalta vojo, laŭ kiu nokte hastis veturiloj kun arestitoj – *hundinoj* – dumtage paŝas gejunuloj kun standardoj kaj floroj, kantante serenajn kantojn.

[...] Ne, neniam ĉe ni estis malŝatata iu maniero de aresto, nek en hela tago, nek dum vojaĝo, nek en amaso da homoj. Ĉio okazas glate – kaj ĝuste tio estas miriga! – la viktimoj en sankta konkordo kun agentoj kondukas – se eble – plej afable, tiel ke la ceteraj eĉ ne turnu atenton al la pereigo de elektito.

[...] lafoje al homoj sur la pintaj ŝtupoj en la armeo aŭ partio oni donis novan oficon, haltigis salono-vagonon ĉe stacidomo, kaj poste arestis ilin dumvoje. Kaj simplan, grizan homon, kiu estis konsternita per amasarestado kaj de semajno afliktata per malfavoraj rigardoj de la superuloj – oni tuj vokis al la sidejo de loka sindikato, kie kun agrabla rideto iu donis forpermeson al sanatorio en Soĉi. Moliĝis la koro de la kuniklo – lia timo montriĝis senkaŭza! Do, li esprimis dankemon, triumfe li revenis hejmen, por enpaki siajn aĵojn. La trajno forveturos post du horoj, do li skoldas la edzinon pro malrapidemo. Finfine li venis al la stacidomo! Li ankoraŭ havas iom da tempo. En la atendejo aŭ ĉe la kiosko kun biero, salute klinis la kapon iu agrablega junulo: „Vi ne rekonas min, Petro Ivaniĉ?” Petro Ivaniĉ hezitas dum momento: „Ŝajne ne... Kvankam...” El la junulo ŝprucas frata simpatio: „Ho, ne!... ĉu vere?... mi rememorigos ĉion al vi...” – kun estimo li riverencas antaŭ la edzino de Petro Ivaniĉ: „Bonvolu pardoni, sinjorino, mi kun via edzo nur por minuteto...”. La edzino havas nenion kontraŭ la propono, kaj la nekonato – konfide tenante Petron Ivaniĉon ĉe la brako – forkondukas lin: por ĉiam aŭ por dek jaroj.

Kaj la stacidomo turniĝas ĉirkaŭe kaj vidas nenion... Civitanoj vojaĝantoj! Ne forgesu, ke en ĉiu pli granda stacidomo estas la posteno de GPU kaj kelkaj ĉeloj por malliberuloj.

[...] Oni devas tamen esprimi meritoplenan rekonon al la ORGANOJ: dum la hodiaŭaj paroladoj kaj teatraĵoj ŝajnas – kiel vestoj por virinoj – kvazaŭ elirintaj el sub unu ŝtanco, arestoj estas plej diversaj. [...] lafoje aresto prezentiĝas kiel ludo – necesas tiom da superflua inventemo kaj sata energio, ke la viktimo ne montru ian reziston. [...] Kompreneble, ĉiu maŝino havas propran tralaseblon, ĝi ne englutos pli multe ol ĝi povas. Dum la jaroj 1945–1946, krevantaj pro superabundo, kiam unu post alia ruliĝis vagonaroj for de Eŭropo kaj oni devis ĉiujn engluti kaj sendi al GULag – ne plu estis loko por tiu luksa amuzo, la teorio vidinde ŝanĝis haŭton, elfalis ritaj plumoj kaj malliberigo por dekoj da miloj da homoj okazis kiel dum mizerega apelo: moŝtuloj staras kun listoj – ili vokas personojn el unu vagonaro kaj pelas en la alian... jen ĉio.

[...] „Kie estas rezisto? Kial vi ne rezistis?” – al la viktimoj riproĉas nun tiuj, kiujn oni lasis en kvieto. Ho, jes, la rezisto devus komenciĝi tuj, ekde la aresto mem.

Sed, ĝi ne komenciĝis.

volvaĵon, kaj post la dorso brufermiĝas por ĉiam la pordeto – la pordeto al nia pasinta vivo.

Jen ĉio. Vi estas arestita.

Kaj nenion vi kapablas elpensi responde krom ŝafida bleko:

– Miii??? Pro kio???

[...] Jen ĉio. Kaj nenion pli vi povas kompreni – nek dum la unua horo, eĉ ne dum la unua tago-nokto.

Ankoraŭ en via despero brilos la cirka, papera luno: „Eraro! Ili komprenos tuj!”

[...] Ĉe tradicia aresto – oni ankoraŭ kolektas per la tremantaj manoj la necesan al la kaptito: personan tolaĵon, sapopecon, ion por manĝi kaj neniu scias: kion li bezonos, kion ili permesas, kiu vesto estos plej taŭga, kaj la agentoj urĝas kaj malhelpas: „Nenion li bezonos. Tie ili manĝigos lin. Tie estas varme”. (Ĉio estas mensogo. Kaj ili urĝas – por timigi).

Ĉe tradicia aresto – ankoraŭ poste, kiam oni forprenis la kompatindulon – dum multaj horoj, en la loĝejo, mastrumas brutala, fremda potenco. Okazas elrompado, elŝirado, demetado kaj dekrado de la muroj, elĵetado sur la plankon el la ŝrankoj kaj tirkesto, elskuado, disŝutado kaj disbatado – kaj montoj da fatraso sur la planko kaj grincado sub la plandumoj. Kaj nenio sankta dum revizio! Ĉe la aresto de maŝinisto Inoŝin en la ĉambro troviĝis la ĉerketo kun lia ĵus mortinta infano. La leĝo-gardistoj elĵetis la infanon el la ĉerketo, tie ili ankaŭ serĉegis. [...]

Kaj dum revizio nenio povas esti rekonita kiel bagatelo! Ĉe historiisto-amatoro Ĉetveruĥin oni forprenis „tiom kaj tiom da rulaĵoj kun caraj dekretoj” – nome la dekreton pri la fino de la milito kontraŭ Napoleono, pri la Sankta Alianco kaj la tekston de la litanio kontraŭ ĥolero en 1830. Ĉe nia plej bona konanto de Tibeto, Vostrikov, estis konfiskitaj treege valoraj, antikvaj tibetaj manuskriptoj (lernantoj de la mortinto savis ĉion el la abismo de KGB nur 30 jarojn poste). Ĉe la aresto de orientalista Nevskij oni forprenis tunguzajn manuskriptojn (kaj 25 jarojn poste kontraŭ deĉifrado la mortinta Nevskij ricevis la Leninan Premion). Ĉe Karger oni havis la arĥivon de jenisejaj ostjako, estis malpermesita la uzado de la aboco kaj abocolibro, kiujn li prilaboris – kaj tial la tuta popolo devas vivi sen propra literaturo.

[...] Kaj por tiuj, kiuj restas hejme – longa vico da ruinigitaĵoj, detruitaj tagoj. Kaj iliaj klopedoj transdoni paketojn. Sed tra ĉiuj fenestretoj aŭdiĝas nur blekado: „Li ne troviĝas en la registro”, „li ne estas ĉi tie!” Kaj antaŭ proksimiĝo al la fenestreto, ĉiuj devis – kiel en Lenigrado, en malbona horo, kvin tagojn kaj noktojn premiĝi en la atendovico. Kaj eble nur post duona aŭ unu jaro la arestito mem skribos – aŭ ili diros al vi: „Sen rajto pri korespondado” – kaj tio certe signifas, ke li estis pafita.

Mallonge dirite – „ni vivas en la teruraj kondiĉoj, en kiuj homo perdiĝas sen spure kaj liaj proksimuloj, edzino kaj patrino... ne scias dum jaroj, kio okazis al li”. Ĉu estas la vero? Kaj eble ne? Skribis tion Lenin en 1910, en sia nekrologo por Babuŝkin. Oni devas nur diri klare: Babuŝkin transportis armilojn por ribelo kaj tial li estis pafita. Li scias, kion li riskas. Ne eblas diri tiel pri ni, povraj kunikloj.

de la koncernataj honoritoj kaj de la koncernaj Landaj Asocioj. Ankaŭ nia intervjuo servu kiel kontribuo prilabori la historian pasintecon por formuli la praktikson pri la pasintaj eventoj el hodiaŭa perspektivo.

ESPERANTO EN LA REGIONOJ

Parolante pri regionoj, jena demando: En la provinco de Sovetunio ekzistis sufiĉe multaj Eo-klubo, kiuj laŭ la bulteno ‘Informacinnij Bjulleten’ estis aligitaj al ASE? Kion eblas diri ĝenerale kaj principe pri la agado de tiuj lokaj societoj? Ĉu ASE havis la taskon kontroli la agadon de tiuj kluboj?

Gonĉarov: ASE estis duvizaĝa. La unua vizaĝo – SSOD-aj funkciuloj certe dezirus kontroli ĉion kaj ĉiam. La Eo-parto de la estraro dezirus kontroli la provincajn Eo-klubo en la senco de helpo kaj analizo k.s. Sed jam ne ekzistis strukturo SEJM-a, kie ĉio tio funkciis pere de ĉiujaraj konferencoj (tute demokratiaj, kaj kia demokratio estis kompare kun patroneco de SSOD?) kaj Eo-lingvaj samizdataj informiloj, sed la ASE-bulteno jam estis kontrolata de SSOD kaj ne absolute ĉion oni povis tie libere skribi.

Jes, kompreneble, sed ekzemple en n-ro 6-7/1982 aperis artikolo de Detlev Blanke pri la historio de SEU kun listigo de la persekutitaj esperantistoj en 1937-39, sed nature sen mencio de tiu fakto, kiu estis tabuo.

Cetere, kiam en Moskvo siatempe oni kaŝe transdonis al mi tutan kolekton de la bulteno ‘Informacinnij Bjulleten’ de ASE, oni avertis min ke temas pri

publikaĵo, kiu ne estas destinita por eksterlando. En tio ĝi ja strange estis la inverso de samizdato. Do okaze de kontrolo ĉe la landlimo necesis atenti, ke la bulteno ne estu malkovrita. Ĝis hodiaŭ mi gardas la numerojn de tiu legendeca bulteno kiel eta trezoro en mia biblioteko.

Ĉu eblas kompari la trajtojn kaj la programon de tiuj provincaj sekcioj kun iuj moskvaj Eo-klubo, ekzemple tiu de A. Gonĉarov (‘Leo Tolstoj’)? Kiujn problemojn havis tiuj kluboj? Kio pri la lingvouzado?

Kolker: La lokaj Eo-klubo estis diversaj laŭ grandeco, aktiveco kaj forteco. Ili ne tre dependis de la ASE-estraro. La plimulto de ili funkciis sufiĉe bone, havis bonajn kontaktojn kun lokaj oficialuloj kaj redakcioj de gazetoj. En la kunvenoj oni parolis precipe en Eo. Ankaŭ problemoj ekzistis – jen pri kunvenejo, jen pri nesufiĉa intereso surloke de eksteruloj, ktp.

Gonĉarov: La provincaj kluboj havis mankon de demokratiaj informoj pri ĉio okazanta en soveta Esperantio. La ASE-bulteno ne pri ĉio informis. La trajtoj de la lokaj Eo-klubo jam diferencis de tiuj de SEJM, kie okazis homa komuneco kaj kunamikeco. Ĉi tiu temo ankoraŭ ne estas sufiĉe bone elplorita, pro tio malfacilas al mi nun esprimi min pri ĝi en kelkaj frazoj. Fakte ne eblas kompari la provincajn klubojn kaj la moskvajn. Dum la SEJM-a periodo la moskva Eo-agado estis neelstare aktiva. La situacio ŝanĝiĝis nur kun mia ekdeziro en 1987 lasi la lastan karieron (sciencan) kaj plene dediĉi min al la Eo-laboro. Kun la helpo de Zinovij Kurolap mi trovis Domon de Kulturo (apud la metro-haltejo Kropotkinskaja), kiu konsentis okazigi re-

gulan Eo-instruadon. Tiel rapide aperis la Eo-klubo 'Lev Tolstoj', kiu fakte plene dependis de mia vervo.

Koncerne la lingvouzadon en tiuj kluboj eblas diri, ke la Eo-societoj, kiuj venis el la SEJM-tradicio, nepre ne uzis la rusan lingvon, ĉar ili al kutimiĝis al Eo kiel sia dua propra lingvo (krom iom da esceptoj). Se temas pri la societoj fonditaj dum la ASE-periodo, pluraj el ili uzis ofte la rusan lingvon kaj lame Eon.

Mi bone memoras vian elstaran agadon kadre de la Eo-klubo 'Lev Tolstoj', kie en 1988–89 mi havis la okazon iom partopreni en la programo kaj konstrui kontaktojn kun rusaj e-istoj, kiuj ekzistas varmaj ĝis nun. Ĉi tiu movada sperto en Moskvo estis ankaŭ por mi tre unika.

Gonĉarov: Tiu moskva klubo estis escepto. Kun granda bedaŭro mi konstatas, ke ofte en Esperantio aferoj dependas de iuj apartaj homoj, sed ne de la afero mem.

KONTAKTOJ KUN EKSTERLANDO

Ĉu sovetiaj e-istoj, kiuj povis veturi al Eo-kongresoj en eksterlando, precipe okcidenta, havis iujn KŜS-funkciojn rilate la grupon, kiun ili gvidis aŭ akompanis? Se jes kiel konkretaj estis tiuj funkcioj? Kaj kiam vi povis ekvojaĝi?

Kolker: Estas malfacile scii tion. Sed ofte en la delegacioj kaj turistaj grupoj troviĝis iuj enigmaj kaj neparolemaj personoj, kiuj ne parolis Eon kaj kiuj prezentigis kiel laborantoj de SSOD (eble tiaj ili ne estis). En 1963 sovetianoj unuafoje partoprenis en UK, en tiu en Sofio. Mi bonŝancis esti inter la 35 feliĉuloj (kaj estis preskaŭ


la plej juna). Tiam mi ekhavis multajn internaciajn kontaktojn, ekzemple, mi konatiĝis tie kun Humphrey Tonkin, kiu igis min aĉeti la provnumeron de 'Kontaktto'. Dum pluraj jaroj SSOD sendis oficialan tri-personan delegacion al UK, por kiu pagis la ŝtato. Mi bonŝancis trafi UK-on sekvafoje nur en 1978 en Varna. Kompreneble, miajn vojaĝojn mi pagis mem kaj estis tute feliĉa, ke mi havas eblon partopreni la kongresojn. Mi estis en la okcidenteŭropaj UKoj en 1979 (Lucerno) kaj 1982 (Antverpeno) – nu mi estis tiam prezidiano de ASE. Sed la afero, certe, estis nesimpla. Post la UK en Budapeŝto (1983) mi ne plu havis eblon veturi eksterlanden pro mia fifama recenzo pri la israela libro (vd. plej lastan demandon sube). Miaj sekvaj UKoj estis en 1990 (Havano) kaj 1992 (Vieno); ASE tiam ne plu ekzistis, regis la perestrojko kaj ioma libero.

En Lucerno 1979 mi estis ĵus aliĝinta al la Eo-movado kaj helpis al la gazeta-servo. Mi do tre ĝojas, ke Boris Kolker vidis mian belan naskiĝurbon. En 1982 mi memoras, ke Boris Kolker kaj mi kune sidis en la solena inaŭguro kaj interkonatiĝis.

Gonĉarov: Mi pensas, ke iuj e-istoj ankaŭ en la ASE-periodo transdonis informojn al KŜS, sed kutime tamen gardante Eo-interesojn. La grupojn eksterlanden ĉiam gvidis nur SSOD-funkciuloj, jamaj/iamaĵ KŜS-anoj. Ilia tasko estis ĉefe, ke la membroj de la grupo ĉiam restu kune, sub observo, kaj ke ili ne iru ien ajn memstare ktp.

Cibulevskij notis en sia broŝuro pri SEJM, p. 87, ke veturi eksterlanden estis

Aleksandr Solĉenicin
ĉerpaĵo el Arkipelago GULag



Aresto

Kiel veni al tiu mistera Arkipelago? En ĉiuj tagopartoj flugas tien aviadiloj, rapidas ŝipoj, radobruas vagonaroj – sed neniu tabulo sur ili montras, kien ili veturas. La kasistoj en stacidomoj kaj la oficistoj de la agentejoj Sovturist kaj Inturist miregos, se vi petos tian bileton. Neniun Arkipelagon ĝenerale kaj neniun el ĝiaj multnombraj insuletoj ili konas, ili aŭdis pri nenio.

Tiuj, kiuj veturas al la Arkipelago, por regadi super ĝi – alvenas tien el la lernejoj de la Ministerio pri Internaj Aferoj.

Tiuj, kiuj veturas, por gardi la Arkipelagon – estas tien sendataj de rekrutaj komisionoj kiel soldatoj.

Kaj tiuj, kiuj veturas tien por morti kiel ni, leganto, ili alvenas grandparte kaj devige – per aresto!!! Ĉu mi diru, ke estas la momento, kiu rompas vian tutan vivon? Ke estas la tondro, kiu faligas? La nekredbla psika ŝoko, al kiu neniu povas al kutimiĝi kaj ofte ekfrenezas?

La universo havas ĝuste tiom da centraj punktoj, kiom da vivantoj troviĝas en ĝi. Ĉiu homo estas akso de la mondo kaj la mondo disfalas en pecojn, kiam li aŭdas siblon: „Vi estas arestita!”

Se vi jam estas arestita – ĉu io konserviĝis post tiu ĉi tertremo?

Tamen ne kapablaj per subite konfuzita menso imagi la dimensiojn de la ŝanĝo la plej sagacaj, kaj ankaŭ la plej naivaj el vi ne scias tiam, kiel elpreni el sia provizo da personaj spertoj pli multe ol tiujn ĉi vortojn:

Mi?! Pro kio?!

Ĉi tiu demando estis milionfoje prezentata kaj neniam ĝisatendis respondon.

Aresto – estas subita kaj konsterna transĵeto, transigo, transsalto – el la propra vivo en la vivon alian.

Laŭ la longa kaj kurba strato de nia vivo ni hastis feliĉaj, aŭ malgajaj ni tiris la piedojn laŭ bariloj el putrantaj tabuloj, seka argilo, laŭ muroj el brikoj, betono kaj ŝtalo. Ni ne pensis – kio sin kaŝas malantaŭ ili? Nek rigarde, nek pense ni klopodis trapenetri ilin – kaj ĝuste tie komenciĝis la lando de GULag, nur tuŝi per mano, du metrojn for de ĉi tie. Krome ni ne vidis en ĉi tiuj bariloj amasegon da senfende fermitaj, bone maskitaj pordegoj, pordetoj. Ĉiuj tiuj pordetoj atendis nin! – kaj rapide malfermiĝis iu – tiu fatala, kaj kvar blankaj, viraj manoj, ne raspaj de laboro, sed kapto-lertaj, alkroĉiĝas al piedo, mano, kolumo, ĉapo, orelo – ili posttiras la

kaj la forigon de la totalismo en Ruslando. Jes prave.

Okaze de la publika prezentado de la morta korpo de Solĵenin en la Akademio de Sciencoj alkuris ĉefministro Putin, Gorbaĉov, Primakov kaj aliaj. Dum la entombiga ceremonio kun paniĥido** laŭ la rusortodoksa rito, kiu per la deziro de la forpasinto okazis en la Donskoj-monaĥejo en Moskvo, aperis Medvedev persone por kondolenci la familion. La rusa prezidento subskribis ankaŭ la dekreton pri stratabapto laŭ la nomo de Solĵenin. Speco de ŝtata funebra ceremonio tie okazis, kun armeaj gardistoj kaj tri salutpafoj honore al la mortinto. Ankaŭ Jurij Luŝkov, urbestro de Moskvo, honoris la mondfaman verkiston kiel „fortan, eksterordinaran homon”. La rumana prezidento Traian Bănescu komunikis, ke Rumanio aljuĝos al la mortinto por ties „kuraĝo kaj digno” la nacian ordonon. En la ĉeesto de kelkcent partoprenantoj, interalie socie konataj figuroj, la entombigo estis televidigita en la tuta Ruslando. Hazarde aŭ ne, la tombo de Solĵenin troviĝas apud tiu de la historiisto Vasilij Kljuĉevskij (1841–1911).

La kritika voĉo de iu ĉeestanto, kiu mesaĝis, ke dum la vivo de Solĵenin la ŝtato nenion faris por li, estas interesa. En sia tuta vivo la disidentulo celis eviti ricevi ‘aŭspicion’ de iu ajn politiko aŭ politikisto. Li komprenis sin artisto, ne politikisto.

Konklude kaj honore

La komunaj trajtoj de Jurij Rytcheu, Ĉingiz Ajtmatov kaj Aleksandr Solĵenin estis ilia senlaca lukto kontraŭ la maljusto, kreita de absurdaj ideolo-

gioj; Solĵenin, la „netuŝebla animo”, la „plej lasta profeto”, kiel oni nomis lin, estis la plej radikala kaj senkompromisa el ili, kaj pro tio li suferis plej multe kaj plej longe, dum la aliaj ĝuadis iujn privilegiojn, eble por atingi ion, kion Solĵenin ne povis atingi. Ili ĉiuj defendis ‘siajn’ minoritatojn, kiuj riskis esti detruitaj de la tro potenca, kruela, brutala, senhoma ŝtato: Rytcheu ‘siajn’ ĉukĉojn, Ajtmatov ‘siajn’ kirgizojn kaj eble aliajn, Solĵenin ‘siajn’ gulaganojn. Stalin estis ilia komuna koŝmaro; ilia propra persekutado aŭ la persekutado de iliaj parencoj far la stalinismo estis ilia komuna sorto. Ilin eble diferencis la geografio – la unua devenis el nordorienta Siberio, la dua el meza Azio, la tria el suda Ruslando, sed ĉiuj tri estis profunde sovetiaj homoj, kun ĉiuj fortoj kaj malfortoj. Ĉiuj tri havis sufiĉe rektajn kontaktojn kun Okcidento, ĉu devigajn, ĉu libervolajn, eĉ pasigante tie parton de sia vivo, kaj ili rilatis ankaŭ kun Svislando. Spite al ĉia fameco kaj moralo, la tri verkistoj restos ambivalencaj kaj kontestataj fenomenuloj, kiujn oni devas nek gloregi, nek kondamni, sed diference analizi.

La homaro perdis ĉijare tri nekutimajn kaj elstarajn literaturistojn kun gravaj mesaĝoj de eterna monda signifo. Ŝajnas, ke krom iuj sensignifaj esceptoj bedaŭrinde neniom el iliaj gravaj verkoj estis tradukitaj al Esperanto.

Piednotoj:

* rajono: teritoria subunuo kiel parto de distrikto.

** paniĥido: nocio mankas en PIV. Kutimo ĉe la ortodoksa eklezio okaze de la morto de homo.

ne pli facile, ol fariĝi laŭreato de Nobel-premio. Kaj samloke li ne maltrafas la okazon tamen laŭdi SSOD-on respektive ties Eo-Komisionon fonditan en 1962, kiu – „malgraŭ ĉiuj siaj negativaj flankoj” – kontribuis al la efektivigo de eksterlandaj veturoj.

SUFIĈAS LA MALHELPOJ!

Kial la e-istoj deklaris la „laboron de ASE nekontentiga” en rezolucio proklamita okaze de la SEU-restarigo en 1989? Kiuj estis la ĉefaj riproĉoj al ASE?

Kolker: Ni estis sataj pri konstanta bremsado kaj malhelpado flanke de SSOD, eĉ persekuto de iuj aktivuloj. SSOD-anoj sentis sin mastroj de ASE kaj faradis kun ĝi kion ajn ili volis. Kiam venis la tempo de perestrojko, ni uzis la favoran momenton por deklari nin sendependaj. La oficialaj protektantoj (SSOD, CK VLKSM de Komsomolo, VCSPS – Konsilio de Profesiaj sindikatoj) estis ŝokitaj kaj ĉiel kontraŭis tion dum la lasta ASE-kongreso. Kontraŭstatute la kongresoj de SEU ne okazis. Oni kontraŭis registriĝon de SEU kiel jura personeco.

Gonĉarov: Mi ne plu bone memoras la tiamajn eventojn (en 1991 mi translokiĝis de Moskvo Siberion), sed mi povas nur supozi, ke pluraj komparis la ASE-laboron kun la (ankoraŭ freŝmemora) SEJM-laboro, kaj venis al la konkludo, ke la rezultoj estis draste malsamaj.

Mi mem vigle memoras tiun emociplenan konferencon en Moskvo, dum kiu SEU estis restarigita, printempo 1989. Antaŭe, en decembro 1988, mi havis

la okazon dum vizito de la tiama litova sovetrespubliko ĉeesti la refondon de Litova Esperanto-Asocio en Kaunas. La nepridubbla dezirego de la baltaj respublikoj forlasi Sovetunion estis kompreneble forte sentebla.

LA ‘JUDA DEMANDO’

Plej lasta temo, kiun mi ŝatus trakti en tiu ĉi intervjuo: En la sovetia Eo-movado aperis kelkaj juddevenaj samideanoj (krom Armand, Podkaminer, Kolker, Bronŝtejn, Zajdman Aroloviĉ ankaŭ Giŝpling, Cejtin, Ĥarĵkovskij, Vulfoviĉ, Kurolap, Ŝljafer, Fejgin, Lineckij, Vajnblat k.a.), kiuj ludis gvidan aŭ aktivan rolon. Proporcie judoj eble eĉ estis en la sovetia Eo-movado pli multaj kompare kun la ceteraj etnoj aŭ identecoj – kio cetere estas frapa paralelo kompare kun la proporcio de judoj ludintaj rolon en la sovetia revolucio de 1917 kaj poste en la lenina-stalina administracio dum la 20^{aj} jaroj! En la 60^{aj} jaroj komplikiĝis la ‘juda demando’ en Sovetunio, antisemitismaj kaj kontraŭcionismaj tendencoj fortiĝis lige kun la kontraŭisraela politiko de Moskvo. Pro la politike malfavoraj tempoj, la variebla ĝis necerta situacio de la labormerkato kaj entute pro la mankantaj vivperspektivoj en Sovetunio, la plimulto de la judoj strebis forlasi la landon. Komence nur relative malmultaj judoj povis foriri el Sovetunio, sole 3500 inter 1966 kaj 1967, 13 000 en 1970. La kulmino de la juda elmigrado el Sovetunio estis atingita en 1990 per 225 000 elmigroj. Ĝis 1993 formigris unu miliono da judoj el eksa Sovetunio. Vivi kiel judo en Sovetunio do estis malfacile, oni preferis elmigri ĉefe al Israelo aŭ Usono.

Esti judo en Sovetunio estis malfacila afero. Pro tio la judeco de e-istoj ne ludis rolon aŭ ne povis ludi rolon en Sovetunio (kaj en aliaj socialismaj landoj) kaj estis la privata afero de la koncernitoj (ekzistis ja ankaŭ diversaj tipoj aŭ gradoj de judoj resp. de judeco). Por ne kompromiti Eon, oni preferis silenti pri judaj aspektoj en tiu movado, kiel tabuo. Kiel vi mem speritis la 'judan demandon', kiu ja ankaŭ estas ligita kun Zamenhof, kreinto de Eo?

Gončarov: En SEJM, laŭ mi, absolute ne ekzistis odoro de antisemitismo. Kvinono inter miaj amikoj mem estis hebreoj/judoj. Sekve la judismo havas nenian rilaton al SEJM kaj eĉ al ASE kaj al la tuta Eo-movado sovetia. Preskaŭ ĉiuj sovetiaj e-istoj estis internaciistoj.

Tio tamen estas io alia ol „mondaj imperiistoj” aŭ „cionistoj”, kiel ‘kamarado’ Berjoza emis denunci la e-istojn... Tamen, la fakto, ke en la cerbo de tia funkciulo ekzistas tiu terminologio, montras, ke io ajn ligita kun esperantismo povis esti facile denunciata kiel ‘cionista’ aŭ kiel ‘kosmopolita’ (en negativa, reakcia senco) kiel dum la stalinisma tempo.

Kolker: Primia maleblo fariĝi membro de KPSU, supozeble ĉar mi estas judo, mi parolis antaŭe. Kiel mi rakontis en la bulteno ‘Ĉerbe kaj kore’, en 1992, okazis jena incidento, simptoma por la tiama politika praktiko: Skandalon kaŭzis en 1984 mia recenzo pri libro aperinta en Israelo, en la revuo ‘Esperanto’ de UEA. Eĉ pli embarase por la sovetia flanko estis, ke tiu artikolo aperis samnumere kun recenzo de Ulrich Lins pri la libro ‘7000 tagoj en Siberio’ de Karlo Ŝtajner, en kiu ĝia aŭtoro priskribis sian vivon en la sovetlandaj koncentrejoj. Fakte tio

estis interpretita kiel kontraŭsovetia fi-provoko flanke de UEA kaj de mi mem. Ha! Tiu aŭdaco mencii aŭ eĉ iom laŭdi libron aperintan en Israelo, denunciata de la moskva e-isto Perevalov, kostis al Ŝanina kaj Isaev, SSOD-funkciulino kaj ASE-prezidanto, kiuj estis forte mallaŭdataj de la potenca vicprezidanto de SSOD, Peslak, preskaŭ ilian partian membrokarton (la riproĉoj estis, ke ili ne observis la „ordon” en ASE kaj ne povis eviti tian publikigon) kaj krome la decidon forigi min el la prezidio de ASE. (Ĉi tiun epizodon oni povas legi ankaŭ en la libro de Samodaj, p. 159–60). Formale, mia ekziĝo el la Prezidio (ne el la Estraro) de ASE okazis laŭ mia peto, pro mia granda okupiteco. Kvankam mi havis vastan moralan subtenon de sovetiaj e-istoj, mi konsentis al tiu kompromiso, ĉar alie SSOD malheplus al defendo de mia doktriga disertacio pri esperantologia temo. Kelkajn monatojn antaŭ la likvidiĝo de ASE, la Estraro elektis min prezidiano kaj vicprezidanto de ASE (sur la lokon de la forpasinta Podkaminer). La recenzo mem de Lins, kiu kaŭzis „insulton al Stalin”, estis interpretita tiel, ke la planita aliĝo de ASE al UEA fiaskis. Intertempe Sovetunio, KPSU, SSOD kaj ASE kolapsis, kaj en 1990 la grava moskva eldonejo Progreso republikigis la libron ‘La danĝera lingvo’ de Lins en Eo kaj eldonis ĝin ankaŭ en rusa traduko, en kiu 350 paĝoj estas dediĉitaj al la situacio kaj persekutoj de e-istoj en Sovetunio...

Kaj la judeco de Zamenhof ĉiukaze restis tikla afero, ĉu ne?

Kolker: Certe, la e-istoj (kon)sciis pri la judeco de Zamenhof, sed kial emfazi

dindaj anakronismaj komentoj tedis la homojn. Nature sekvis la aljuĝo de plej diversaj ruslandaj premioj, kaj la verkisto mem disdonis premiojn je la propra nomo al iuj de li elektitaj verkistoj, kiuj meritis lian laŭdon. De Putin, unu plia obskura figuro de la rusa historio, kiu vizitis lin en lia hejmo kaj kiu evidente montris simpatian al la granda rusa patrioto, li konsentis akcepti la Ŝtatan Premion de la Ruslanda Federacio, aljuĝitan al li laŭ propono de „eksperta grupo de elstaraj rusaj sciencistoj kaj kulturagantoj”. Pri Putin la premiito ciniĝis diri, ke malgraŭ sia pasinteco kiel KŖS-oficiro li almenaŭ ne estis komandanto en la gulago.

Jam de jaroj Solĵenin ne plu akceptadis ĵurnalistojn. Pro la ‘amikeco’ kun Augstein li konsentis fari la escepton: en la jaro 2007 la verkisto renkontiĝis kun du ĵurnalistoj de *Spiegel*, kiuj sukcesis fari verŝajne la plej lastan intervjuon kun la verkista giganto, jam sidanta en la rulseĝo, kun la korpo malforta, laŭ aspekto kiel sanktulo vaksfigureca en ortodoksa ikono. En tiu intervjuo la verkisto konfesis interalie, ke li estas fervora kritikanto de la partia parlamentismo. Kiel infano de la spirita rigormo Solĵenin konsideris plurismon kiel ĝenon kaj aliajn opiniojn kiel pedagogian defion (Sonja Zekri, *Süddeutsche Zeitung*).

Nenian plaĉon trovis en Okcidento la plej lasta verko de Solĵenin pri la historio de la judoj en Ruslando *Ducent jarojn kune* (Dvesti let vmeste, 2001–2002). Tiu kontestata libro konfuzis la kritikantojn kaj postlasis strangan senton pri Solĵenin kiel debila antisemito. La provon de Solĵenin kulpigi

ĉefe „neruse pensantajn” popoltavolojn, precipe judojn, pro la bolŝevika tragedio de 1917, Leonid Luks konsideras fiaskinta en sia recenzo, ĉar lia libro havas laŭ li nenion komunan kun objektiva historia analizo. La konsternita verkisto Vladimir Vojnovič, ja agnoskante la fenomenon de Solĵenin en la rusa literaturo, nomis la verkon eĉ komplete „mensoga” kaj malatribuis al la verkisto ĉian senton pri demokrateco. De pluraj flankoj Solĵenin ricevis la konsilon ne ludi kun la fajro de la antisemitismo, por eviti la malserenigon de la entute pozitiva bildo pri si mem. Solĵenin ne sekvis la rekomendon. Sub la impreso de tiaj kritikoj li tamen iom prilaboris la duan volumon de sia prihistoria libro.

En 2005 ekprepariĝis, per la helpo de la Fondaĵo Aleksandr Solĵenin, la projekto eldoni lian verkaron en 30 volumoj ĉe rusa eldonejo.

Fino kaj morto

Luj eĉ komencis dubi, ĉu la verkaro de Solĵenin entute havas ian literatur-beletran valoron. Ĝenerale pri la verkaro de Solĵenin estas klare, ke Gennadij Zjuganov, la eterne hieraŭa ĉefo de la Komunista Partio de Rusio, pridubis ĝian objektivcon plene, sed tio estas alia afero. Antaŭ nelonge, la Komunista Partio de Sankt-Peterburgo eĉ kuraĝis postuli la sanktigon de Stalin kiel „patro de la popoloj” fare de la rus-ortodoksa eklezio. Pli groteska postulo ne ekzistas. Kontraste al tiu perspektivo, Arseni Roginskij, prezidanto de la civitanrajta organizaĵo Memorial, alte laŭdis la atingojn de Solĵenin rilate ellaboradon de la stalinisma pasinteco

Ĉar li ne ĉiam sentis sin sufiĉe komprenata de siaj iamaj samideanoj kaj de Okcidento, Solĵenicin evoluigis neracian venĝemon supozeble malnecesan kaj grandparte sensencan. Nature oni povas kaj rajtas diskuti pri la praveco aŭ ne rilate la dekadencan de Okcidento. Kiam dum sia vojaĝo tra Ruslando en 1994 Solĵenicin konstatis nesufiĉe grandan intereson pri sia persono kaj siaj komentoj, seniluziigante li kondamnis ankoraŭ la reston de sia amata Ruslando, kiu falis laŭ li en la manojn de la aĉaj kapitalistoj. Anstataŭ legi tre famajn librojn kaj moralpredikojn de Solĵenicin, la popolo preferis trivialajn romanojn el Usono. Lia libro *La falo de Ruslando* (Rossija v obvale), publikigita en 1998, estas emocia pamfleto pri la situacio en lando, en kiu la rusa popolo estas ĉie aĉe traktata, kiu pro la ekspluatado far la oligarkoj troviĝas rando de la nacia ruiniĝo kaj kiu stulte adoras la okcidentan civilizon. En la kazo de Ĉeĉenio temis pri etna purigo kontraŭ la rusa popolo far ĉecenaj banditoj kaj teroristoj.

En la sama jaro la Rusa Akademio de Sciencoj aljuĝis al li la Lomonosov-ormedalon.

Kiam NATO bombadis Serbion en 1999, la advokato de la ortodoksaj slavoj ekscitiĝis, riproĉante al la okcidentaj potencoj, ke oni celas „detruigi grandiozan eŭropan landon”.

Solĵenicin kredeble revis, laŭ maniero de la historiaj slavemuloj (ruse *slavjanofili*), pri ia utopia Ruslando kie regas la pura ortodoksa kredo kaj kie la demokratio estas realigata de sube. Supozeble la verkisto en sia rolo kiel moralapostolo malsanis je la sama nativeco, kiun li riproĉis al aliuloj en aliaj ri-

latoj. Pro tio li ne atingis la samnivelan reputacion de morala aŭtoritato kiel ĝin tutmonde ĝuadis ekzemple Andrej Saĥarov. Ĉi-lasto estis grava sciencisto eble iel komparebla kun Albert Einstein, dum Solĵenicin restis sur la aŭtodidakta nivelo de lerneja instruisto sen signifaj sciencaj atingoj, malgraŭ siaj nekontestablaj meritoj rilate la priskribon de la gulago. Kaj anstataŭ helpi aktive al la juna demokratio ekprosperi en la lando, kie la ŝtatprezidanto persone montriĝis malamiko de la libera parolo, Solĵenicin kapitulacis kiel elĉerpita disidentulo kaj moralapogis dubindajn politikajn kaj spiritajn tendencojn, simile al religia sekto, kun ksenofobiaj kaj rasismaj akcentoj.

Vivo apud Moskvo

Solĵenicin akceptis loĝi en ‘Sosnovka-2’ en la antaŭurbo Troice–Likovo, kiu estis disponigita laŭ aranĝo de Jelnin. La surlokan daĉon Solĵenicin transformis al iom luksa duetaĝa domo, kie troviĝis konvenaj ejoj kaj kie pendis la bildoj de Stolipin kaj Kolĉak. Laŭdire en tiu loko siatempe loĝis Lazar Kaganoviĉ (1893–1991), unu el la ĉefaj fiuloj de la neŭrozulo Stalin; laŭ alia fonto tie loĝis Miĥail Tuĥaĉevskij (1893–1937), kiu mem fariĝis viktimo de la stalinismo. Ĉi tie do la maljuniganta verkisto vivis, kvazaŭ sen kontaktoj kun la ekstera mondo, kun sia edzino Natalja Svetlova, kiu subtenis la famulon en la verkista laboro.

Sed jam meze de la 90^{aj} jaroj la publika intereso pri Solĵenicin ekmalardis. Estis aliaj tempoj. Lia iom malfeliĉa kaj truda enmiksiĝo pere de montrofingraj moral-konservemaj argumentoj kaj ri-

tion en siaj priesperantaj gazetartikoloj? La juda temo estis dum la sovetia tempo tikla afero kaj ne alportis ion pozitivan – male, ĝi povis alporti ion negativan – ĉiuokaze la mencio pri lia judeco estus forstrekita de redaktoroj aŭ cenzuristoj. Sed persone mi ne aŭdis iujn ajn parolojn aŭ aludojn de oficialuloj pri la judeco de Zamenhof.

Eĉ en ‘Enciklopedio de Esperanto’, aperinta en Hungario en 1933 (!), kaj en polaj aŭ bulgaraj verkaĵoj mankis indiko pri la judeco de Zamenhof. Tio evidente estis problemo por la tiulandaj e-istoj, kiuj devis faji laŭ la oficiala partia linio, kiu estis kontraŭ-israela; do oni preferis ĝin prisilenti. Sed en la 30^{aj} jaroj aperis, ekzemple en Pollando, laŭ la tiama ‘modo’, artikoloj pri Eo kun kontraŭjuda karaktero. Postmilite pri la judaj aspektoj de Zamenhof unuafoje pli profunde verkis precipe Holzhaus (Doktoro kaj lingvo Esperanto, Helsinko 1969) kaj Maimon (La kaŝita vivo de Zamenhof, Tokio 1978). Do, eĉ se Eo celis resti politike neŭtrala projekto, ne eblis eviti ĝian enplektadon en sufiĉe tiklajn politikajn aferojn.

Do indas kaj necesas fari iun konkludon el tiu intervjuo, kiu povus esti jena: Post la likvido de la sovetia Eo-movado en 1937–38 ĝi povis refunkcii nur ekde la mezo de la 50^{aj} jaroj per la eklaboro de Bokarjov kaj ties interlingvistikaj-esperantologiaj kolegoj. Iom poste aperis la junuloj kaj junulinoj de SEJM, kiuj agadis kadre de neoficiala organizaĵo. Por kontroli la kreskantan sovetian Eo-movadon estis fondita en 1979 ASE sub la patroneco de SSOD (kun kiu ekzistas jam formalaj rilatoj ekde la mezo de la 50^{aj} jaroj). Pro tio oni rezignis pri SEJM

malfondante ĝin favore al la establado de tutsovetia strukturo kun ASE ĉe la pinto. Sed baldaŭ iuj aktivuloj de la SEJM-periodo konstatis kaj kritikis pli kaj pli, ke ASE ne povas tro multe fari, ĉar SSOD, ne havante la intereson, ke Esperanto disvastiĝu tra Sovetunio kaj eĉ celante la inverson, bremsis la agadon de ASE. Kiam tio eblis, la seniluziigitaj sovetiaj esperantistoj likvidis ASE-n en 1989 por restarigi la antaŭmilitan SEU (Sovetrespublikaran Esperantistan Union). Kompare kun la Eo-movadoj en socialismaj landoj kiel ekzemple en Bulgario, kie la e-istoj, inter kiuj multaj devenis precipe el la antifaŝisma/mondpaca tradicio, kiel longigita brako de la partio aŭ patrolanda fronto kvazaŭ blinde kunpropagandis socialismon kaj la ŝtatan doktrinon, en Sovetunio la Eo-movado koncentriĝis pli pri la scienca kaj pragmata-praktika agado sen tro da ŝtata ideologio/propagando, kiu estis minimume kaj formale aplikata en Eo-medioj (konstatita tion por nesovetianoj estas iom surprize, ĉar oni povus kredi, ke homoj en la ‘patrujo’ de la komunismo estas la plej ardaĵoj propagandistoj – nu iuj ja certe estis, sed ne nepre la esperantistoj, almenaŭ koncerne la postmilitan periodon). Sed la ombro de KŜS daŭre akompanis la movadon, kiel ĉion ceteran en tiuj landoj. Ĉi tiu cirkonstanco faras la esploradon de kelkaj aspektoj de la historio de la Eo-movado en tiuj landoj iom malfacila. Ĉiukaze laŭ la fadeno trikotita en tiu ĉi konkludo eblas kaj necesas verki la historion de la postmilita Eo-movado en Sovetunio, ruslandaj kaj alilandaj kolegoj eble kune.

Koran dankon al Boris Kolker kaj Anatolo Gonĉarov pro ilia preteco respondi al

miaj (eble iom strangaj) demandoj. Dankon al Vladimir Samodaj, kiu kritike tralegis la tekston. Estus interese kun ili aŭ aliaj signifaj aktivuloj daŭrigi la diskuton pri la postsovetia situacio de Eo en Ruslando.

Biografio:

¹ **Boris (Grigorjeviĉ) Kolker**, naskita la 15^{an} de julio 1939 en Tiraspol, Moldavio, longtempe loĝis en Baŝkirio (Birk 1965–67, Ufa 1967–93) ĝis lia elmigro al Usono, estas instruisto de lingvoj kaj tradukisto, aŭtoro de tri Eo-lernolibroj. Rusiano kaj sovetiano, ekde 1993 – usonano. Esperantistiĝis en 1957. Doktoro pri lingvoscienco, defendinta disertaĉion pri esperantologia temo. Aŭtoro de tri Eo-lernolibroj (inter kiuj ‘Vojaĝo en Esperanto-lando’ estas la plej konata kaj furora), interlingvistikaj artikoloj kaj recenzoj. Membro de la Akademio de Esperanto. Honora Membro de UEA. Kunredaktoro de ‘Monato’. Dum du jardekoj gvidis amasan korespondan kursion en Rusio, en kiu diplomiĝis preskaŭ 900 personoj. Instruis Eon ĉe usonaj universitatoj en San Francisko kaj Hartford. Nun gvidanto de la Internacia Perfektiga Koresponda Kurso (IPKK). Vicprezidanto de la Internacia Ekzamena Komisiono (IEK) de ILEI/UEA. En diversaj tempoj kunfondinto kaj kungvidanto de SEJM (Sovetia Esperantista Junulara Movado), ASE (Asocio de Sovetiaj Esperantistoj), SEU (Sovetrespublikara Esperantista Unio), REU (Rusia Esperantista Unio), respondeculo pri Eo-instruado en Sovetunio kaj Rusio, komitatano de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo), membro (ekde la jaro 1959), komitatano kaj ĉefdelegito de UEA, kunfondinto kaj membro de EVA (Esperantlingva Verkista Asocio). Prelegis kaj publike parolis en pluraj Universalaj Kongresoj de Esperanto (ekde la 48-a UK en la jaro 1963), reĝisoris la Kongresan te-

mon en la 85-a UK en Tel-Avivo (2000). Interreto: http://eo.wikipedia.org/wiki/Boris_Kolker

² **Anatolo (Evgenjeviĉ) Gonĉarov**, naskiĝis la 12^{an} de septembro 1940 en Siberio, lernis en Brjansk kaj Odeso, laboris en Barnaul kaj Moskvo. Doktoro de kemiaj sciencoj, instruis en superlernejoj de Barnaul, sciencistis en moskvaj scienc-espoloraj institutoj. Studente (Odeso) eklernis Eon (1958) kaj komencis multe Eo-legi, kio difinis lin pasia amanto de la lingvo. En 1960 ekinstruis Ĉe-metode kaj ĝis 1990 instruis ĉiujare, krom paŭzo en 1980–87. En 1965 fondis antaŭ-SEJM-on kaj ekde 1967 prezidantis SEJM-on dum kelkaj jaroj kaj poste revene ankoraŭ jaron. Dum la postSEJM-a periodo (1981–1989) gvidis Scienc-Teknikan fakon de ASE kaj estis estrarano de ASE. Fondis ses junularajn Eo-klubojn (Odeso, Barnaul, Moskvo k.a.). Honora membro de TEJO, multjara membro de UEA kaj nun senatano de la Eo-Civito. Pro troa sindediĉo al Eo foriris de kvar perspektivaj karieroj kaj 1987 definitive iĝis profesia Eo-aganto. Pro la samo fiaskis kelkaj edziĝoj kaj, perdinte loĝejojn, migris kiel malriĉulo tralande de 1990 ĝis 2002. En 2003 revenis Siberion kaj ekokupiĝis precipe Eo-verki, traduki kaj teoriumi pri Eo-movadaj kaj esperantologiaj temoj. Aŭtoro de pli ol 50 Eo-publikaĵoj. Kolektis abundegan materialon, pruvante Eon pli riĉa ol la naciaj sur la nivelo de la beletraj esprim-eblecoj...

Interreto: <http://anatolog.narod.ru>

Mallongigoj kaj ties plenaj nomoj:

SEJM: Sovetia Esperantista Junulara Movado

SEJT – Sovetia Esperantista Junulara Tendaro

ASE: Asocio de Sovetiaj Esperantistoj

SSOD: Unio de Sovetiaj Amikec-Societoj

KŜS: Komitato de Ŝtata Sekureco (internacie pli konata sub la mallongigo KGB)

tempo por kontribui al la rekonstruado kaj renaskiĝo de Ruslando. Sed tio, kion li trovis surloke, ne plaĉis al li, kaj li komencis senhezite kritiki ĉion kaj ĉiun: Al Gorbaĉov li riproĉis „politikan naivecon”, Jelcin laŭ li „disponigis la riĉaĵojn de Ruslando por senhezita rabado”. En la ruslanda parlamento li eksplicite prilamentis la malordon en la ŝtato. Lia opinio pri Putin, la eksa oficiro de KŜS, estis jam pli favora. Tiun novan nacian gvidanton, kiu falis kiel stelo de la ĉielo sur la rusan popolon kaj kiu ne hezitis solvi la problemojn en Kaŭkazo per militagresaj rimedoj kaj aliloke per gulagaj manieroj (ekzemple en la kazo de Ĥodorkovskij), li laŭdis, ĉar li celus la restarigon de la „nacia grandeco” de Ruslando paŝon post paŝo, eble kun iom da „direktata demokratio”, ni diru: pseŭdodemokratio. Rilate al la okcidento, kiu konsiderus Ruslandon kvazaŭ kiel parton de la „Tria Mondo”, Solĵenicin suspektis, ke ĝi volas kapti Ruslandon por ĝia sfero, kaj li bedaŭris, ke Eŭropo kaj Ameriko ne kapablas kompreni Ruslandon. Sed ĉu li mem kapablis kompreni Eŭropon kaj Amerikon, al kiuj la pli kaj pli aroganta moralisto riproĉis „dekadencon” kaj „poltrocon”? La memuaroj *Miaj amerikaj jaroj* postlasas unikan impreson pri la patosa idioma de tiu komplika verkista personeco kun ĉiuj fortoj kaj malfortoj de lia nepre kontraŭdira karaktero.

Rilatoj kun aliaj disidentoj

La rilatoj de Solĵenicin kun aliaj disidentoj estis tre malfacilaj. Atakata estis ekzemple Andrej Saĥarov (1921–89), kiu same kiel Solĵenicin ricevis la Nobel-premion, pro siaj „naivaj” politikaj opi-

nioj. Saĥarov admonis sian disidentan kolegon pri la fakto, ke monarkiismaj kaj naciismaj ideoj estus danĝeraj por la socio. Flanke de Lev Kopelev Solĵenicin sentis sin kalumniata pro antisemitismo. Kaj ĉe Sinjavskij li ne ŝatis, ke li prezentis mankojn en la solĵenicina verkaro. La anticipan liberigon de Sinjavskij el la gulago Solĵenicin interpretis per lia kunlaborado kun KŜS. Ĉu Solĵenicin, kiu konsterniĝis, kiam la de li ofenditaj aŭtoroj kaj biografioj klopodis jure ekprocesi kontraŭ li, forgesis, ke male al Sinjavskij, Daniel, Pasternak, la reprezentalioj trafis lin pli malfrue ol liajn same kritikajn kolegojn? La jam menciita Varlam Ŝalamov (1907–82), alia eminenta rusa aŭtoro prigulaga, atentigis pri la risko, ke beletre pritraktante la gulagon, ĝi povus esti romantikigita. Marvin J. Chomsky, la reĝisoro de la fama serio *Holokaŭsto*, ricevis la malpermeson de la majstro produkti filmon el *Arkipelago GULag*. Kaj fine ankaŭ Joseph Brodsky kaj Efim Etkind ne estis protektitaj de la blasfemoj de Solĵenicin. Kiam Saĥarov vizitis Usonon kaj serĉis la pertelefonan kontakton kun Solĵenicin en Vermonto, dialogo ne estiĝis. Kun siaj disidentaj kolegoj li ne sukcesis kaj evidente ankaŭ ne strebis trovi la komunan lingvon trans la personaj opinioj. Ankaŭ kun siaj biografiantoj Solĵenicin kverelis, ekzemple kun Michael Scammell, kiu publikigis en 1984 la milpaĝan biografion pri la verkisto. Dum ĉe Solĵenicin mem apenaŭ ekzistas adekvata ĉapitro pri la tragika morto de lia plej aĝa filo Dmitrij, la verkisto pedante observadis, kio estas skribata pri li, kaj kio ne plaĉis al li, tion li rifuzis en siaj memuaroj *Miaj amerikaj jaroj*, kiuj aperis kun prokrasto.

Franco en februaro 1976 estis konstateblaj klare ankaŭ liaj kontraŭokcidentaj opinioj. Ŝajnas, ke en Hispanio (marto 1976) li laŭdis la reĝimon de Franco, admonante la hispanojn, ke ili ne tro rapide alproksimiĝu al la demokratio. Ke li renkontis en Ĉilio la diktatoron Pinochet, la verkisto kontestis tion en sia aŭtobiografio *Inter la muelŝtonoj*.

En Usono

En aprilo 1976 la familio Solĵenicin forvojaĝis al Usono. En Cavendish, ŝtato Vermont, Solĵenicin serĉis kaj ŝajne trovis dume trankvilecon. Por ŝirmi lin kontraŭ ĝenoj kaj danĝeroj, la lokaj loĝantoj protektis la domon de la fuĝinto, kaj en la vendejoj oni rifuzis doni informojn pri kiel trovi la vojon al lia domo. Barilo ĉirkaŭis ĝin, ke la verkisto povu vivi kaj labori senĝene. Ĉar li ĉiam kredis, ke li iam rehejmiĝos al Ruslando, Solĵenicin ne klopodis lerni la anglan lingvon kaj ankaŭ ne pensis pri integriĝo en la usona ĉirkaŭaĵo. En la usona elmigrujo li skribis la dekvoluman epopeon *La Ruĝa Rado* (Krasnoje koleso), kiu prezentas epizodojn de la ruslanda historio inter 1914 kaj 1917, ankaŭ la revolucion de tiu ĉi jaro. En 1983 estis aljuĝita al li la Templeton-premio (kun valoro de 820 000 pundoj sterlingaj) – ĝin ricevas personecoj, kiuj plibonigas la rilatojn inter scienco kaj religio. Kvazaŭ izolita kaj sen deziro akcepti ĵurnalistojn kaj scivolemajn vizitantojn, en Usono Solĵenicin observadis la evoluon en la mondo, precipe en sia patrujo Sovetunio. Inter la malmultaj akceptitoj troviĝis Rudolf Augstein, la fondinto de la germana revuo *Spiegel*.

Reveno al Ruslando

Nur en 1989, do en la tempo de perestrojko kaj glasnosto, la verkoj de Solĵenicin trovis okazon esti publikigitaj (en *Novij Mir* kaj apartaj eldonaĵoj), post kiam li estis agnoskata kiel grava aŭtoro kaj reintegrata en la Verkista Asocio, sed ne sen viglaj kontraŭdiraj diskutoj ĉe la partia pinto. Gorbaĉov komence esprimiĝis kontraŭ la publikigo de *Arkipelago GULag* en Sovetunio, konsiderante ĝin „kontraŭsoveta verko”. Sed la fiaska ŝtatestro ne havis ŝancon: la libroj de la rehonorigito aperis kun eldonkvantoj de milionoj da ekzempleroj.

Post la kolapso de la sovetia komunismo en 1990 la verkisto estis plene rehabilitita, kaj la ŝtato rehavigis al li la perditajn civitanajn rajtojn. Al lia ĉefverko *Arkipelago GULag* estis aljuĝita la Ŝtata Premio, sed li rifuzis ĝin, ‘dankante’ la komplezon per la publikigo de la eseeca alvoko *La vojo de Ruslando el la krizo* (Kak nam obustroit’, 1990), kiu aperis kun eldonkvanto de 72 milionoj da ekzempleroj. En 1991 la ĝenerala prokuroro Trubin senkulpiĝis pro la „neleĝa proceduro fare de iamaj kunlaborantoj de la prokuroro de USSR” kontraŭ Solĵenicin, kiun li siatempe devis elteni. Pli ol 105 dosieroj la sekreta polico (KŜS) kolektadis pri li.

En 1993 Solĵenicin vizitis la okcidentan Eŭropon. Kiam en majo 1994 li definitive rehejmiĝis al sia lando, la 27^{an} de majo, li vojaĝis dum 55 tagoj kun entute 9000 kilometroj de Vladivostoko ĝis Moskvo. Post la dudekjara foresto de la patrujo li retrovis komplete ŝanĝitan landon, kaj li konfesis: „Mia literatura misio estas plenumita. Nun venis la

CK KPSU: Centra Komitato de Komunista Partio de Sovetunio
USSR: Unio de Socialismaj Sovetrespublikoj
Komsomolo: Komunisma junulara organizo de USSR
Samizdato: sekretmaniera memeldono kaj distribuado de neoficialaj aŭ nepermesitaj publikaĵoj en privataj kanaloj en Sovetunio kaj aliaj komunismaj landoj
UEA: Universala Esperanto-Asocio
TEJO: Tutmonda Esperantista Junulara Organizo

Ĉefaj legindaj publikaĵoj pri la sovetia Esperanto-movado:

2008: Kolker, Boris: La aventuro esti membro de UEA en Sovetunio En: *Esperanto* (UEA), junio, n-ro 6, p. 126–127.
2006: Bronŝtejn, Mikaelo. **Legendoj pri SEJM**. Impeto. Moskvo. (3^a eld). 231 paĝoj.
2005: Kolker, Boris: **Vojaĝo en Esperantolando**. Perfekta kurso de Esperanto kaj gvidlibro pri la Eo-kulturo. UEA. Rotterdam. (3^a eld). 280 paĝoj.
2004: Kolker, Boris: „NIA Vilnjuso kaj ILIA Jerusalemo”. En: *Sennacieca Revuo*, 2004, p. 31–32 (aperis ankaŭ en *Israela Esperantisto*, *Eventoj*, *Litova Stelo*, *Esperanto sub la Suda Kruco*; legebla rete:
http://ourworld.compuserve.com/homepages/profcon/e_vilje.htm)
2003: Prof. Mahomet Isaev: De vilaĝo al ĉefurbo. En: *Rusia Esperanto-Gazeto*, 1/14 kaj 2/15, februaro kaj aprilo.
2000: Cibulevskij, Dmitrij M.: **ASE (Asocio de Sovetiaj Esperantistoj)**. Historiaj notoj. Ĥarkiv. 384 paĝoj.
1999: Samodaj, Vladimir: **Ne nur legendoj, ne nur pri SEJM**. Homoj kaj epizodoj. Impeto. Moskvo. 175 paĝoj.
1994: Cibulevskij, Dmitrij M. **SEJM**. Historia skizo. Impeto. Moskvo. 204 paĝoj.
1991: Landa Agado: SEU kaj Sovetunio: kune al necerta estonteco, intervjuo

kun Andy Künzli kaj Andrej Ananin. En: *Esperanto* (UEA), 6, p. 109.
1990: Künzli, Andy E.: Eksterlandanoj: Ankaŭ „ekzotikaj bestoj” en Sovetunio. En: *Kontakto* 1, p. 7, 10. Kun aldona artikolo pri *Gazetoj en Sovetunio*, p. 15.
1989: Künzli, Andy E.: Ĉu perestrojko pereigas la unuecon de sovetiaj esperantistoj? En: *Esperanto* (UEA) 11, p. 185–7.
Bultenoj Juna Esperantisto, *Informacionnyj Bjuleten’*, *Cerbe kaj Kore*.

Oni konsultu ankaŭ la koncernajn artikolojn de U. Lins (vd. bibliografion en ‘*La Danĝera Lingvo*’).

Ekster la intervjuo:

Mi volus rakonti gajan anekdoton en iom alia kunteksto: Okaze de mia scienco staĝo en Sovetunio (1988–89) mi ankaŭ lernis, ke en la sovetia akademia sistemo ekzistas la ruslingva titolo „aspirant” por la defendantoj de doktoriga promocio (kandidat nauk). Kiel oficiala ‘interŝanĝ-studento’, kiu loĝis kun tiuj ‘aspirantoj’ en la sama „komunloĝejo” (obŝĉĵitie), mi fakte estis mem konsiderata kiel ‘aspiranto’ (kvan-kam mi estis nur antaŭ-licencia/magistra studento). Ĉar tiu ĉi nocio prononce treege similas al „esperanto”, plurfoje okazis amuza konfuziĝo inter mi kaj rusoj, kiuj, ne sciante kio estas Esperanto, unuavice komprenis „aspiranto” kaj „aspirantisto” (kio ne ekzistas) anstataŭ „esperantisto”... Cetero la tipe rusa prononco de Esperanto, kiu povas kaŭzi eĉ semantikajn miskomprenojn, amuzis ankaŭ min, kaj por fini ĉi tiun temon mi volas referenci al p. 83 de la libro de Samodaj, kie li rakontas, ke rusaj teatraj aktoroj prononcis „kakaĵon” anstataŭ „kokaĵon”,



Forpasis Aleksandr Solĵenin

Post la bedaŭrinda forpaso de la du elstaraj aŭtoroj, ĉukĉo Jurij Rytchĉu kaj kirgizo Ĉingiz Ajtmatov, verkantaj en la rusa lingvo, ankoraŭ sekvis, la 3^{an} de aŭgusto, noktomeze, la mesaĝo pri la morto de Aleksandr Solĵenin. Post la sekreta parolado de N.S. Ĥruŝĉov kadre la XX Konferenco de la Komunista Partio de Sovetunio de la jaro 1956, en kiu la sovetia ŝtatestro senmaskigis la personkulton kaj la malhomecan sistemon, kreitan de Stalin kaj de liaj abomenaj lakeoj, Solĵenin apartenis al la unuaj kaj plej fortaj literaturistoj, kiuj kuraĝis kritiki la stalinistan mondon de persekutadoj, denuncoj, arestadoj, humiligoj, murdadoj. Lia ĉefverko *Arkipelago GULag* (1974), kiu



tiel ke Vilmos Benczik, tiama sekretario de Hungara Eo-Junularo, en 1966 devis interveni perletere por atentigi la rusajn aktorojn, kiuj ĵus lernetis Eon, ke ili bonvolu malignori tiujn gravajn prononcajn nuancojn kaj forigu la misprononcon, kaze ke ili deziras prezenti sian spektaklon en Hungario...

Alia kazo de embarasa lingva fuŝizado estis tipografiaj eraroj: en iu prelego kamarado Breĵnev diris „kaj moskvanoj” anstataŭ „karaj moskvanoj” (Samodaj, p. 147). Do. Ĉion ceterindan legu en la libroj de Kolker, Bronŝtejn, Samodaj, Cibulevskij... **aK**

dum la Malvarma Milito devige troviĝis en la biblioteko de ĉiu serioza intelektulo, skuis la mondon kaj faris la stalinan inferon surteran pli komprenebla. La verko estas dediĉita „al ĉiuj tiuj, kiuj ne havis sufiĉan vivon por mem rakonti”, laŭ Solĵenin temis pri sia „provo de arta prilaborado” de la gulaga sistemo. Wolfgang Kasack, la germana ĉeffakulo pri rusa literaturo, konsideris Solĵeninon kiel la „verŝajne plej signifan proziston de la rusa literaturo en la 20a jarcento”.

Junaĝo, profesia kariero

Aleksandr Isaeviĉ Solĵenin (Александр Исаевич Солженицын) naskiĝis la 11^{an} de decembro 1918 en la sudrusia urbo Kislovodsko. Lia patro Isakij Semjonoviĉ, devena el norda Kaŭkazo, estis rusortodoksa kredanto, kiu ne povis finstudi filologion en la Moskva universitato, ĉar li devis militservi ĉe la germana fronto. Li tragiĉe pereis kiel oficiro fine de la unua mondmilito, en junio 1918, ĵus antaŭ la naskiĝo de la filo, kiu estis edukita de la patrino Taisija Zaharovna Ŝĉerbak, tajpistino, filino de ukraina bienulo. La familio de la patrino fariĝis viktimo de la bolŝevika konfiskteroro.

En 1924 Solĵenin translokiĝis kun sia patrino al Rostovo ĉe Dono, kie inter 1926 kaj 1936 li vizitadis lernejon, vivante rande de la materia mizero. La lernejo trudis al li la komunisman ide-

toj en Sovetunio, kie samtempe sekvis vasta kampanjo kontraŭ Solĵenin kaj ĉiuj disidentoj. Kiel la lastan kompromison KŜS proponis, tra la eksedzino de Solĵenin, ke estu oficiale publikigita *Kancerkliniko*, se Solĵenin rezignos pri la publikigo de *Arkipelago GULag* en eksterlando.

Elpelo kaj emigracio

Intertempe la pacienco de Breĵnev, Kosigin, Podgorni, Andropov kaj ceteraj anoj de la CK de KPSU elĉerpiĝis, kaj la ‘kazo Solĵenin’ diskutiĝis en la Politburo kaj la CK de KPSU, kie oni prijuĝis la verkiston *persona non grata* kaj pledis por la elpelo de Solĵenin eksterlanden. La 12^{an} de februaro 1974, laŭ dekreto de la Prezidio de la Supera Soveto de USSR, la verkisto estis arestita kaj kulpigita pro perfido de la patrujo. Kiel cellandoj estis menciitaj Irako aŭ Danlando, sed Willy Brandt ofertis akcepti la nedeziratan personon en Germanujo, kaj tiel la forpelito, kiu ankaŭ perdis la sovetian civitancon, flugis kun sia familio al Frankfurto la 29^{an} de marto.

Kompreneble la libro *Arkipelago GULag* signifis mondan sensaciegon, kaj ĝi funde kaj baze modifis la bildon, kiun multaj okcidentaj intelektuloj havis pri Sovetunio, akcelante la personan ideologian krizon ĉe tiuj, kiuj sincere aŭ naive kredis la superecon de la marksismo-leninismo. Iuj idealistoj hodiaŭ eĉ asertas, ke la trilogio *Arkipelago GULag* esence kontribuis al la detruo de la sovetia komunismo kaj al la fino de Sovetunio mem. Tie la verkoj de Solĵenin estis malpermesitaj kaj cirkuladis kadre de samizdato dum jardekoj. Maksimume la rakonton *La bieneto de Matrjona*

(Matrjonin dvor), verkitan en 1959 kaj aperintan en 1963, la sovetianoj rajtis legi. Pere de la honorarioj enkasigitaj per *Arkipelago GULag* oni starigis la Socian Fondadon por helpi al persekutitoj kaj iliaj familioj.

Post la perforta ellandigo de Solĵenin la ekzilito trovis unue ŝirmon en Germanujo ĉe Heinrich Böll.

En februaro 1975 Solĵenin atingis Zurikon, kie la interesiĝo pri lia persono estis grandega. En marto lia familio postsekvis lin al Svislando, kie oni sentis la honoron, ke la „konscienco de Ruslando”, kiel la disidentoj estis kaŝnoma en sia patrujo, decidis ekloĝi en la bela alpa respubliko. Fakte la ekzilito eĉ esprimis sian intencon resti en Svislando „por longa tempo”, ĉar la svisa speco de demokratio plaĉis al li. Iam li eĉ vizitis la prademokratian baloto-institucion de ‘Landsgemeinde’ en Appenzell, kiun la sovetia verkisto agnoskis per vigla simpatio. Kompreneble en Svislando, kiu firme aplikis kontraŭkomunisman sintenon kaj kiel neŭtralulo staris flanke de okcidento dum la malvarma milito, la publika scivolemo pri la sorto de Solĵenin estis granda. Precipe ĵurnalistoj ‘perskutadis’ lin, la faman loĝanton de la domo ĉe Stapferstrasse 45 en Zuriko. Tiu konstanta publika atento, komplikadoj kun la loka polico kaj la timo antaŭ sovetiaj agentoj ne plaĉis al Solĵenin. En aprilo 1975 la verkisto vojaĝis tra la okcidenta Eŭropo kaj vizitis Kanadon kaj Usonon, kie li elpaŝis en la Kongreso. En siaj paroladoj la ruso akre kritikis la komunistan reĝimon kaj ideologion kaj alvokis Sovetunio. Dum lia vojaĝo tra Britio kaj

kista Asocio de USSR, en kiu li postulis la abolon de la cenzuro, vaste diskonigis la verkiston inter la intelektuloj de Sovetunio kaj en eksterlando. Post tiu *Letero* la sovetiaj instancoj komencis definitive serioze okupiĝi pri la ĝena protestanto. En 1968, kiam en Usono kaj Okcidenta Eŭropo aperis liaj romanoj *En la unua cirklo* kaj *Kancerkliniko*, kio alportis al la verkisto grandan popularecon, la sovetia gazetaro lanĉis propagandan kampanjon kontraŭ la problemaŭtoro. Ĉio tio koincidis, rememore kaj kiel konate, ankaŭ kun la Praga Printempo. La ludo inter Okcidento kaj Sovetunio estis daŭrigata per la armilo de la Nobelpremio pri literaturo. Kiam en 1969 Solĵenin estis proponita por ĉi tiu premio, li ankoraŭ ne ricevis ĝin, kaj en novembro de la sama jaro oni eksigis lin el la Verkista Asocio de USSR. En 1970 la nomumo kiel premiito de la literatura Nobelpremio sukcesis – granda ŝoko por la sovetiaj instancoj. Tuj poste la sovetia gazetaro relanĉis fortan propagandan kampanjon kontraŭ Solĵenin kaj alvokis lin forlasi la landon, kion li rifuzis. La Nobelpremio pri literaturo, aljuĝita en 1970 al Solĵenin *in absentia*, ne povis esti akceptita de la verkisto persone, pro la timo, ke li ne povus reveni al Sovetunio post la transpreno de la premio.

En tiu periodo (1968) Solĵenin konatiĝis kun Natalja Svetlova. Baraktinte kontraŭ malfacilaĵoj divorci kun la unua edzino, la 22^{an} de julio 1972 li finfine sukcesis registri sian geedziĝon kun la nova virino, kio havigis al li la rajton oficiale ekloĝi en Moskvo. Samtempe li povis aperiĝi la romanon *Aŭgusto 14*

en Parizo, en kiu li esprimis siajn ortodoks-patriotajn konsiderojn. En 1972 li verkis leteron al patriarko Pimen, en kiu li komentis la problemojn de la eklezio. 1972–73 li prilaboris sian epopeon *La ruĝa rado* (Krasnoje koleso), sen gvidi aktivan disidentan agadon. Tamen la 23^{an} de aŭgusto li donis intervuon al eksterlandaj korespondantoj. Samtage KŜS kaptis sinjorinon Elisaveta Voronjanskaja, unu el la helpantinoj de la verkisto, kiu transdonis, dum pridemandado, ekzempleron de *Arkipelago GULag*. Poste ŝi iris hejmen kaj pendumis ŝin. Pri tiu malfeliĉo la verkisto eksciis nur la 5^{an} de septembro. Por la publikigo de *Arkipelago GULag*, la teksto devis esti kaŝe transportita mikrofilme laŭ la kanalo de tamizdato al eksterlando, kie ĝi estis presita kaj eldonita ĉe YMCA-Press en Parizo. Per *Arkipelago GULag* Solĵenin kreis tute novan literaturan ĝenron, nome tiun de la gulaga literaturo, kiu distingiĝas per kompleksa retoriko, emfazanta, analizanta kaj akuzanta la profundan malrespekton de la homa digno. Ĉi tiun specifan kriminalistikan arton, kombinitan kun psikologia observokapablo (Ulrich Schmid, *Neue Zürcher Zeitung*), Solĵenin evoluigis ankaŭ en siaj aliaj romanoj kiel la menciitaj *En la unua cirklo* kaj *Kancerkliniko*, kie li okupiĝis pri la tipaj sovetiaj problemoj de koruptado, mensogo, timo, puno ktp.

Lige kun tiu evoluo Solĵenin skribis leteron al la gvidantoj de Sovetunio por oficiale distanciĝi de la komunisma ideologio kaj pledi por la starigo de rusa nacia ŝtato. En la okcidenta gazetaro aperadis amaso da artikoloj defende al Solĵenin kaj aliaj disiden-

ologion, kaj en 1936 li aliĝis al la Komso-molo. Ĝuste en tiu periodo vekigis en li la emo verki beletraj. Kiel Solĵenin konfesis en sia aŭtobiografio, li volis esti verkisto, sed li ne povis trovi okazon por publikigi siajn manuskriptojn. Krom tio, en Rostovo ne ekzistis la ebleco por ricevi laŭdezeran literaturan edukadon, kaj la cirkonstancoj malpermesis al li translokiĝi al Moskvo. Evitante, ke literaturo fariĝu lia sola ĉefokupo, li enskribis sin en la Departemento pri fiziko kaj matematiko de la Rostova universitato, kiun li finis en 1941 kun distingo. Sed malgraŭ tiu videbla matematika talento Solĵenin ne volis dediĉi sian vivon nur al tiu profesia fako. Kiel montros la posta sorto, matematiko savis lian vivon kaj helpis, por ke li povu verki. Por flegadi literaturajn kaj historiajn interesojn, en 1939 li ekstudis perkoresponde en la Instituto pri historio, filozofio kaj literaturo de Moskvo.

Milito kaj ekzilo

En 1941 Solĵenin fariĝis, kun prokrasto, ruĝarmeano de la Granda Patrolanda Milito, kaj komence li servis kiel veturigisto de ĉevalĉaroj. Pro siaj matematikaj konoj, en aprilo 1942 li estis sendita al la artileria lernejo en Kostromo, tuj poste li forveturis al Saransko, kie atendis lin novaj militaj taskoj. Intertempe li iĝis leŭtenanto. Ekde februaro 1943 li deĵoris en la batalanta armeo kadre de la 2^a bjelorusa fronto kaj tiel atingis kun sia taĉmento Orientan Prusujon. En junio 1944 li estis nomumita kapitano. Dum la milito Solĵenin abunde verkadis kaj skribis taglibrojn (vd. la poemon *Doroŝenka* kaj

la librojn *Orientprusaj noktoj* (Prusskie noĉi, 1976).

En februaro 1945 Solĵenin estis arestita. La milita cenzuro trovis leterkorespondaĵojn kun la malnova lerneja amiko Nikolaj Vitkeviĉ, en kiuj Solĵenin kritikis la misformadon de la leninismo far Stalin kaj skribis malrespektajn frazojn pri la sovetia gvidanto. La arestito estis transportita al Moskvo kaj tie kondamnita al okjara laborpuno en la gulago (kio estis milda puno en tiu ĉi tempo, kiel li mem rimarkigis). Sekve Solĵenin trapasis diverstipajn prizonojn kaj koncentrejojn (ĉi tiun sperton li prilaboris en unu teatraĵo). En aŭgusto oni enkarcerigis lin en Nova Jerusalemo, en septembro en la lagro 'Kalugaj Pordegoj'. En junio 1946 li estis translokita al speciala prizono de MVD-MOB (Ministerioj pri Internaj Aferoj kaj pri Ŝtata Sekureco), kaj en septembro lin ekvidis la speciala prizono por fakuloj-sciencistoj (Ŝaraŝka) en la aviadila fabriko de Ribinsko. La itinero tra la gulagaj karceroj estis daŭrigata: kelkajn monatojn poste Solĵeninon oni translokis al Zagorsko, kaj en julio 1947 li enprizoniĝis en Marfino apud Moskvo, kie li 'laboris' kiel matematikisto. Ĉi tie li ankaŭ konatiĝis kun alia disidento – Lev Kopelev kaj komencis prilabori sian *Amu la revolucion* (Ljubi revolucion). La restadon en Marfino Solĵenin priskribis en la romano *En la unua cirklo*. En decembro 1948 okazis la divorco inter Solĵenin kaj ties edzino Natalja Reŝetovskaja. En 1950 Solĵenin trapasis novan etapon en specialaj prizonoj por politikaj arestitoj tra Butirko (kie estis retenitaj en la sovetia periodo interalie ankaŭ I. Babel, F. Dzerĵinskij,

E. Ginzburg, V. Majakovskij), por alveni, en aŭgusto, ĉe la fina celo de sia 'vojaĝo' tra la gulago: en 'steplag' (stepa lagro) en Ekibastuzo, Pavlodara distrikto de Kazaĥa SSR. Tie li devis labori kiel ministro, masonisto kaj ĝisisto. Post kiam Solĵenin malsaniĝis je kancero, li estis liberigita la 13^{an} de februaro 1953. Unu monaton post sia liberigo el la gulago la sufereganta viktimo ricevis la rezolucion de OSO (speciala komitato de NKVD) kun la sciigo, ke li estos ekzilita dumvive al la vilaĝo Berlik en la Kok-Tereka rajono* de la Dĵambula distrikto en la suda Kazaĥlando. Kiel Solĵenin klarigis en sia aŭtobiografio, ĉi tiu paŝo ne estis unuavice direktita kontraŭ Solĵenin kiel persono mem, sed ĝi signifikis kutimon en tiu ĉi tempo por trakti la eksgulaganojn. Tie ekde marto 1953 (la 5^a estas la dato, kiam la morto de Stalino estis anoncita publike) Solĵenin „servis la ekzilon” (kiel tekstas la angla traduko: I served this exile), ĝis junio 1956, elturniĝante kiel vilaĝa instruisto pri matematiko kaj fiziko por la 8–10^{aj} klasoj de la meza lernejo je la nomo 'Kirov'. Ĉar lia kancera malsano pliakriĝis fine de 1953, li estis operaciita en taŝkenta malsanulejo. Tiam li fartis tre malbone: „Mi estis proksime al la morto, mi ne povis manĝi, nek dormi, kaj estis kruele rompita pro la veneno de la tumor”. Tamen dum kuracado Solĵenin povis esti savita. Tiun unikan sperton li prilaboris en la aŭtobiografia romano *Kancerkliniko* (Rakovij korpus), elpensita en printempo 1955. En la ekzilo, kie li sentis malfacilan kaj solecan ekzistadon, li verkadis sekrete prozon. Do estiĝis krom la manuskripto pri la teatraĵo *Respubliko*

de la Laboro (Respublika truda) lia elstara romano *En la unua cirklo* (V kruĝe pervom). En junio 1956 sekvis lia liberigo 'sen rehabilitado' pro modela konduto (t.e. manko de krimaj agadoj laŭ la ĵargono de la Supera Tribunalo de USSR). En aŭgusto Solĵenin revenis al la centra Rusujo, kie li unue ekloĝis en la vilaĝo Milcevo, Kurlova rajono de la Vladimira distrikto, kie li ree instruis matematikon. Tie li ankaŭ renkontiĝis denove kun sia iama edzino Natalja Reŝetovskaja, kiu definitive re-aligis al li en novembro 1956, pere de la duafoja geedziĝo la 2^{an} de februaro 1957. Laŭ decido de la Milita Kolegio de la Supera Tribunalo de USSR, Solĵenin estis rehabilitita la 6an de februaro 1957. Ekde julio Solĵenin vivis en Rjazano, laborante kiel instruisto pri astronomio en meza lernejo. Dediĉante sin al verkado, Solĵenin ofte retiriĝis al solecaj lokoj por povi labori sen esti ĝenata.

Nova danĝera danco kun la reĝimo

Dum sia longa aresta periodo Solĵenin komplete seniluziiĝis pri marksismo-leninismo, li ekkredis je Dio kaj ekadoris ortodoksajn-patriotismajn ideojn. En tio trovis lokon ankaŭ lia ideo pri slava ŝtato sur la teritorio de Ruslando, Belorusio kaj Ukrainio, kies reĝimo devus esti aŭtoritata, sed kun iompost-ioma transiro al la demokratio. La gvida forto devus esti la rusoj, kiuj edukus la popolon laŭ tradicie spiritaĵ, moralaj kaj religiaj principoj.

Nun komenciĝis por Solĵenin nova vivetapo kun novaj perspektivoj, defioj kaj problemoj. Inter la unuaj tekstoj, preparitaj de Solĵenin por publikigo,

apartenis la rakonto *Ŝĉ-854* (1959) pri la vivo de simpla arestito devenanta el rusaj kamparanoj. Iam Solĵenin mem estis arestito 'Ŝĉ-202'.

Impresita pri la prelego de Aleksandr Tvardovskij, redaktoro de la elstara literatura revuo *Novij Mir* (Nova Mondo), dum la XXII Konferenco de la Komunista Partio de USSR en 1961, Solĵenin havigis al li tiun rakonton *Ŝĉ-854*, el kiu li tamen forigis la plej tiklajn politikajn erojn, por ne provoki la cenzuron. Tvardovskij alte taksis ĉi tekston kaj invitis ĝian aŭtoron al Moskvo. Kun la beno de Ĥruŝĉov la teksto povis esti publikigita kaj aperis sub la titolo *Unu tago en la vivo de Ivan Denisoviĉ* (Odin den' Borisa Denisoviĉa) en *Novij Mir* (n-ro 11/1962). Ĉi tiu rakonto, kies enhavo referencis al la spertoj en la kazaĥa gulago de Ekibastuzo, estis tuj reeldonita aliloke kaj tradukita en fremdlingvojn. Kaj la 30^{an} de decembro Solĵenin estis akceptita al la Verkista Asocio de USSR. Baldaŭ post tiu sukceso, *Novij Mir* publikigis aliajn tekstojn de Solĵenin, kiel *La bieneto de Matrjona* (Matrjonin dvor, 1963) k.a. Ĉi tiuj publikaĵoj kaŭzis grandan eĥon flanke de verkistoj, sociaj agantoj, legantoj, iamaj arestitoj ktp. Eĉ la poetino Anna Aĥmatova miris pri la kuraĝaj verkoj de Solĵenin. Kiam en decembro 1963 la revuo *Novij Mir* kaj la Centra Ŝtata Arkivo de Literaturo kaj Arto proponis la rakonton *Unu tago en la vivo de Ivan Denisoviĉ* por aljuĝo de la Lenina Premio en 1964, sed la Komitato pri premioj rifuzis la proponon. Renkontante Varlamon Ŝalamov, alian gravan prigulagan verkiston, kiu alte taksis pri *Ivan Denisoviĉ*, Tvardovskij,

ankaŭ interesiĝanta pri *Kancerkliniko*, proponis, ke ili ambaŭ kune ellaboru la *Arkipelagon*. En aŭtuno unu el la teatraĵoj de Solĵenin estis permesita por prezentado en la Lenin-Komsomola Teatro en Moskvo, kaj unu peco povis aperi ankaŭ en *Literaturnaja Gazeta* (Literatura Gazeto).

Post Ĥruŝĉov

La 14^{an} de oktobro 1964 Nikita Ĥruŝĉov estis forpuĉita laŭ iniciato de Suslov, Breĵnev, Kosigin, Mikoĵan kaj kompanio. Tio signifis, ke Solĵenin perdis pli kaj pli la eblecon laŭleĝe aperigi siajn verkojn kaj publike elpaŝi. Pluraj signifaj ĵurnaloj kiel *Ogonjok* (Fajreto), *Oktjabr'* (Oktobro) *Literaturnaja Rossija* (Literatura Rusujo), *Moskva* (Moskvo), *Pravda* (Vero) kaj aliaj, kiuj ricevis la proponon aperigi tekstojn de Solĵenin, rifuzis publikigi ion ajn de li.

En septembro 1965 la sekreta servo (KŜS) traserĉis la loĝejon de V.L. Teuŝ, ĉe kiu Solĵenin konservis parton de siaj arkivaĵoj. Dum estis konfiskita lia arkivo, la CK de KPSU mem distribuis en nepublika eldonkvanto aron da verkoj de Solĵenin inter la anoj de la nomenklaturaro. Solĵenin reagis per plendoj al Breĵnev, Suslov, Andropov kaj tiel altigis la atenton pri si mem. Samtempe Solĵenin komencis memstare elpaŝi en Sovetunio, ekzemple pere de intervjuoj kun eksterlandaj ĵurnalistoj. Pluraj rifuzitaj tekstoj de Solĵenin migris ekde 1964 al la samizdato (sistemo de nepermesita memeldonado) kaj tiel trafis ankaŭ okcidenton, interalie Germanujon, Francujon kaj Usonon, kie ili estis publikigitaj. Lia letero de 1967 al la delegitoj de la 4^a kongreso de la Ver-